


EL POPOLA ĈINIO

中國新運
9 1981





Fruktarbaro

Aŭtuno en la montaro de Beijing



Paŝtado

Anseropaŝtado




Aŭtuno venis al la antaŭurbo de Beijing senrimarke. Ĝi alportis ĝojon de riĉa rikolto al la gubernio Huairou en la antaŭurbo de Beijing. Plejparto de ĝiaj vilaĝoj situas tuj ĉe montoj kaj riveroj. Tie abunde produktiĝas kaŝtanoj, juglandoj, pomoj, persimonoj kaj piroj. Nun antaŭ vi prezentiĝas intensa rikolto de la kamparanoj de iu produktbrigado de la komunumo Shayu.


Fotoj de ZHANG WEI

Kolektado de fruktoj



Akvokonservejo en aŭtuno





Maljuna artisto de kamparo



Korto de kamparano



Al foiro

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Lusin

Olepenetraĵo de HA QIONGWEN

SUR LA DORSKOVRILO:

Flosigado

Ksilografajo de GENG HAN

KOLORAJ SERIOJ:

Aŭtuno en la montaro de Beijing

Taishan-monto

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj
de E-istoj:

Malnova fortikaj-pordego Lev-
roux en Francio (en la 15-a
jarcento)

Sunsubiro ĉe monta vilaĝo de
Apuanaj Alpoj

Dancarto de la mongoloj

Pentristo Chen Dayu

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Hibrida rizo

Ekstermo de insekto per insekto

Beijing-a Internacia Infanĝardeno

Lukto de mongoloj

—◆—
Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La pozicio de Lusin en la monda literaturo	2
Lusin kaj Esperanto	6
Aŭtobiografio	10
Sinjoro Fuĝino	13
SUR NIA LIBROBRETO: "Vera pliriĉigo de la Esperanta traduka literaturo"	17
KURANTAJ AFEROJ	4, 18
Sukceso de Ĉinio en kulturo de hibrida rizo	19
Plastaj produktaĵoj de Ĉinio	21
VIDINTAJ LOKOJ: Taishan-monto	24
NIA KULTIVEJO: Mi kaj Esperanto	27
ESP-NOVAĴOJ	28,48
Brila imit-arto	30
Ĉe la rokmuro Chibi	32
Humuraĵoj	32,51
KULTURAJ NOTOJ	33
Lu Jiaksi — Nova prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj	34
Postlabora vivo plena de vigeleco	35
Ili gajnis spektantojn	38
"Mi preferas morti por sendependeco"	40
AMIKECO: Ĉinaj muzikistoj en okcidenta Berlino	41
Pri la internacia jaro de handikapitoj	42
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Kontraŭjapana Rezist- milito (1)	43
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Jamej-oj sur Lanyu-insuleto	46
TRA LA MONDO	49
SPORTO	50
KORESPONDI DEZIRAS	51



Lusin (en 1933)

GE BAOQUAN*:

La pozicio de Lusin en la monda literaturo

LA 25-a de septembro ĉijare estas la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lusin (1881-1936). Ĝin solene celebros la ĉina popolo.

En Ĉinio oni honoras s-ron Lusin kiel la “ĉefkomandanton de la ĉina kultura revolucio, li estis ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciulo” (vortoj de Mao Zedong); samtempe, pro siaj senmortaj verkoj kaj gravaj kontribuoj en tradukado de fremdlandaj literaturaĵoj li estis ankaŭ granda verkisto ĝuanta altan internacian prestiĝon.

Lusin okupis gravan lokon en la monda literaturo ĉefe pro siaj valoraj verkoj. En siaj noveloj li sukcese kreis figurojn de personoj el diversaj socitavoloj de la malnova Ĉinio, precipe tiujn de laboruloj kaj virinoj en senrajta pozicio, priskribis la vivon kaj suferojn de la popolo kaj ĝuste spegulis la realon de

la malnova socio. En la fino de la dudekaj jaroj kaj la komenco de la tridekaj jaroj, li aktive partoprenis en la literaturaĵoj kaj artaj aktivecoj de ĉinaj maldekstraj verkistoj. En la “senvoĉa Ĉinio” nomata de li, li kiel proparolanto de la popolo faris plej fortajn kriojn en siaj multaj eseoj kaj faris pinto-kontraŭpintan batalon kontraŭ la Kuomintang-aj reakciuloj. Liaj du novelaroj “Krioj” kaj “Vagado”, du prozpoemaroj “Sovaĝa Herbaro” kaj “Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero”, “Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj” kaj 14 esearoj riĉigis la trezorejon de la monda literaturo.

Lia ĉefverko — la satira novelo “La Ĉefa Historio de A-Q” estis tradukita en la lingvojn anglan, francan, rusan, japanan, germanan kaj Esperanton eĉ antaŭ lia morto, kaj per tio havigis al li renomon en la internacia literatura rondo. La fama franca verkisto Romain Rolland

donis altan takson al la nomita verko. Li diris: “Ĝi estas realisma arta majstraĵo klara kaj riĉa je satireco. . . La kompatinda figuro de A-Q restos longe en memoro de homoj.”

Post la forpaso de Lusin, aliaj landoj tradukis liajn verkojn unuj post aliaj. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la Fremdlingva Eldonejo de nia lando eldonis liajn verkojn en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, korea, japana, araba, hindia, urdua, bengala, taja kaj Esperanto. Nun, ĉu en landoj de Azio kaj Afriko, aŭ en landoj de Eŭropo kaj Ameriko kaj en Sovetunio troviĝas multaj liaj tradukitaj verkoj. Precipe menciinde estas, ke el tiuj landoj Japanio tradukis la verkojn de Lusin plej frue kaj plej multe, kaj “La Ĉefa Historio de A-Q” estas en 15 malsamaj tradukaĵoj. Pro tio A-Q jam fariĝis tipa heroo en la mondo kaj estis metita eĉ en la noma-

ron de la mondaj literaturaj herooj.

Lusin estis ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ elstara esploristo kaj tradukisto de la fremdlanda literaturo. Jam en frua tempo li ekkonis la gravan signifon de enkonduko de fremdlandaj literaturaĵoj en Ĉinion por vekti la ĉinan popolon, vigligi ĝian revolucionan spiriton, progresigi kaj krei novan literaturon de Ĉinio. Kiam li studis en Japanio, li jam komencis siajn literaturajn aktivecojn por tradukado de fremdlandaj literaturaĵoj. En 1903 li tradukis la novelojn de scienca fikcio de la franca verkisto Jules Verne "De la Tero al la Luno" kaj "Vojaĝo al la Centro de la Tero". En 1907 li verkis la unuan traktaton pri la fremdlanda literaturo "Pri la Potenco de Satanaj Poetoj", en kiu li konigis la vivon kaj verkojn de poetoj G. G. Byron, P. B. Shelley, A. C. Puŝkin, M. J. Lermontov, A. Mickiewicz kaj Petofi Sandor. En 1909 li redaktis kaj eldonis la libron "Elektitaj Noveloj el Eksterlando" en du volumoj. Ekde tiam preskaŭ ĉiujare li eldonis novajn librojn tiutemajn. Krome li redaktis kaj eldonis periodaĵojn de tradukitaj literaturaĵoj, ekz., "Tradukoj", por kulturi kaj helpi junajn tradukistojn. S-ro Lusin multe laboris super la ĉina manuskripto de la popola eposo de Petofi "Johano la Brava" tradukita el Esperanto. En 1935 li tradukis la romanon de la fama rusa verkisto Gogol "Mortintaj Animoj", kaj en la sekvinta jaro li finis tradukadon de ĝia dua parto en malsano nelonge antaŭ sia forpaso. Laŭ nekompleta statistiko li tradukis pli ol 200 verkojn de ĉ. 100 verkistoj de Rusio, Sovetunio, Japanio, Bri-

Lusin (maldekstre), brita verkisto George Bernard Shaw (meze) kaj eminenta ĉina edukisto Cai Yuanpei



tio, Francio, Germanio, Aŭstrio, Nederlando, Hispanio, Finnlando, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio, Bulgario kaj aliaj landoj. Inter liaj tradukaĵoj troviĝas romanoj, noveloj, poemoj, dramoj, fabeloj kaj verkoj pri literatura kaj arta teorio.

Frue antaŭ la Maj-kvara Movado de 1919 Lusin ludis la rolon de pioniro en la tradukado kaj esplorado de la fremdlanda literaturo. Li vivis en la duonfeŭda kaj duonkolonia Ĉinio, tial lia verkado, kiel li mem diris, "nepre estas por la homa vivo kaj ĝin reformi". Li tradukis kaj esploris, por akceli la batalon de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, fremdlandajn literaturaĵojn, kiuj spegulas la batalojn de aliaj

landoj kontraŭ malluma regado kaj por nacia liberigo kaj socia progreso. Li metis grandan atenton sur enkondukadon de la literaturaĵoj de la subpremataj malfortaj landoj, nacioj kaj popoloj. Ĉi-rilate li konigis al Ĉinio verkistojn de Rusio, norda kaj orienta Eŭropo. Li opiniis ankaŭ, ke oni "atentas tradukadon de eksterlandaj verkoj kaj prenas ilin kiel spegulon, fakte por akceli kaj kuraĝigi verkadon". Multaj verkoj de Lusin mem estis profunde influitaj de la fremdlanda literaturo.

Por fondi la teorion de la ĉina revolucia literaturo kaj arto, por liveri la teorion armilon al la literatura kaj arta movado de maldekstraj verkistoj, Lusin tradukis la verkojn "La Teorio de Arto" de G. V. Preĥanov kaj

6-A PLENA SESIO DE LA 11-A CENTRA KOMITATO DE KPC

La nomita sesio okazis en Beijing (Pekino) de la 27-a ĝis la 29-a de junio ĉi-jare.

La plena sesio aprobis la "Rezolucion pri Kelkaj Historiaj Problemoj de la Partio post la Fondiĝo de la Respubliko", kiu ĝuste resumis la gravajn historiajn eventojn de la Partio dum la pasintaj 32 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, precipe la kulturen revolucion, analizis la ĝustajn kaj erarajn gvidajn pensojn de la Partio en tiuj eventoj kaj juste taksis la historian pozicion de Mao Zedong en la ĉina revolucio. La rezolucio montris, ke kvankam Mao Zedong faris grandajn erarojn en la kultura revolucio, tamen, juĝate laŭ lia tuta vivo, lia kontribuo al la ĉina revolucio multe superis liajn

erarojn. Maozedongpenso estas valora spirita riĉaĵo por la ĉina Kompartio, kaj gvidos longtempe la agadon de la Partio.

La plena sesio konsentis la abdikon de Hua Guofeng pri liaj prezidantecoj de la Centra Komitato de la Partio kaj de ĝia Milita Komisiono kaj reelektis ĉefajn estraranojn de la centra gvidorgano: Hu Yaobang estis elektita kiel prezidanto de la Centra Komitato de la Partio, Zhao Ziyang (ĉefministro) kaj Hua Guofeng kiel ĝiaj vicprezidantoj, Deng Xiaoping kiel prezidanto de ĝia Milita Komisiono kaj Xi Zhongxun kiel membro de ĝia Sekretariejo.

60-A DATREVENO DE LA FONDIĜO DE KPC

La 1-a de la lasta julio estis la 60-a datreveno de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj ĝin solenis diversaj lokoj de Ĉinio. En la celebra mitingo en Beijing kun

partopreno de pli ol 10,000 personoj, prezidanto Hu Yaobang donis gravan paroladon. Li diris, ke la 60 jaroj de la Komunista Partio de Ĉinio estas tiaj, en kiuj ĝiaj membroj brave batalis unuj sekvante aliajn por la naci-liberiĝo de Ĉinio kaj la feliĉo de ĝia popolo, kaj ankaŭ tiaj, en kiuj ili travivis sennombrajn malfacilojn kaj zigzagojn kaj iris al multaj venkoj. Li emfazis, ke plej bona festado estas ĉerpi lecionon el la historio, unuiĝi kiel unu homo rigardante antaŭen kaj turni sian atenton al la neplenumita tasko. Li montris, ke la socialisma moderniga konstruado estas granda revolucio. Li postulis, ke la tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo daŭre disvolvigu la revolucionan spiriton por gajni la venkon de tiu granda revolucio kaj klopodu por konstrui Ĉinion en modernan, potencon socialisman landon kun prospereco kaj riĉeco, vasta demokratio kaj alta civilizacio.

"La Teorio de Arto" de A. V. Lunaĉarski. Krome li tradukis la romanon de A. A. Fadejev "Pereĝo" kaj redaktis la ĉinan tradukon de la romano de A.S. Serafimoviĉ "Fera Fluo".

En konigo de la fremdlanda literaturo Lusin, kiel Titano Prometeo, ŝtelis la fajron de la ĉielo por ĝin donaci al la homaro, li tiel diris, ke li "ŝtelis la fajron de aliaj landoj" "por lumigi la nokton de Ĉinio" kio ludis la rolon de liverado de municio al sklavoj en ribelado. Dank' al liaj klopodoj rapide naskiĝis kaj kreskis la revolucia literaturo de Ĉinio, kaj li faris gravajn kontribuojn en la batalo de la ĉina popolo

por la nacia revolucio kaj la liberiga afero. Samtempe tio plifortigis la amikan rilaton kaj kulturen interŝanĝon de la ĉina popolo kun alilandaj.

En sia tuta vivo li havis vastan rilaton kun verkistoj, ĉinologoj, literaturistoj, artistoj, ĵurnalistoj kaj eldonistoj de multaj landoj.

Frue en sia juneco, kiam li studis en Japanio kaj bone sciis la japanan lingvon, li tradukis verkojn de la famaj verkistoj Soseki Natsume, Saneatsu Mushanokoji, Ryunosuke Akutagawa, kaj skribis artikolojn en la japana lingvo por japanaj periodaĵoj. Pro tio li havis multajn kontaktojn kun japanaj verkistoj. En la komenco de la dude-

kaj jaroj, li publikigis sian unuan novelon "La Taglibro de Frenezulo", tiu verko baldaŭ ricevis altan takson de la japana ĉinologo Masaru Aoki. La lasta opiniis, ke Lusin estas "multesperiga verkisto". Lia "Historia Skizo pri Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj" ricevis atenton de la japana ĉinologo On Shionoja kaj pere de tio ili korespondis unu kun la alia kaj donacis librojn unu al la alia. Tiam li ofte kontaktis japanajn ĵurnalistojn en Beijing kaj persone tradukis sian novelon "La Kunikloj kaj la Kato" en la japanan lingvon por la semajna "Beijing-a Revuo". En 1927 Lusin konatiĝis en Guangzhou (Kantono) kun la japana ĵurnalisto Masayosi Jamagami, kaj tiu poste fariĝis unu

el la tradukintoj de lia novelo "La Ĉefa Historio de A-Q". En 1927 li revenis de Guangzhou al Shanghai, kaj konatiĝis kaj amikiĝis kun Kanzo Uĉiyama, la mastro de Uĉiyama-librejo. Ekde tiam, pere de s-ro Kanzo Uĉiyama multaj japanaj verkistoj kaj kulturaj personoj, en vizito de Shanghai aŭ tra ĝi al alia loko, intervidiĝis kun Lusin. En 1931 juna japano Wataru Masuda venis al Shanghai por studi. Dank' al helpo de la japana verkisto Haruo Sato kaj s-ro Kanzo Uĉiyama, Lusin konatiĝis kun Wataru Masuda kaj persone rakontis al li la enhavojn de la "Skizo pri la Historio de Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj", "Krioj" kaj "Vagado", kaj poste li fariĝis fama japana esploristo kaj tradukinto de verkoj de Lusin.

En la dudekaj kaj tridekaj jaroj Lusin havis multajn kontaktojn kun verkistoj de Eŭropo kaj Ameriko. Frue li starigis


amikan rilaton kun la rusa blinda verkisto Eroŝenko kaj tradukis liajn fabelon kaj dramon. Kvankam li ne havis rektan kontakton kun siaj samtempaj famaj verkistoj de la mondo M. Gorkij kaj Romain Rolland, tamen ili zorgis unu la alian. Li tradukis la "Fabelo de Rusio" de Gorkij kaj recenzon de japana verkisto pri Romain Rolland. La lasta donis tre altan takson al la novelo de Lusin "La Ĉefa Historio de A-Q", kaj Gorkij iam invitis s-ran Lusin al Sovetunio por kuracado. En 1933 Lusin intervidiĝis en Shanghai kun la angla dramisto George Bernard Shaw kaj la franca verkisto Paul Vaillant-Couturier, kiu partoprenis en la Konferenco de la Tutmonda Komitato kontraŭ Imperiisma Milito. Lusin havis pli multajn rilatojn kun usonaj verkistoj kaj

jurnalistoj, precipe kun Agnes Smedley. Ŝi venis al Shanghai en 1929 kaj formis profundan amikecon kun Lusin. Ŝi tradukis kaj publikigis ekster Ĉinio la artikolojn de Lusin, kiuj estis malpermesitaj aperi sub la reĝimo de la Kuomintang-aj reakciuloj. En 1933 Edgar Snow konatiĝis kun Lusin. Helpate de Lusin, Snow tradukis liajn novelojn kaj redaktis la nuntempan ĉinan novelaron "Vivanta Ĉinio". En 1932, kiam Harold Isaacs fondis en Shanghai la anglan periodaĵon "Ĉina Forumo", Lusin liveris al li temojn por liaj redaktado kaj tradukado de la ĉina novelaro "Sandalaj Piedoj" kaj verkis por ĝi la aŭtobiografion kaj la enkondukon. En 1932 li intervidiĝis kun la ĉeĥoslovaka literaturisto Egon Erwin Kisch. En 1936 li korespondis kun ĉinologo de Ĉeĥoslo-

Lusin donacas al laboristo la romanojn "Pereĝo" kaj "Fera Fluo".

(Lignogravuraĵo)

Lusin inter ĉinaj kaj japanaj lignogravuristoj



vakio Jaroslav Prušek, kaj skribis la antaŭparolon por la novelaro “Kriroj” tradukita de li. En ĝi estas jenaj vortoj: “Plej bone estas, ke la homoj vivas en interkompreno kaj zorgas unu alian, tamen, nur literaturo kaj arto kondukas al tiu plej glata vojo. Estas bedaŭrinde, ke tiuj, kiuj iras tiun vojon, ĉiam estas tre malmultaj.” Lusin ja estis unu el ili, tamen tre grava unu.

Lusin multe kontribuis por la monda literaturo, tial li okupis gravan lokon en tiu rondo. En la nuna mondo nemalmultaj eruditoj studas la vivon kaj verkojn de Lusin, kaj en Japanio eldoniĝis des pli multe da verkoj, artikoloj kaj materialoj pri li. Ankaŭ en gravaj enciklopedioj kaj literaturaj vortaroj de diversaj landoj troviĝas artikoloj pri Lusin, inkluzive de la artikoloj pri “La Ĉefa Historio de A-Q”. La sovetunia verkisto Fadejev, kiu ricevis Stalin-premion de la literaturo, diris: “Lusin apartenas al la vicaro de verkistoj kiel brilantaj lampoj de la homaro. . . Lusin estas la fiero de la ĉina literaturo kaj famulo de la monda literaturo.” La gvatemala verkisto kaj poeto Miguel Asturias, kiu ricevis Nobel-premion de la literaturo, diris: “La verkistoj de Latin-Ameriko ĉerpis sennombrajn utilojn el la vivo kaj verkoj de Lusin. . . La riĉa kreivo de liaj verkoj brilas ne nur super la ĉina popolo, sed ankaŭ super la tuta mondo.”

** La aŭtoro estas fama ĉina esploristo pri la fremdlanda literaturo, tradukisto, konsilanto de la Ĉina Asocio de Esplorado pri Lusin, konsilisto de la Fako pri Lusin de la Bejing-a Lusin-muzeo kaj prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.*



Lusin (en Shanghai, 1928)

LUSIN KAJ

ESPERANTO

de HOU ZHIPING

POR la esperantistaro de Ĉinio, la nomo de Lusin estas tre konata kaj intima ne nur pro tio, ke li estis granda literaturisto, sed ankaŭ pro tio, ke li fervore subtenis Esperanton. Lia klara starpunkto pri Esperanto ege favoris al la ĉina Esperanto-movado.

FERVORA SUBTENANTO

Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion en la komenco de la kurranta jarcento. Tiutempe la politiko, ekonomio kaj kulturo de Ĉinio estis tre postgigantaj, kaj tio estis tre malfavora al disvastigo de Esperanto. Sed post la Revolucio de 1911, dank’ al propagando kaj rekomendo de iuj intelektuloj, Esperanto disvastiĝis unue en Shanghai, Bei-

jing. Guangzhou (Kantono) kaj iuj aliaj grandaj urboj. En la Nov-kultura Movado de la 4-a de Majo, tre influa progresema gazeto “Nova Junularo” estigis polemikon por Esperanto, kio vekis atenton de diversaj rondoj de la ĉina socio kaj antaŭenpuŝis la Esperanto-movadon de Ĉinio.

La polemiko en la “Nova Junularo” daŭris de 1916 ĝis 1919. La oponentoj opiniis, ke Esperanto estas “senviva private fabrikita lingvo” kaj “havas nek longan historion nek nacian spiriton”, kaj konkludis, ke Esperanto nelonge ekzistos.

La absurdajoj de tiuj homoj indignigis Qian Xuanton, Wu Zhihui, K.Ĉ. Sun, Ou Shengbai

k.a., kaj tiuj publikigis artikolojn en la gazeto por kontesti iliajn argumentojn.

En tiu ĉi polemiko Lusin senhezite staris ĉe Esperanto-movado. En sia artikolo "Rivertransiro kaj Vojkonduko" li tiel skribis: Mi aprobas Esperanton, kaj "la motivo de mia aprobo baziĝas sur mia kredo, ke la homaro havos estonte ian komunan lingvon. Jen la kialo. Sendube mi ne povas aserti, ĉu la estonta universala lingvo estos Esperanto. Ne estas antaŭdireble, ĉu ĝi estos reformita Esperanto, pli perfekta, aŭ ia tute alia, sed pli bona. Sed nun ekzistas sole Esperanto, kaj oni povas lerni ĝin unue. Nun Esperanto troviĝas en rudimenta stadio, kaj por diri metafore, antaŭ ol elfari motorŝipon oni povas veturi per pirogo. Se oni antaŭvidas, ke ili havos estonte motorŝipon, kaj ne volas fari pirogon aŭ veturi per pirogo, do ili ne povos inventi motorŝipon, nek transiri riveron."

AMIKECO INTER LUSIN KAJ EROŜENKO

Vasilij Eroŝenko estis fama rusa esperantisto kaj verkisto. En majo de 1921 li estis arestita kaj poste proskribita de japana aŭtoritato. Ne povinte reveni al sia patrio, li venis al Shanghai laŭ la invito de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Lian malfeliĉon tre simpatiis Lusin. Li decidis diskonigi la verkojn de Eroŝenko al la ĉina popolo. Li tradukis parton de la verkoj de Eroŝenko kaj prezentis lin al s-ro Cai Yuanpei, direktoro de Beijing-universitato.

En marto de 1922, Eroŝenko akceptis la inviton de Cai kaj ekinstruis Esperanton en la

universitato. Tiam li loĝis ĉe Lusin. Ili kunestis ĉ. 10 monatojn. Poste Lusin skribis la novelon "La Komedio de la Anasoj" por memori lin.

Vivante en Beijing, krom instruado de Esperanto, Eroŝenko ankaŭ faris prelegojn en superaj lernejoj. Kelkfoje liaj prelegoj speciale eksplikis pri Esperanto. Li tre ŝatis partopreni Esperantajn aktivadojn. Julion de 1922, en la nomo de la Pekina Esperanto-Asocio, Eroŝenko partoprenis en la 14-a Universala Kongreso de Esperanto. Loĝante kune kun Eroŝenko, Lusin havis pli da ŝancoj por koni Esperanton. Li trovis, ke Esperanto, belsona kaj vivipova, estas tre utila instrumento por interkompreniĝo kaj kultura interfluo de diverslandaj popoloj. De tiam Lusin montris pli grandan fervoron en subteno al Esperanto-movado.

INSTRUADO EN LA PEKINA ESPERANTA KOLEGIO

En aŭgusto de 1923, Cai Yuanpei, Wu Zihui, Li Shizeng k.a. establis en Beijing la Esperantan Kolegion por kulturi esperantistojn kaj disvastigi Esperanton. Antaŭ la inaŭguriĝo de la lernejo Lusin estis invitita al ĝi por lekcio pri "Skizo pri la Historio de Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj". Tiam Lusin instruis kumule en Beijing-universitato, la Beijing-a Normala Universitato kaj la Beijing-a Virina Supera Normala Lernejo. Kaj cetere Lusin devis disponi grandan parton de sia tempo al verkado kaj tradukado. Malgraŭ multaj laboroj ĝis super la ŝultroj, li respondis al la petantoj: "Laŭ mia okupateco, estas tre malfacile por mi akcepti vian peton. Sed vi estas dis-


vastigantoj de Esperanto kaj mi devas doni helpon. Sed nun mi ne povas certigi vin, en kiu semajntago mi povos doni lecionon. Sed mi sciigos vin post 1 aŭ 2 tagoj, en kiuj mi planas dispozicion de mia tempo." En la sekvanta tago Lusin vere sendis certigon al la lernejo, ke li donos du lecionojn ĉiusemajne.

La financo de la lernejo frontis malfacilon kaj ne estis anticipite interkonsentita la rekompenco por la leciondonado de Lusin. Iom poste la lernejo decidis pagi al Lusin ĉiumonate 15 arĝentajn dolarojn. Sed Lusin rifuzis tion. Li diris al la sendito de la lernejo: "Nun la lernejo frontas financan malfacilon. Mi bone scias tion kaj ne devas akcepti la rekompencon. Vi reportu la monon. Konsciente tian cirkonstancon de Esperanto, esperantistoj devas kontribui al Esperanto, kaj nur tiel Esperanto povos esti disvastigita. Malgraŭ ke mi nun ne povas skribi eĉ unu vorton de Esperanto, mi subtenas la movadon, ĉar mi aprobas Esperanton." Sed la sendito neniel konsentis reporti la monon, kaj Lusin vole nevole akceptis la sumon.

BONA AMIKO DE ESPERANTISTOJ

Foliumante taglibrojn aŭ verkojn de Lusin, oni facile rimarkis, ke Lusin kontaktiĝis kaj korespondis kun multaj esperantistoj, kaj ke lia subteno al la Esperanta movado estas tre diversa.

En junio de 1923 Lusin persone donacis monoferon al la esperanta lernejo de Beijing; post tio li plurfoje monhelpis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion kaj la Esperantan gazeton "La Mondo" eldonitan en Ŝanhajo.



Lusin (la dua de maldekstre) kaj rusa blinda poeto-esperantisto V. J. Eroŝenko (la kvara de maldekstre) k.a. (en la 15-a de aprilo 1923)

Januaron de 1927 Lusin venis de Xiamen (Amoy) al Guangzhou. Kvankam aferoplena, li tamen ĉeestis foje esperantistan kunsidon kaj improvizis paroladon subtenantan Esperanton.

Pli kortuŝa estis lia prizorgo al tradukado de Esperantaj literaturajoj. Instruante en la Pekina Esperanta Kolegio, li instigis la lernantojn traduki Esperantajn literaturaĵojn opiniante, ke tio estas unu el la fundamentaj laboroj por la disvolviĝo de Esperanto. Li subtenis Hujucz, Zhou Zuoren, Wang Luyan, Sun Yong k.a. traduki esperantajojn. Redaktante diversajn literaturajn gazetojn, kiel ĉefredaktoro li disponigis paĝojn al esperantaj tradukaĵoj.

Sun Yong estis poŝtisto. Post memlernado de Esperanto li tradukis epepeon "Johano la Brava" de la fama hungara poeto Petofi Sandor. Li sendis la manuskriptojn al Lusin, kaj tiu

lasta serioze reviziis ilin kun la germanlingva traduko kiel referenco kaj samtempe kun tio iradis tien kaj ĉi tien por trovi eldoniston. Post klopodado de du jaroj la tradukaĵo estis eldonita de iu librejo. Lusin antaŭpagis monon por platofarado kaj kiam la eldonisto redonis parton de la antaŭpago, li donis la sumon al la tradukinto kiel honorarion. La fervora helpo de Lusin donis grandan kuraĝigon al Sun Yong, kaj tiu poste elesperantigis "40 Poemojn de Petofi Sándor", la romanon de A.S. Puŝkin "Kapitanfilino" kaj aliajn verkojn.

VALORAJ LASTAJ VORTOJ

En la tridekaj jaroj de la kuiranta jarcento, la ĉinaj esperantistoj uzis Esperanton en la naciliberiga movado kaj la progresema kultura movado kaj multe disvastigis Esperanton enlande. Por akiri pli da sukcesoj, la redakcio de "La Mondo" sendis

leterojn al ĉinaj verkistoj por kolekti iliajn opiniojn pri Esperanto. Tiam Lusin estis turmentata de grava malsano kaj ĉiutage sputis sangon. En grava malsano, Lusin respondis kun granda peno al "La Mondo". Li tiel skribis en la letero:

"Mi estas mem konvinkita, ke mi aprobas Esperanton. Tio estas de tre longe, probable de 20 jaroj, tamen laŭ mia nuna memoro la motivoj ŝajnas tre simplaj:

1. ĉar ĝi povas unuigi ĉiujn homojn en la mondo — precipe la subprematajn;
2. pro propra profesio, eble ĝi povas servi al interkonigo de literaturoj;
3. pro tio, ke mi vidas kelkajn esperantistojn, kiuj estas super la hipokritaj egoistoj.

Poste mi ne plu pensis profunden, tial la opinio restas ne

pli ol tio. Ofte mi estas tia: asertante ion bona, mi ne povas eldiri multon pri la motivoj. Sed efektive, ĝi finfine pruvos, ke mia juĝo estas ĝusta.”

La respondo de Lusin publikigita en “La Mondo” multe inspiris la tutan esperantistaron de Ĉinio. Sed estis granda malfermo, ke en la sama monato en kiu publikigis la letero, por ĉiam forpasis Lusin, kaj lia respondo fariĝis por la ĉinaj esperantistoj tre valora heredaĵo.

PLEJ BONA MEMORIGAĴO

Antaŭ la forpaso de Lusin, liaj verkoj “Vera Historio de A-Q” kaj parto de liaj eseoj jam estis tradukitaj en Esperanton. Post

lia forpaso, ĉinaj esperantistoj decidis traduki liajn novelojn. En 1939, la redakcioj de “Voĉoj el Oriento” kaj “Orienta Kuriero” kune eldonis la libron “Elektitaj Noveloj de Lusin” en Esperanto. Samtempe kun tio Venlo Fon esperantigis la novelojn “Kong Yiji” kaj “Morto”, kiuj publikigis en la “Literatura Mondo” eldonita en Hungario.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ĉinaj esperantistoj tradukis en Esperanton pli multajn verkojn de Lusin. En la unuaj jaroj de la kvindekaj jaroj la Ŝanhaja Esperantista Ligo eldonis prozpoemaron “Sovaĝa Herbaro”. Post tio la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la

Fremdlingva Eldonejo unu post alia eldonis la librojn “Elektitaj Noveloj de Lusin”, “Noveloj de Lusin”, “Sovaĝa Herbaro” (reviziita) kaj bildlibron “Benopeta Ofero”. La gazeto “El Popola Ĉinio” publikigis artikolojn pri la vivo de Lusin je dek fojoj kaj dekelkajn verkojn de tiu granda verkisto. Ĉijare por memori la 100-an datrevenon de lia naskiĝo kaj la 45--an datrevenon de lia forpaso, oni eldonos lian esearon “Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero” en Esperanto.

Por la ĉinaj esperantistoj, traduki pli da verkoj de Lusin estas nerifuzbla devo kaj estas ankaŭ plej signifa memorigo al tiu granda verkisto.

Parto de la Esperantigitaj verkoj de Lusin



Lusin (la meza en la fronto) kaj Beijing-aj esp-istoj (en la 23-a de majo 1922)





Lusin (en Shanghai, 1934)



La privata lernejo "Sanwei Shuwu" en Shaoxing de Zhejiang-provinco, kie Lusin studis en sia knabeco

LUSIN:

Aŭtobiografio

MI naskiĝis en 1881 en Zhou-familio en Shaoxing-gubernio de Zhejiang (Ĝegiang)-provinco. Mia patro estis klerulo, mia patrino vilaĝanino kun familia nomo Lu. Dank' al la memlernado ŝi akiris kapablon legi. Laŭdire, en mia infanaĝo mia familio havis 40-50 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da rizkampoj, kaj vivis ne malfacile. Sed en mia 13-jara aĝo, granda ŝanĝo okazis al mia familio, kiu perdis preskaŭ ĉion sian. De tiam mi devis vivi ĉe mia parenco kaj kelktempe estis rigardata kiel almozpetanto. Sekve mi decidis reveni al mia hejmo. Tiam mia patro estis grave malsana kaj

mortis post pli ol tri jaroj. Poste, mi ne havis eĉ unu moneron por pagi mian lernadon; mia patrino preparis por mi iom da vojaĝmono, ke mi serĉu lernejon, kiu ne postulas lernokoston. Mi ne volis fariĝi helpoficisto aŭ komercisto, ĉar tio estis la vojo sekvata de malsupreniĝintaj kleruloj de mia vilaĝo.

Kiam mi estis 18-jara, mi vojaĝis al Nanĵing (Nankino), sukcese eniris en la Jiangnan-an Mararmean Lernejon kaj eklernis en ĝia administracia fako. Post ĉ. duonjaro mi forlasis tiun lernejon kaj eklernis minekspluatadon en la Minekspluata kaj Fervoja Lernejo. Post kiam mi finis la lernadon, mi estis


sendita al Japanio por studo. Sed kiam mi finis mian lernadon en la lernejo Hongwen Shuyuan en Tokio, mi decidis lerni medicinon, ĉar mi ekkonis ke nova medicino multe hepis la reformadon de Japanio. Kaj tiam mi vizitis Medicinan Kolegion en Sendai kaj lernis tie du jarojn. En tiu tempo iris la rusa-japana milito, mi vidis hazarde sur ekrano ke iu ĉino estis buĉota pro sia spionado, tial mi pensis ke ne estas grave kuraci kelkajn personojn en Ĉinio, sed necesas vasta movado. . . por iniciati, antaŭ ĉio, novan literaturon. Mi do forlasis mian lernadon, venis denove al Tokio kaj faris kun kelkaj amikoj malgrandajn pla-

nojn, sed ĉiuj ĉi tiuj malsukcesis sinsekve. Mi deziris iri al Germanio kaj ankaŭ tio malsukcesis. Fine mi revenis en Ĉinion pro tio, ke mia patrino kaj kelkaj aliaj esperis mian ekonomian helpon. Tiam mi havis 29 jarojn.

Tuj post mia reveno al la patrolando mi fariĝis instruisto de fiziologio kaj kemio en la dugrada instruista lernejo de Zhejiang en Hangzhou (Hangĝoŭ). En la sekvanta jaro mi akceptis la oficon de ĉefinstruisto de la Shaoxing-a Mezlernejo. En la tria jaro mi forlasis tiun lernejon, sed ne trovis okupon, tiam mi volis labori kiel redaktoro-tradukisto en iu eldonejo, fine mi estis rifuzita. Baldaŭ eksplodis la revolucio, kaj post la liberigo de Shaoxing mi fariĝis estro de la Primara Instruista Lernejo. Tiam la revolucia registaro fondiĝis en Nanjing. Laŭ la invito de la ministro de la Ministerio de Edukado, mi iris al Nanjing

por funkcii kiel oficisto de la ministerio; poste mi transloĝiĝis al Beijing (Pekino) kune kun la ministerio, kaj tiam mi funkciis kiel lektoro de la fakultato de la ĉinaj lingvo kaj literaturo de la Beijing-a Universitato, la Beijing-a Altgrada Instruista Lernejo kaj la Beijing-a Altgrada Instruistina Lernejo. En 1926 kelkaj kleruloj denuncis min al la registaro de Duan Qirui kun kalumnio, por ke ĝi arestu min. Dank' al helpo de mia amiko Lin Yutang, mi fuĝis al Xiamen kaj fariĝis profesoro de la Xiamen-a Universitato. En decembro mi foriris de tiu loko al Guangdong kaj fariĝis profesoro de la Universitato "Sun Jatsen". En la sekvanta aprilo mi ekŝiĝis, kaj en septembro mi forlasis Guangdong kaj iris al Shanghai (Ŝanhajo), kie mi vivis ĝis nun.


Dum mia lernado eksterlande mi publikigis kelkajn krudajn artikolojn nur en gazeto. En 1918,



Lusin, lia edzino Xu Guangping kaj ilia fileto Haiying (en 1933)

mi unuafoje uzis la plumnomon Lusin kaj verkis novelon, kiu estis publikigita en la revuo "Nova Junularo" sub la konsilo de mia amiko Qian Xuantong. Mi

(Daŭrigata sur p. 51)



Lusin donis paroladon en 1932 en la Beijing-a Altgrada Instruista Lernejo.

Lusin (la tria de dekstre) kaj Suzuki Daisezu kaj aliaj japanoj antaŭ la domo de Uchiyama Kanzo (en 1934)



Lusin kaj Shanghai-aj ligno-gravuristoj en intima interparolo en 1936

“Mi Neniam Ĉesos Batali!”



Sinjoro Fuĝino

Ilustraĵoj de LI SHIJIE

ANKAŬ en Tokio same tiel estis. Kiam la sakuroj de Ueno-parko pompe floris, ili vidiĝis en malproksimo vere kiel rozaj nuboj leĝeraj, sed sub la floroj vi ĉiam povis trovi arope rapidkursajn “studentojn el King-imperio”. Iliaj longaj harplektaĵoj volviĝis sur la kapoj kaj tiel alten puŝis la supron de iliaj studentaj kepoj ke ili formiĝis Fuĝi-montoj. Estis ankaŭ aliaj, kiuj malplektis la harplektaĵojn kaj aranĝis la hararon plata sur la kapo; kiam la kepoj estis demetitaj, la hararo montriĝis brile glata kiel la hartuberoj de knabinoj, krome, ili emis moveti la kapon tien kaj reen. Vere ĉarme.

En la pordista ĉambro de la Societo de Ĉinaj Studentoj ĉiam troviĝis kelkaj libroj por vendo, kaj estis inde ĝin viziti iam kaj iam. En la antaŭtagmezo vi povis iom sidi en la fremdstilaj ĉambroj interne. Sed en la vespero la planko de iu ĉambro ofte tondre bruadis, kaj la polvo ĥaose disflugis en la tuta domo. Demandite bone informita persono respondis: “Oni lernas danci.”

Ĉu ne estus bone iri aliloken por pririgardi?

Do mi veturis al la Medicina Kolegio en Sendai. Foririnte de

Tokio, post nelonge mi atingis stacion nomatan Nippori. Mi ne scias kial, sed nun mi ankoraŭ memoras la nomon. Krom tiu, mi memoras nur Miton, kie Zhu Shunshui, kiu estis lojala al la renversita Ming-dinastio, mortis en sia ekzilo. Sendai estis urbo ne granda, kie estis tre malvarme dum vintro, kaj ankoraŭ neniu ĉina studento troviĝis tie.

Verŝajne “kio rara, tio kara”. Transportite al Zhejiang la brasiko de Beijing estas pendigita kun la radiko supren en fruktvendejo per ruĝa ŝnureto ligita al ĝia radiko kaj estas honore nomata “Shandong-a Legomo”. Kiam la aloo, sovaĝa kreskaĵo en Fujian, atingas Beijing, ĝi estas tuj venigita en forcejon kaj ricevas la belan nomon “Drak-langa Orkideo”. En Sendai ankaŭ mi ĝuis tian favoron. Ne nur la lernejo nuligis sian lernopagan postulon al mi, sed ankaŭ kelkaj el la oficistoj montris apartan zorgon pri miaj manĝado kaj loĝado. Komence mi loĝis en hotelo apud prizono, kie, kvankam estis jam sufiĉe malvarme en la frua vintro, troviĝis ankoraŭ tre multe da kuloj. Sekve, mi kovris mian tutan korpon per litkovrilo kaj ĉirkaŭvolvis la kapon per mia



S-ro Fuĝino

vesto, elmontrante nur la du naztruojn por spiri. En tiu ĉi regiono skuata de kontinua spirado la kuloj ne povis trovi lokon por piki, kaj tiel mi fine povis dormi kviete. Ankaŭ la manĝaĵoj ne estis malbonaj. Sed iu el la oficistoj opiniis ke, la hotelo preparis manĝaĵojn ankaŭ por malliberuloj, tial estas nekonvene ke mi loĝu tie, kaj li admonis min fojon post fojo. Kvankam mi opiniis la fakton ke la hotelo kuiris manĝaĵojn por malliberuloj neniom konceranta min, sed mi ne povis ignori lian komplezon, do mi devis serĉi alian loĝejon konvenan por mi. Kaj mi transloĝiĝis al alia hotelo, kiu estis tre malproksima de la prizono, sed bedaŭrinde tie mi ne povis ne trinki ĉiutage tar-tuberan supon kiun engluti estis malfacile por mi.

Ekde tiam mi vidis multajn novajn instruistojn kaj aŭskultis multajn novajn lekciojn. La anatomian kurson instruis du profesoroj. Ostologio venis la



“Ĉu vi povas fari notojn pri miaj lekcioj?”

unua laŭ ordo. Tiam eniris sunbruna kaj malgrasa instruisto kun lipharoj kaj okulvitroj, kaj sub sia brako li portis stakon da libroj grandaj kaj malgrandaj. Metinte la librojn sur la tablon, li prezentis sin mem al la studentoj en takto lanta sed klara:

“Mia nomo estas Fuĝino Genkuro. . .”

Kelkaj studentoj en la malantaŭaj vicoj ekridis. Poste li lektiis pri la historio de la disvolviĝo de anatomio en Japanio. Tiuj libroj, grandaj kaj malgrandaj, estis la verkoj pri tiu scienco eldonitaj ekde la komenco ĝis tiam. Unue aperis kelkaj libroj malnovtype binditaj, kaj ankaŭ kelkaj ĉinaj tradukoj re-

presitaj en Japanio. Do iliaj traduko kaj studo pri la moderna medicino komenciĝis ne pli frue ol en Ĉinio.

Tiuj, kiuj sidis en la malantaŭaj vicoj kaj ridis, estis studentoj kiuj malsukcesis en la lasta lernoĵaro kaj devis denove lerni kiel postrestintoj. Post unujara vivo en la kolegio ili jam konis tre multe da epizodoj kaj rakontis al la novaj studentoj la historion de ĉiu profesoro. Tiu s-ro Fuĝino, laŭ ilia diro, sin vestis tre senzorgeme kaj iam eĉ forgesis porti kravaton. En vintro li ĉiam portis malnovan surtuton kaj aspektis tiel povra ke foje kiam li eniris trajnon, la konduktoro suspektis lin kiel ŝteliston kaj atentigis ke ĉiuj pasaĝeroj estu singardaj.

Eble ili diris la veron; ja mi mem vidis, ke li foje eniris la klasĉambron sen kravato.

Post unu semajno, versaĵne en sabato, li sendis sian asistanton por voki min. Atinginte la laboratorion, mi trovis lin sidanta inter skeletoj kaj multe da apartaj kranioj—li estis esploranta kraniojn tiutempe kaj pli poste publikigis disertajon pri tiu temo en la kolegia revuo.

“Ĉu vi povas fari notojn pri miaj lekcioj?” li demandis.

“Jes, iomete.”

“Montru ilin al mi!”

Mi donis al li la notojn kiujn mi faris. Li prenis ilin kaj redonis al mi du aŭ tri tagojn poste, kun la instrukcio ke ekde tiam mi montru miajn notojn al li ĉiusemajne. Kiam mi reprenis mian notkajeron kaj malfermis ĝin, mi estis ege surprizita, kaj samtempe mi sentis kaj maltrankvilon kaj dankon. Ĉar miaj notoj estis jam de la komenco ĝis la fino kompletigitaj kaj korektitaj per ruĝa inko. Ne nur estis aldonitaj multaj partoj kiujn mi ellasis, sed ankaŭ ĉiun gramatikan eraron li zorgeme korektis. Tio daŭris ĝis kiam li finis la kursojn kiujn li prirespondecis: ostologion, angiologion kaj neŭrologion.

Bedaŭrinde tiam mi estis tre maldiligenta en lernado kaj kelkatempe ankaŭ tre obstina. Mi ankoraŭ memoras, ke s-ro Fuĝino foje vokis min al sia laboratorio kaj vidigis al mi diagramon en mia notkajero pri la angioj de malsupra brako. Montrante al tio, li diris afable:

“Rigardu, jen vi translokis iomete tiun angion. Nature, dank’ al tiu movo tio aspektas pli bele; sed anatomia diagramo

ne estas belartaĵo kaj ni ne rajtas ŝanĝi la formon de realaj objektoj. Nun mi jam korektis por vi, estonte vi devos kopii ekzakte laŭ tiu sur la nigra tabulo.”

Tamen mi estis ankoraŭ ne konvinkita. Dum mi buŝe jesis, mi pensis en mi:

“Mia diagramo estis bone desegnita. Parolante pri la veraj faktoj, kompreneble mi povas memori ilin.”

Post la lernojara ekzameno mi veturis al Tokio kaj tie pasigis la tutan someron. Kiam mi revenis al la Kolegio en la frua aŭtuno, la rezultoj jam delonge publikigis. Sur la listo de pli ol cent studentoj mi estis en la mezo, kaj mi apenaŭ sukcesis. Ĉifoje la kursoj de s-ro Fuĝino estis anatomia praktikado kaj topografia anatomio.

Post proksimume unu semajno da anatomia praktikado, li ree vokis min kaj ĝojmiene diris ankoraŭ laŭ tre klara takto:

“Ĉar oni diris, ke la ĉinoj havas grandan respekton al spiritoj, tial mi ege timis, ke vi ne volos disseki kadavrojn. Nun mi fine trankviliĝis, ĉar tio ne estas vero.”

Sed en esceptaj okazoj li tre min embarasis. Li aŭdis, ke ĉinaj virinoj vindas siajn piedojn, sed ne sciis pri la detaloj, sekve li demandis min kiel oni tion faras kaj kiel la piedostoj fariĝas abnormaj. Li diris suspire: “Mi devas vidi tion por kompreni, kio tio finfine estas.”

Iutage, la administrantoj de la studenta ligo de mia klaso venis al mia loĝejo kaj volis prunti miajn lekcio-notojn. Mi serĉis kaj donis tion al ili, sed

ili nur trafolumis la kajerojn kaj ne forportis ilin. Tamen, tuj post ilia foriro, poŝtisto alportis tre dikajn leteron. Mi malfermis ĝin. La unua linio legiĝis jene:

“Vi pentu!”

Tio estis verŝajne citaĵo el la Nova Testamento, sed ĵus uzita de Tolstoj. Tiam ĝuste iris la Japano-Rusa Milito, kaj Grafo Tolstoj skribis al la rusa caro kaj la japana mikado, komencante sian leteron per tiu frazo. La japanaj ĵurnaloj forte riproĉis lian arogantecon, kaj ankaŭ la patriotaj junuloj tre indignis pro tio, tamen ili jam estis delonge influataj de li senkonscie. La cetero de la letero temis pri tio, ke la demandoj de la anatomia ekzameno en la lasta lernojaro estis markitaj de s-ro Fuĝino en miaj notkajeroj, tiel mi sciis ilin anticipe kaj nur dank’ al tio mi povis trapasi la ekzamenon. La letero estis anonima.

Nur tiam mi ekmemoris pri la incidento antaŭ kelkaj tagoj. Ĉar estis okazonta kunveno de nia tuta klaso, la administranto skribis, sur la nigra tabulo, anoncon kiu finiĝis per la frazo: “Bonvole ĉestu ĉiuj sen tralikiĝo” kaj apud la vorto “tralikiĝo” estis aldonita cirklo. Kvankam mi sentis tiam, ke tiu cirklo estas ridinda, sed mi tute ne elflaris la mokon. Nun mi ekvidis, ke ankaŭ tiu vorto mokaludis min kvazaŭ dirante ke mi antaŭe kaptis la demandojn pro tralikiĝo flanke de nia instruisto.

Mi raportis tion al s-ro Fuĝino. Ankaŭ kelkaj samklasaj studentoj, kiuj bone konis min, sentis grandan indignon, kaj ni kune protestis al la administrantoj pro ilia impertinenteco en la

ekzameno de miaj notkajeroj sub preteksto kaj postulis, ke ili publikigu la rezulton de ilia esploro. Fine la klaĉo malaperis. La administrantoj pene provis per ĉiu rimedo repreni tiun anoniman leteron kaj en la fino mi redonis al ili tiun Tolstojeskan leteron.

Ĉinio estas malforta lando, sekve la ĉinoj estas nature senkapabluloj. Se ĉino sukcesis akiri pli ol sesdek poentojn, tion rezultigis certe ne la propra kapablo, do ilia suspekto ne estis senbaza. Sed tuj poste la sorto destinis al mi spekti ekzekuton de ĉinoj. En nia dua lernojaro ni havis novan kurson — bakteriologion, kaj la formoj de bakterioj estis ĉiam montritaj per projekciilo. Se la montrado de unu parto finiĝis antaŭ ol la lecionhoro, tiam oni projekciis kelkajn filmojn pri kurantaj aferoj. Kompreneble ili ĉiuj temis pri la venko de Japanio super Rusio, sed estis ankaŭ scenoj pri iuj ĉinoj, kiuj agis kiel spionoj por Rusio kaj estis kaptitaj de la japana armeo kaj kondukata al pafmortigo. La ĉirkaŭrigardantoj estis ĉinoj, kaj en la klasĉambro troviĝis interalie ankaŭ mi.

“Vivu!” La studentoj ĥore aklamis kun manklakoj.

Tia aklamo okazis ja dum montrado de ĉiu filmo, sed por mi tiu ĉi aklamo estis aparte pika al la oreloj. Poste, kiam mi jam revenis Ĉinion, mi vidis nenionfarantojn spektantaj la ekzekuton de krimuloj kaj ankaŭ aklamantaj kvazaŭ en ebrio. Ho ve, oni ja povas fari nenion kontraŭ tio! Tamen, en tiu tempo kaj ĉe tiu loko mia opinio ŝanĝiĝis.

Je la fino de la dua lernojaro, mi vizitis s-ron Fuĝino kaj diris

al li, ke mi ne daŭrigos mian studon pri medicino kaj foriros de Sendai. Lia mieno aspektis iom trista, kvazaŭ li volus diri ion, sed fine nenion.

“Mi volas studi biologion, do, kion vi, s-ro, instruis al mi, estos ankoraŭ utila.” Fakte mi tute ne intencis studi biologion, sed, vidante lian malĝojon, mi mensogis por lin konsoli.

“Mi timas, ke lecionoj de anatomio kaj similaj por medicinaj studentoj ne donos ian helpon al vi en la studo de biologio.” Li diris kun veo.

Kelkajn tagojn antaŭ mia foriro li vokis min al sia hejmo, donacis al mi foton, sur kies dorso li surskribis “Adiaŭ” kaj esprimis sian esperon, ke mi donacu al li la mian. Sed, ĉar tiam mi ne havis propran foton, li diris, ke mi sendu tion al li kiam mi estos fotita kaj skribu al li de tempo al tempo pri mia stato post la disiĝo.

Post mia foriro de Sendai mi ne estis fotita dum multaj jaroj. Krome, ĉar estis nenio ĝojinda en mia vivo kaj mia raporto nur povus elrevigi lin, tial mi eĉ ne havis la kuraĝon skribi al li. Multe da monatoj kaj jaroj forpasis, kaj estis des pli malfacile esprimi min per vortoj; tial, kvankam iam mi volis skribi, sed mi ne sciis, kiel komenci, kaj ĝis nun mi sendis al li nenian leteron nek foton. Sendube li pensas, ke mi malaperis por ĉiam.

Sed mi ne scias kial mi ankoraŭ rememoras lin de tempo al tempo. El ĉiuj, kiujn mi konsideras miaj instruistoj, li estas tiu, al kiu mi havas plej grandan dankemon kaj kiu donis al mi plej grandan kuraĝigon.

Mi ofte pensas, ke lia entuziasma konfido kaj lia senlaca instruado al mi, en limigita senco, estis por Ĉinio, ĉar li deziris, ke Ĉinio havu modernan medicinon; sed en pli larĝa senco, tio estis por scienco, ĉar li deziris, ke la moderna medicino disvastiĝu en Ĉinio. En miaj okuloj li estas granda homo, kaj mi tiel sentas ankoraŭ en mia koro, kvankam lia nomo ne estas konata de multaj homoj.

Mi bindis la lekciajn notkajerojn, kiujn li korektis, en tri dikajn volumojn kaj konservis ilin kiel eternan memoraĵon. Bedaŭrinde, antaŭ sep jaroj, kiam mi transloĝiĝis, difektiĝis unu librokesto kaj perdiĝis duonkesto da libroj, inter kiuj troviĝis

ankaŭ tiuj notkajeroj. Mi faris postulon al la transporta kompanio por reakiri la perditajn, sed mi ricevis nenian respondon. Nur lia foto ankoraŭ pendas sur la orienta muro de mia loĝejo en Beijing, kontraŭ mia skribtablo. Ĉiufoje kiam nokte mi laciĝas kaj volas ĉesigi mian laboron, mi levas mian kapon kaj ekvidas lian vizaĝon sunbrunan kaj malgrasan en lamp-lumo, kaj ŝajnas, ke li ekparolos laŭtakte, tiam mia konscienco releviĝas kaj mia kuraĝo revenas. Mi bruligas cigaredon kaj daŭre skribas pli da artikoloj forte abomenindaj por la “noblaj sinjoroj”.

(12 oktobro, 1926)

“Sed mi ne scias kial mi ankoraŭ rememoras lin de tempo al tempo.”



Esperanta traduka literaturo”

Post kiam la Esperanta traduko de “Noveloj de Lusin” estis eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, en 1974, publikigis recenzoj pri ĝi en multaj Esperantaj revuoj kaj multaj legantoj de diversaj landoj skribis al la redakcio siajn impresojn pri la eldonaĵo. Ĉisube ni publikigas kelkajn el la recenzoj. La titoloj estas aldonitaj de ni.

“KUN PLEZURO NI LEGAS LA NOVELOJN”

Ni ŝajne estas en la jaro de reeldonoj. Antaŭ 11 jaroj Ĉina Esperanto-Ligo eldonis la binditan eldonon “Noveloj de Lusin”, kaj nun ree ĝi kuŝas sur nia tablo. Sed la nova, “plena kolekto” enhavas 4 pluajn novelojn el la kolekto “Malnovaj legendoj nove redaktitaj”. Dum la dek unu jaroj ni travivis evoluon en mia mondkoncepto. La plej granda “Literaturhistorio de la mondo” kiun mi tiam konsultis, eĉ ne enhavis la nomon de Lusin — ĉar la “mondo” al eŭropanoj estis la landoj, en kiuj iu eŭropa lingvo estas parolata. Nun tamen, ni konsideras ankaŭ la ne-evoluintajn landojn parto de la mondo, kaj des pli malnovan kulturlandon kia Ĉinujo. Kaj ni povas en la literaturhistorio legi pri Lusin, la studento de medicino, kiu dum la studo en Japanujo komprenis, ke li povas fari pli grandan utilon al sia lando per literaturo — literaturo kun klara politika fono. Kaj jen li en la jaro 1906 forlasis la studojn por iniciati literaturan movadon. Poste li dediĉis sian vivon al la literaturo, politiko kaj instruo (kiel lektoro de Pekina Altgrada Lernejo kaj de la Esperanta Faka

Lernejo). Liaj noveloj do havas klaran politikan tendencon, sed kiel ĉe aliaj grandaj verkistoj, tio neniel ĝenas aŭ donas al liaj noveloj malavantaĝojn, kaj kiam la ĉinoj konsideras lin fondinto de la moderna ĉina literaturo, ni povas nur akcepti la fakton. Kaj kun plezuro ni legas la novelojn.

HARO

(El “Norvega Esperantisto” n-ro 4, 1974)

“OFTE ONI EĈ PENSAS PRI POEMOJ EN PROZA FORMO”

En majo 1942 la ĉinaj komunistoj okazigis profundan diskuton en Jan-an pri kulturo kaj arto. Ĝenerale oni akceptis la starpunkton de Prezidanto Maŭ: “Estas du kriterioj en literatura kaj arta kritikado, unu politika kaj la alia arta...”

Pritraktate sub tiuj kriterioj la verkoj de Lusin prezentas al ni vere interesan bildon pri Ĉinio antaŭevolucia. La aŭtoro ne priskribas, kiel tion faris liaj antaŭuloj, la iomete malrealajn amoraferojn de la ĝentilula klaso, sed male la vivon de la popolamasoj sub la jugo de senkoraj ekspluatantoj. Li prezentas al la leganto tutan panoramon de ĉina vivo. Mankas nek

la problemoj de lerneja instruisto, kiu ne ricevas salajron, nek la spertoj de juna knabo senmona, kiu volas rigardi operon. La detaloj pri la ĉiutaga vivo de tiamaj ĉinoj estas superaj al multaj sciencaj raportoj. Eksterlanda leganto povas senti la pulsadon de la mondo de Lusin. (Dank’ al bonegaj klarigoj flanke de la eldonisto, eksterlandano havas la okazon lerni multon pri la kutimoj kaj historio de Ĉinio.)

Lusin estas realisto. Li donas multe pli ol naturalistan, fotan rakonton de sia mondo — li analizas kaj klarigas ĝin al la leganto, kiu ofte havas la impreson, ke la aŭtoro diskutas kun li persone. La sola vere grava demando pri la traduko fakte apartenas pli ol la arta, t.e. stila pritraktado. La titolo de la libro estas “Noveloj de Lusin” — sed ĉu oni rajtas nomi tiujn rakontojn “noveloj”? Eŭropanoj, kiuj enmanigas tiun libron, estos milde (kaj de tempo al tempo eĉ feliĉe) surprizitaj per tiu tipe ĉina ĝenro de “noveloj”. La ĉinoj nomas ilin “xiao-shuo” — etaj diraĵoj. Kompare al eŭropaj noveloj okazas relative malmulte en la rakontoj de Lusin. Ofte oni eĉ pensas pri poemoj en proza

formo. La rakontoj "rakontas" malmulte sed plie "redonas" etoson, moviĝantan pentraĵon, de la ĉina vivo.

Feliĉaj ni estas havi tiun valoran tradukajon en nia lingvo.

ROBERT KVAŠNAK
(FR Germanio)
(El "Esperanto" 1974
decembre n-ro 828)

"TRE REKOMENDATA LEGINDAĴO"

Lusin (1881-1936) estis granda literaturisto, pensulo kaj revoluciulo de Ĉinio. Oni povas nomi lin fondinto de la moderna ĉina literaturo. En la volumo 33 noveloj estas kolektitaj, kiuj devenas el tri periodoj de kreado ampleksantaj nur 17 jarojn: "Krioj", "Vagado", "Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj". Kiel tradukinto la Ĉina Esperanto-Ligo estas nomita, kiu per tiu eldono kompletigis la unuan kolekton de 1963. Lusin estis socia batalanto pledanta precipe por la suferantaj laboruloj kaj atakanta la feŭdismon. La noveloj prezentas impresan bildon de la ĉina vivo el la tempo antaŭ la Popola Respubliko de Maŭ Zedong. Ili estas verkita en flua stilo. Do tiu bone bindita volumo estas vera pliriĉigo de la Esperanta traduka literaturo kaj tre rekomendata legindaĵo.

(El "Interlingvistika Informa Servo" 1974 n-ro 2)

"LUSIN FARIS EL LA LITERATURO SOCIAN BATALILON"

Jam antaŭ dek jaroj aperis "Noveloj" de Lusin, sed la kolekto ne estis tute kompleta: la bona akcepto de la unua

eldono kuraĝigis niajn ĉinajn kolegojn prezenti sur la internacia areno la plenan novelaron de ĉi-tiu prozo-majstro. Fakte la moderna ĉina literaturo komenciĝas ĉe li, je la fino de la dekaĵ jaroj de l' nuna jarcento. Tiutempe Ĉinujo estis ankoraŭ feŭde regata, kaj ĝuste Lusin faris el la literaturo socian batalilon. Li debutis per noveloj, kaj noveloj restas lia ĉefa atuto, sed lia kultura agado estas densa kaj diversflanka: Li fondas kaj redaktas gazetojn, verkas multajn eseojn, instruas en universitatoj kaj altlernejoj, abunde tradukas verkojn de rusaj verkistoj, kvankam ne rekte, sed tra germanaj kaj japanaj tradukoj. Li ankaŭ aktivas sur la politika kampo, opoziciante al Kuomintango, kaj alprenante starpunktojn kontraŭ la imperiismaj militoj, kaj favore al la civilaj rajtoj.

Tiom fervora politika sinteno speguliĝas en liaj noveloj (kvankam en lia esearo ege pli multe): en la feŭda socio kamparanoj kaj malaltklasanoj suferas silente, sed preskaŭ ne ribelas; tiu, kiu aŭdacas ribeli, tuj renkontiĝas kun la subprema strukturo. Malriĉuloj suferas senkrie batojn, kaj mortas trankvile; ilia sorto estas markita jam ĉe la unuaj vivpaŝoj: se oni baraktas kontraŭ ĝi, la vojo kondukas rekte al senkapigo. La karakteriza ĉina etoso, plena de mistero, kiel ĝin supozas okcidentanoj, mankas en la libro: ĉar ja la malriĉuloj estas similaj ĉie, en Ĉinujo komence de la jarcento kiel en mezepoka Eŭropo, kiel en nuna Latinameriko.

CRALO MINNAJA (El
"Heroldo de Esperanto"
1974 oktobro n-ro 13)



29 MILIONOJ DA HOMOJ RICEVIS LABORON EN LA LASTAJ KVAR JAROJ

Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la nombro de laboristoj kaj oficistoj de Ĉinio leviĝis de 8 milionoj en la jaro 1949 al pli ol 104 milionoj en 1980. En 1957, ĉ. 30% de la loĝantoj en la urboj ricevis laboron, kaj en 1980 la procento leviĝis al pli ol 50%. En 1977-1980 29 milionoj da senlaborejoj en la urboj de la tuta lando ricevis laboron. Nun iuj urboj jam fundamente solvis la problemon de senlaboreco.

POR ĈIU ĈINO MEZNOMBRE 324 KILOGRAMOJ DA GRENO EN 1980

Kompare kun 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, la greno posedkvanto por ĉiu loĝanto plimultiĝis je 115 kilogramoj malgraŭ ke la loĝantaro kreskis je 81%. Ĉiprintempe multiĝis grenoj en la kamparaj foiroj kaj iliaj prezoj estis stabilaj kaj eĉ iom malleviĝis.

LA NOVA REKORDO DE PRODUKTA KVANTO DE KOTONO

Ĝis la fino de aprilo ĉijare, la ĉinaj koncernaj fakoj jam aĉetis 2,651,500 tunojn da sensemigita kotono. La kvanto estis je 272,500 tunoj pli multa ol tiu de la jaro 1973, en kiu la kvanto de aĉetita sensemigita kotono rompis la rekordon en la historio. Oni diris, ke ĝis la fino de aŭgusto, kiam finiĝos la aĉeta laboro, oni povos aĉeti ankoraŭ 15,000 tunojn da sensemigita kotono. Dank' al tio, la ŝtato povos ŝpari 500 milionojn da usonaj dolaroj por importi 250,000 tunojn da sensemigita kotono.

Sukceso de Ĉinio en kulturo de hibrida rizo



Sciencistoj observas la kreskadon de hibrida rizo en eksperimenta kampo.

EN la sesa jardeko multaj landoj ricevis malgrandan pliprodukton de rizo, ĉar ili adoptis kutiman metodon de semokulturado.

Ĉu oni povas profiti el hibrida rizo? Tiu demando vekis disputon en nemalmultaj landoj. Ĉar rizo estas monoklina kaj mempolenata planto kun malgrandaj floraj organoj, tial, por profiti el hibrida rizo, oni devas forigi la anteron (aŭ la stameno) sur ĉiu floro aŭ kulturi patrinan rizon kun memsterila stameno. Kaj poste oni devas poleni tiun rizon per alia specio, por ke ĝi donu bonajn hibridajn semojn por reproduktado. Sed tio estas tre malfacila. Sekve iuj specialistoj opiniis tiun metodon nepraktikebla.

En 1964, Yuan Longping, esploristo de la Hunan-a Agronomia Instituto de Ĉinio, komencis tiun esploron la unua. Tiam li instruis en agronomia kolegio.

Por profiti el la supereco de hibrida rizo, estas necese elkulturi rizon kun sterila stameno, konservi sterilecon de la stameno en ĉiuj generacioj post ĝia ricevo de poleno, kaj kreskigi

profitodonan masklan rizon kun stameno, kiu fekundigas la rizon kun sterila stameno per sia poleno, ke la lasta fruktu kiel kutime. Ĉiu el la tri paŝoj estas nemalhavebla.

Por kulturi rizon kun sterila stameno, Yuan Longping en varmegaj someraj tagoj kun lupeo en mano observadis detale en rizkampoj en la tempo kiam la rizo estis floranta kaj spikiĝanta. En preskaŭ duonmonato, li trovis nur unu rizplanton kun sterila stameno. Post tio, en sinsekvaj jaroj li kaj aliaj sciencistoj kune faris multflankan malfacilan esploradon al pli ol 1,000 specioj kaj pli ol 3,000 kombinaĵojn.

Pasis ses jaroj, estis nur malgranda progreso. Sed post detala resumo, li rimarkis ke tiuj specioj, kiujn li uzis por eksperimentado, estas tre parencaj unu al alia, tial li ne sukcesis konservigi sterilecon al la stameno. Sekve li decidis esplori sovaĝan rizon.

Nova espero aperis en oktobro de 1970. Yuan Longping kaj lia helpanto fine trovis misteran rizon en marĉo sur Hainan-

insulo de Guangdong-provinco. Tiu rizo kun kliniĝanta tigo havas anteron maldikan kun poleno nefekundiga. Ĝuste tiam ili longe serĉis. Yuan Longping tuj kunportis tiun valoran planton en sian farmejon kaj ĝin plantis en eksperimenta kampo. Por ĝin poleni, li kaj liaj kamaradoj longe kaŭris en la kampo por atendi la disvolviĝon de ĉiu rizfloro. Ili polenis ĉiun floron ĉe ĝia disvolviĝo. Fine ili akiris malmultajn tamen valoregajn semojn je la unua fojo. Tiu sukceso elhakis vojon por la tripaŝa rizkulturado.

La sekvantan printempon la specimeno de la sovaĝa rizo kun sterila stameno estis disdonita al pli ol 20 organizoj en dek provincoj kaj municipoj por esplorado.

En 1972 agrikulturaj teknikistoj de Jiangxi (Ĝianghi)-provinco unuafoje elkulturis la unuan grupon de rizo kun sterilec-daŭra stameno. Poste, esploristoj de koncernaj agrikulturaj fakoj ekzamenis kaj selektis pli ol 1,000 speciojn de rizo en la baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero de Ĉinio, en sudorientaziaj landoj kaj en



Ili elektas bonajn semojn por kombini novan hibridan rizon.

afrikaj kaj eŭropaj landoj, kaj tiel trovis nombron da profitodonaj rizplantoj kun prospera antero kaj multa poleno, inter kiuj pli ol 90% reakiris naskipovon.

Plenumiĝis la tri paŝoj. La unua grupo de hibrida rizo sukcese elkulturita estas adaptiĝema, rezistema kaj tre disbranĉiĝema, kaj havas fortan radikaron, dikajn tigojn, plenajn spikojn kun multaj bonkvalitaj grajnoj. Oni semis po 15-22.5 kilogramojn da tia rizo en ĉiu hektaro, t.e. dekone de la ordinara rizo, kaj rikoltis jam pli ol 7,500 kilogramojn da rizo en ĉiu hektaro, kaj la plej alta hektara produktokvanto de tia rizo superis 12,750 kilogramojn.

Sed kiel solvi la teknikan problemon de kreskigo kaj poste de produktado? Ankaŭ ĝi estis

malfacile solvebla. Laŭdire, Japanio, kiu frue studis pri hibrida rizo, ĝis nun ankoraŭ ne sukcesis profiti el ĝi pro nestabileco de la funkcio de la kulturataj semoj kaj pro ilia malgranda supereco, kaj ĉefe pro nesolvo de la problemo de kreskigo. Ĝuste pro tio ĉinaj agrikulturaj teknikistoj klopodadis por observi la floradon de la patra kaj patrinoj, serĉi rilatojn inter ilia aĝo kaj ilia flora tempo kaj dati ilian semadon. Ili semis la patran kaj patrinojn ne en sama tempo kaj reguligis la tempon de florado, por ke ili kune floru kaj facile akceptu polenon; krome, ili adoptis aliajn metodojn, kiel ŝprucado de hormono kaj stucado de folioj, por laŭeble efikigi la polenadon. Dank' al tio ili fine ellaboris kompletan metodon por kreskigo.


Bona semo donas produktan efikon nur kiam bona metodo estas adoptita. Sekve la koncernaj agrikulturaj teknikistoj faris ĝeneralan eksperimentadon pri plantado laŭ la karakterizado de hibrida rizo kaj la leĝo de ĝia kresko, en malsamaj lokoj, per malsamaj metodoj kaj je malsamaj ekologiaj kondiĉoj, klimatoj kaj specioj. Ili elektis konvenajn kombinaĵojn, faris ĝustatempan semadon, kulturis fortajn plantidojn, kreskigis bonajn spikojn kaj sterkis fosforan kaj kalian sterkojn, kaj studis teknikon de ĝenerala altprodukta plantado. Krome, ili profunde studis ankaŭ la problemojn de genetiko pri la kulturata hibrida rizo en la tri paŝoj, ĝia sterileco kaj prognozo de ĝia profitodono, ĝia akcepto de lumo kaj la teorio pri ĝia fiziologio kaj biokemio.

Baldaŭ la hibrida rizo disvastiĝis en ĉinaj provincoj. De 1976 ĝis 1980, pli ol 16,000,000 hektaroj da agroj estis kulturataj per hibrida rizo, kun plimultigita produktokvanto de pli ol 13 miliardoj da kilogramoj, kaj la meznombra hektara produktokvanto de tia rizo estis je pli ol 750 kilogramoj pli multa ol tiu de aliaj bonaj rizo-specioj. Dume tia hibrida rizo estis enkondukita ankaŭ en aliajn landojn. En 1977 ĝi estis sukcese plantita en Kamboĝo. En 1979 ĝi estis rekomendita al la Internacia Riza Centro en la Filipinoj. En 1980 ĝi venis en Usonon kiel produkto de avangarda tekniko. Post eksperimentado ĝia hektara produktokvanto estis je 165.5-180.3% pli multa ol tiu de la usona bona rizo-specio Starbonnet. Nun ankaŭ iuj aliaj landoj estas enkonduktantaj tiun ĉinan hibridan rizon.

Hibrida Rizo

Fotoj de LAO QU kaj ZHU SHIJUN

Yuan Longping en verkado de disertacio pri hibrida rizo



Yuan Longping estas esploristo de la Hunan-a Agronomia Akademio, diplomita de la Sudokcidenta Agronomia Instituto en 1953. En 1964 li komencis esploradon pri hibrida neglueca rizo. Post plurjara kuna klopodado, li kaj aliaj agronomoj sukcesis en 1973 elkulturi superecan hibridan rizon. Poste li esploris, kiel fekundigi ĝiajn semojn kaj kulturi ĝin, kio kreis kondiĉojn por grandarea kulturado de tia rizo. Praktiko pruvis, ke tia hibrida rizo havas densan fibrecan radikaron, grandan branĉigemon, dikan tigon kaj pezan spikon. Cetere, tia rizo estas tre adaptiĝema, rezistema kaj donas bonkvalitajn rizgrajnojn.

Famaj rizkulturaj specialistoj de multaj landoj konstatis, ke Ĉinio iras en la fronto de esplorado kaj disvastigo de hibrida rizo. En majo de 1981 la Scienca kaj Teknika Komisiono de Ĉinio honoris Yuan Longping kaj aliajn specialistojn per superklasa inventa premio.



Yuan Longping direktas siajn lernantojn en eksperimento.



En ĉambro de specimenoj

Yuan Longping kaj
fremdlandaj fakuloj
en observado





Ying Huaqi, helpanto de Yuan Longping, direktas komunumanojn en semado.



Analizo pri analoga enzimo en la hibrida rizo

Ekstermo de insekto per insekto

de SUN PEIRAN


Esploro pri la vivo de vespo



En la lastaj jaroj la ĉina kamparo aplikis en insekto-ekstermo la metodon "ekstermi fiinsektojn per insektoj". Oni dismetas en kampojn breditajn insektojn, por ke ili formanĝu fiinsektojn. La metodo povas preventi median polucion kaŭzitan de trouzado de insekticido kaj redukti elspezon de agrikultura produkto.

Laŭ statistiko, en la mondo vivas preskaŭ dek mil specoj da insektoj, kiuj povas esti utiligataj en ekstermo de fiinsektoj. Ekzemple, krisopo (*Chrysopa perla*) estas natura malamiko de kotona afido. Dum sia tuta vivo unu krisopo povas formanĝi pli ol 2,000 kotonajn afidojn, kaj en unu tago ĝi povas engluti maksimume 200 afidojn. Ankaŭ kokcino estas natura malamiko de afidoj sur kotono, tritiko, legomo kaj legumenacoj. Unu kokcino ĉiutage povas formanĝi tiom da afidoj kiom unu krisopo. Se oni metas en 1 muon da kampo 3,000 kokcinojn, ili povas rapide malfortigi damaĝon de afidoj al la plantaĵoj. Cetere ankaŭ araneo, vespo, ruĝokula vespo kaj ora vespo estas insektoj manĝantaj fiinsektojn.

La gubernioj Minquan, Anyang k.a. de Henan-provinco disvastigis tiun metodon kaj rikoltis bonan efikon. Helpate de ŝtataj agronomiaj institucioj, ili solvis la malfacilojn en bredado de larvoj de krisopoj kaj trovis novan vojon en bredado de kokcinoj.



Vespoj dispecigas kaptitajn fiinsektojn por nutri siajn idojn.



Blanka kraba araneo kaptas rizborilon.





Krisopo manĝas afidon.

Krisopa larvo manĝas kotonafidon.



Nutri larvojn de krisopoj per miksaĵo el sukero, mielo, ovo kaj vitaminoj





Plastaj floroj

Kvankam Ĉinio havas vastan teritorion kaj abundajn naturajn riĉfontojn, tamen estas necese por Ĉinio multe disvolvi la produktadon de sintezaj materialoj por kontentigi la bezonon de la progresanta produktado kaj la ĉiam pliboniĝanta materia vivo de la miliarda popolo, kiam mankas sufiĉa forto por ekspluatado de tiuj riĉfontoj.

El la sintezaj materialoj la plasto, kiu povas anstataŭi lignon, kotonon, linon, ledon, kaŭĉukon kaj neferajn metalojn, iris en novan industrion de Ĉinio rapide disvolvitan dum la lastaj dekelkaj jaroj. La produktokvanto de ĉinaj plastajoj en 1980 superis milionon da tunoj. La Ekspozicio de Ĉinaj Plastaj Produktaĵoj okazigita en majo ĉijare en Bejing montris 10,000 pecojn da plastaj produk-

tajoj en 1,000 specoj. Precipe plastajoj belformaj kaj malmultekostaj en la vendejoj altiris al si milojn kaj dekmilojn da aĉetantoj ĉiutage.

UNUE DISVOLVI PRODUKTADON DE PLASTAJ ĈIUTAGAJ BEZONAĴOJ

Ĉinio faris grandan klopodon por disvolvi produktadon de plastajoj bezonataj de la popola vivo. Kompare kun la evoluintaj industriaj landoj, Ĉinio havas malaltan produktokvanton de plasto, tamen ĝi uzas ĉiujare trionon de la plasto por fari diversajn meblojn, ŝuojn, mansakojn, vestojn, ludilojn kaj hejmajn objektojn. Ĉi-rilate, plej rapide progresis la farado de plastaj ŝuoj. En la pasinta jaro Ĉinio produktis 500 milionojn da paroj da plastaj ŝuoj.

Plastaj produk- taĵoj de Ĉinio

de ZHAI GONGQIN

Antaŭe, plejparto de la ŝuoj bezonataj en la kamparo estis mane kudrita de virinoj stebo post stebo en noktaj horoj kaj alia libera tempo. Grandkvanta produktado de plastaj ŝuoj povas ŝpari tempon al la virinoj, kaj krome, la plastaj ŝuoj estas ŝataj de la kampuloj pro sia fortikeco kaj portebleco en serena aŭ pluva tago. Pro tio, la plastaj ŝuoj viraj, virinaj kaj infanaj havas grandan debiton en la kamparo.

Ĉe la vendejoj de plastaj produktajoj en iuj urboj ofte forvendiĝas tre rapide altklasaj kaj mezklasaj plastaj ŝuoj belformaj kaj brilkoloraj. Ekzemple, la virinaj plastaj sandaloj kaj pantofloj dukoloraj, perlaĵ aŭ metalinkrustitaj kun altaj, mezaltaj aŭ malaltaj kalkanumoj, la infanaj plastaj ŝuoj kun desegnaĵoj kaj la viraj plastaj ŝuoj kun plastaspongaj plandumoj kungluitaj kun dorsoj el artefarita led, ĉiuj donas komforton kaj bone sidas sur la piedoj. Lastatempe iuj fabrikoj de plastaj objektoj faris plastajn ŝuojn por pluraj uzoj. Ekz-e, vintraj ŝuoj kun ar-

tefarita lano en la interno produktitaj de Tianjin (Tiangin) bone konservas varmon kaj iliaj dorsoj ne malmoliĝas eĉ en la temperaturo de 30°C sub la nulo, tial tiaj ŝuoj tre taŭgas por homoj en malvarmaj lokoj; aliaj ŝuoj kun medikamento en la interno por kuraci skabion servas al homoj turmentataj de pieda skabio. Ĉiuj tiuj ŝuoj estas bonvenaj al la publiko.

Krom plastaj ŝuoj, rapide disvolviĝas ankaŭ tiaj plastaj produktajoj, kiel lito-tuko, tablotuko, fenestra kurteno, pluvmantelo, kaj diversspecaj plastaj ujoj, kiaj pokalo, telero, vazo, skatolo, pelvo, sitelo, botelo kaj kruĉo. Tre multaj familioj preferas tiujn objektojn pro ilia oportuneco kaj malalta prezo.


En la lastaj jaroj, kun la leviĝo de la vivnivelo la popolo

bezonis pli kaj pli da produktajoj el artefarita led kun mal-samaj fonoj kaj desegnoj. La kofroj, vojaĝsakoj, vestoj kaj gantoj el artefarita led havis grandan debiton kaj apenaŭ povis kontentigi la bezonon de klientoj.

Krome, Ĉinio eksportas ĉiujare ĉ. 60,000 tunojn da plastaj ĉiutagaj bezonaĵoj, el kiuj troviĝas la en Beijing produktita plasta membrano bildo-presita kun marko "Trapa Floro", fama en Ĉinio pro siaj klaraj kaj freŝaj bildoj, harmoniaj koloroj kaj nekadukiĝemo. En la pasinta jaro tiu produktaĵo estis premiita de la ŝtato per arĝenta medalo kaj kurantjare grandkvante mendita de eksterlandaj klientoj. La unubranĉaj floroj kaj envazaj pejzaĝoj, faritaj de la Fabriko de Plastaj Floroj de Tianmengubernio de Hubei-provinco, havas trajton de ĉinaj naturaj

Kampaninoj de la Dali-a Bai-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan kulturis rizplantidojn sub plasta membrano.

Plasta fabriko de Shanghai produktas platan membranon.



floroj kaj estas versimilaj kaj brilkoloraj. Kaj 10,000,000 pecoj da ili vendiĝas ĉiujare en Usono, FR Germanio, Francio, Japanio kaj aliaj pli ol 30 landoj kaj regionoj.

PLASTO UZATA EN INDUSTRIA KAJ AGRIKULTURA PRODUKTADO

Nun Ĉinio pli aŭ malpli multe uzas plastajn materialojn en industrio, agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝkaptado kaj flankokupoj.

En malvarmaj lokoj en norda Ĉinio terkulturistoj konstruas forcejojn el plasta membrano por legomoj. Ekzemple, la plastmembrana forcejo kun areo de kelkaj hektaroj videblas ĉie en la antaŭurboj de Bejing. En suda Ĉinio plastaj membranoj estas uzataj por flegi rizplantiĝojn, tiel ke la rizsemoj povas esti ŝparitaj, la plantidoj fortigitaj, la prujnodamaĝo evitita kaj la produktokvanto plimultigita. La polivinil-klorida membrano estas vaste uzata en agrikulturo kaj taŭgas ankaŭ por kulturado de kotono, tabako, fungo, orelfungo, ginsengo, arbido kaj aliaj ekonomikaj plantoj. Precipe la plastaj membranoj kampokovrantaj kaj likimunaj kaj aliaj novaj specoj estos pli vaste rekomenditaj.

Ankaŭ la plastaj fiŝretoj estas ĝenerale uzataj de ĉinaj fiŝistoj. La plastaj fiŝretoj, kiuj anstataŭas tiujn el kotonaj aŭ linaj fadenoj, estas ne korodeblaj de la marakvo kaj povas esti longe uzataj pro sia forteco.

Dum la lastaj jaroj rapide progresis ankaŭ la produktado de diversaj poragrikulturaj plastaj ŝprucigiloj, plastaj putotuboj kaj



Plastaj ludiloj

akvotuboj kaj plastaj metanaj ekipaĵoj. Nun Ĉinio komencis produkti grandkvante plastajn subterajn tubojn, kiaj estas vaste uzataj de industrie avangardaj landoj por agrikulturo. Tiaj tuboj taŭgas por irigacio kaj drenado. Tia irigacio favoras la grundon, akvon, sterkon, aeron kaj temperaturon, ebligante pli-produkton de la plantoj.

La teksita plasta sako por kemia sterko, insekticido k.a., estas multe pli akvoeltena kaj hermetika ol la papera, kian Ĉinio uzis antaŭe, kaj krome ĝi estas nedifektigema. La venenimuna polivinil-klorida botelo, en kiu oni konservas mineralan akvon, kuiroleon kaj similajn fluidaĵojn, estas multe pli malpeza ol la vitra botelo de la sama kapacito. Pasintjare, Ĉinio teksis 240 milionojn da plastaj sakoj. Videble, plasto havas bonan perspektivon en pakado.

Pli multaj estas la specoj de plastaj produktaĵoj por industrio. Inter la porindustriaj plastaj produktaĵoj montritaj en la Ekspozicio de Ĉinaj Plastaj Produktaĵoj troviĝas diversaj

pumpiloj, valvoj, trogoj, aksoringoj, toboganoj, sekurigaj kaskoj kaj vestoj, uzataj en la petrola, kemia, metalurgia industrioj k.a. branĉoj, kaj ankaŭ diversaj akcesoraĵoj uzataj por la elektrona industrio kaj ondataj tabuloj servantaj al la termokonvertoro de elektrejo.

En la lastaj jaroj, Ĉinio pli kaj pli multe uzis plaston en konstruado. Plastaj planko, ŝtupara balustrado, plafono, tapeto, pordo kaj fenestro anstataŭas tiujn el naturaj materialoj. Dank' al siaj bonaj kemia stabileco, elektro-izoleco, alta malmoleco kaj frot-mildigemo, la porindustriaj plastaj produktaĵoj povas anstataŭi metalon kaj ŝpari energion, tial plasto estas nova materialo nemalhavebla por diversaj industriaj branĉoj, eĉ por plej avangardaj sciencaj kaj teknikaj branĉoj.

Ĉinio uzas plaston ankaŭ en medicino. Nun ĝi povas mem fari plastajn pulmojn kaj malgrandajn plastajn kardiovaskulojn, dum en la pasinteco tiaj bezonaĵoj estis importitaj el aliaj landoj.

Taishan-monto

de **JI LONG**

SURGRIMPI Taishan-monton por ĝui la pejzaĝon de sunleviĝo estas preskaŭ la plej granda deziro de ĉiuj turistoj, kiuj havas la ŝancon veni al Shandong-provinco de Ĉinio. Tamen la ascendo al la nomita monto, kies ĉefa pinto altas je 1,545 metroj super la marnivelo, neniam montras sin facile plenumbla. Ekirinte frumatene, tra pli ol

6,293 ŝtonaj ŝtupoj sur la Vojo de 18 Zigzagoj, oni sukcesas atingi ĝian supron nur posttagmeze. Por ne paroli pri ordinaraĵoj turistoj, eĉ profesiaj montogrimpistoj tiam jam dronas en ŝvitego, kun la membroj terure doloraj.

Post tutnokta ripozo, je la duono post la kvara en la sekvanta mate-

no, la tintiloj de la hotelo sur la montsupro vekas siajn gastojn el ilia dormo. Oni surmetas vatitajn surtutojn, ĉe la lumo de steloj iras al la monta kulmino kaj senbrue rigardas orienten, atendante la aperon de la suno, dume la tero ankoraŭ dormas sub la nokta vualo. Post momento, la orienta ĉielo iom post iom heliĝas kaj montras la matenan krepuskon en embria stato. Super la horizonto aperas oranĝa flavo, kiu baldaŭ turniĝas en purpuran ruĝon, kaj iom poste elmontriĝas ruĝe radianta duoncirklo. Jen, en palpebruma daŭro, de sur la horizonto salte leviĝas globo kvazaŭ flamanta, kiu ĵetas siajn brilojn ĉiudirekten kaj tuj ruĝigas kaj la ĉielon kaj la valojn. Nereteneble, ĉiuj ĉeestantoj aplaŭdas pro tiel superba pejzaĝo.

Taishan-monto estas rigardata kiel la krono de la kvin famaj montoj en Ĉinio. En la 5-a jarcento a. K. Konfuceo, fama ĉina filozofa, surgrimpis ĝin kaj admire diris: "Rigardate de la supro de Taishan-monto, malgranda aspektas la mondo." Imperiestroj en la ĉina historio kutime prenis la monton kiel simbolon de




Neĝo sur Taishan-monto

Dio kaj venis ĉi tien por ĝin kultu post sia surtroniĝo.

Dai-templo ĉe la montopiedo estas ĝuste la loko kie imperiestroj faris kulton siatempe, kaj tial, ankaŭ la loko de multaj historiaj objektoj. Laŭ la noto de historio, tiu templo estis jam konsiderinde granda en la 6-a jarcento p. K. Poste, dank' al multfojaj riparadoj kaj plilarĝigoj en diversaj dinastioj, ĝi fariĝis fine grandioza konstruajaro kun areo de pli ol 96,000 kvadrataj metroj. Ĝia ĉefa konstruaĵo — Tiankuang-halo — 48.7 metrojn longa, 19.79 metrojn larĝa kaj 22.3 metrojn alta, aspektas aparte impona kaj majesta, kun siaj kolordesegnitaj konzoloj kaj tegmento el flavaj glazuritaj tegoloj. Ĝi, kune kun Taihe-halo en la Imperiestra Palaco en Beijing kaj Dacheng-halo en la templo de Konfuceo en Qufu-gubernio de Shandong-provinco, prezentas la tri plej famajn palacajn konstruaĵojn en Ĉinio.

En Tiankuang-halo estas bone konservita kultura raraĵo — fresko el la 10-a jarcento, kiu estas titolita "Bildo pri la Dio Taishan en Vojaĝo". La fresko, alta je 3.3 metroj kaj longa je 62 metroj, priskribas la scenon, kiel la Dio Taishan vojaĝas en akompano de sia kortego. En la fresko vidiĝas 657 diversrangaj personoj kaj centoj de ĉevaloj. Ĝiaj freŝaj koloroj sukcese supervivis la pasintajn ĉirkaŭ mil jarojn.

En Dai-templo prosperas tre maljunaj cipresoj, el kiuj, laŭdire, kvin, kun aparte fortikaj frondoj, estis plantitaj de Liu Che (157-87 a.K.), imperiestro de Han-dinastio. En la malantaŭa korto oni povas trovi bronzan kioskon starigitan en la jaro 1615. La kiosko, belforma



La pinto Ĉiela Kandelo ĉe la Posta Roka Bariero norde de Taishan-monto

kaj delikate muldita, estas 5 metrojn alta kaj pli ol 3,000 kilogramojn peza.


La templo ankaŭ abundas je steleoj — tie entute estas pli ol 140 ŝtonplatoj — sur kiuj estas gravurita la surskriboj de kaligrafoj en diversaj dinastioj. El ili troviĝas steleo, kiu kun plej longa historio prezentas la ideografiaĵojn skribitajn de Li Si, ĉefministro de Qin-dinastio en la 2-a jarcento a. K.

Ekster la norda portalo de la templo, oni povas vidi memorigan arka-

don konstruitan en la 15-a jarcento — Daizong-arkadon, kiun trapasinte, oni jam komencas penetri en la montaran sinon.

Laŭ serpentuma montvoĵeto, oni venas al Wangmu-lageto (Laŭ ĉina legendo, Wangmu estas nomo de la Okcidenta Diino), kie troviĝas pura kaj klara fonto, senĉese fluanta al la valo. Legendo diras, ke Wangmu sin banis ĉi tie. Irante pli supren oni baldaŭ trovas sin antaŭ la Kiosko por Akvofalo, de kiu oni povas sate ĝui la panoramon de falakvo plaŭdanta de sur la Tigra

SKIZA MAPO DE TAISHAN-MONTO



Monto. Ambaŭflanke de la mont-vojeteto multjaraj soforoj ŝirme etendas siajn brakojn kaj fluantaj akvoj murmuris. Ĉe la pasejo al la montosupro staras ŝtona kiosko, kiun oni nomas "Kiosko de Monto Alta kaj Akvo Flua". Ĉi tie troviĝas granda roka ebenejo, sur kiu oni gravuris sutron en la 4-a jarcento. Hodiaŭ ankoraŭ konserviĝas entute 1,043 ideografiaĵoj, ĉiu kun grandeco de 50 centimetroj. La lokon ĉirkaŭas ondantaj montopintoj kaj verdaj pinoj. Kelkan distancon pluen tra kruta deklivo, oni venas al la Pina Kiosko kun kvin ĉeloj, kie estas tri maljunaj pinoj, kiuj, etendante siajn branĉojn, similas al grandaj ombrel-
 loj. Laŭ legendo, kiam la Unua Imperiestro de Qin-dinastio ascendis al Taishan-monto, li sin ŝirmis sub unu el la pinoj kontraŭ pluvo, kaj sekve, li nomis la arbon kortegano Wudafu (unu el la oficistaj titoloj en Qin-dinastio). Hodiaŭ preterpasantoj ĉiam preferas halteti ĉi tie por reakiri spiron.

De tie la deklivo pli kaj pli krutiĝas. Antaŭ ol atingi la montopinton oni devas trapasi tre danĝeran lokon — la tiel nomatan Sudan Ĉielan Pordegon — kie la ŝtona ŝtuparo estas tiel kruta, kvazaŭ eskalo vertikale pendanta de la ĉielo. Rigardante malsupren, oni trovas, ke kaj la ĉirkaŭaj montoj kaj nuboj nun kuŝas subpiede, kaj al ili ŝajnas, ke ili venas en Elizeon kaj ŝvebus per nubaj flugiloj. Sur la montosupro estas ebena grundo kaj ĉi tie aperas bela konstruaĵaro — Bixia templo. Rigardate de malproksime, ĝia ĉefa halo, kun bronzaĵ tegoloj, brilas en plena parado, memorigante pri la paradiza palaco priskribita en mitologiaj rakontoj. En la 13-jarcento oni uzis 4,950 taelojn da oro por ripari tiun ĉi halon.

- | | | |
|---|---|---|
| 1. <i>Tai'an</i> (153 metrojn super la marnivelo) | 5. <i>Duisong-pavilono</i> | 8. <i>Sun-rigarda Pinto</i> |
| 2. <i>Daizong-arkado</i> (190 metrojn super la marnivelo) | 6. <i>Tri-zigzaga Vojo kun 1,594 ŝtonaj ŝtupoj, 400 metrojn alta kaj 0.8 kilometron longa</i> | 9. <i>La pinto Dio</i> (1,545 metrojn super la marnivelo) |
| 3. <i>Doumu-palaco</i> | 7. <i>Suda Ĉiela Pordego</i> (1,460 metrojn super la marnivelo) | <i>La totala alteco de Taishan-monto: 1,392 metroj</i> |
| 4. <i>Meza Ĉiela Pordego</i> (847 metrojn super la marnivelo) | | <i>La totala longeco de la vojo sur Taishan-monto: 9 kilometroj</i> |

Taishan-monto estas ne nur majesta, ĉarma monto kaj muzeo pri historiaj restaĵoj, sed ankaŭ trezorejo por arkeologoj, paleoantropologoj kaj paleontologoj. En ĝia ĉirkaŭaĵo oni trovis fosiliojn de trilobito, dinosaŭro, elefanto, rinocero k.a., kio elokvente pravas, ke, de la paleozoiko antaŭ 500,000,000 jaroj ĝis la kenozoiko antaŭ 1,000,000 jaroj, ĉi tie ekzistis granda nombro da praaj estaĵoj. Ĉe la suda deklivo arkeologoj trovis la postsignojn de homaj

aktivecoj en la neolitika periodo, kaj eĉ en pli fruaj tempoj, kaj tio ĉi montras al ni, ke ĉirkaŭ Taishan-monto iam estis grava kultura centro de la antikva Ĉinio.

* *La kvin famaj montoj de Ĉinio estas: La Orienta Monto Taishan en Shandong-provinco, la Okcidenta Monto Huashan en Shaanxi-provinco, la Meza Monto Songshan en Henan-provinco, la Norda Monto Hengshan en Shanxi-provinco kaj la Suda Monto Hengshan en Hunan-provinco.*



Sunleviĝo

Taishan- monto

La Suda Ĉiela Pordego
(konstruita en 1264 p.K.)






Vojo kun 18 zigzagoj

Antikvaj pinoj



Rigardi Aolai-montpin-
ton de la templo Bixia



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Malnova fortikaĵ-pordego Levroux
en Francio (en la 15-a jarcento)
de **BERTRAND** (Francio)

Sunsubiro ĉe monta vi-
laĝo de Apuanaj Alpoj
de **ALBERTO C. STAGI** (Italio)





Mi kaj Esperanto

de PANDIŜO

EN la jaro 1925, kiam mi estis 16-jara lernanto en la tria klaso de iu mezlernejo en Shanghai, mi eksciis la nomon Esperanto de iu samklasano, kiu jam havis kelkajn eksterlandajn korespondantojn. Por kontentigi mian scivolemon, mi aĉetis lernolibron kompilitan de Sun Guozhang kaj komencis fervore lerni la internacian lingvon. Unu jaron poste, dank' al la anoncetoj en "Esperanto" de UEA kaj "Heroldo de Esperanto" mi trovis tri gekorespondantojn el Japanio, Germanio kaj Svisio.



Tiam oni ne akceptis aerpoŝtaĵojn, la sendo de unu letero al Eŭropo per ŝipo bezonis pli ol du monatojn, eĉ tiu per trajno tra Siberio ankaŭ pli ol unu monaton. Tial, krom la letero de la japana amiko, mi devis senpacience atendi la respondojn de la aliaj du geamikoj almenaŭ 3 monatojn. Poste, mi aperigis anoncetojn en la du supremenciitaj periodaĵoj. Ĉar tiutempe ĉinaj esperantistoj estis malofte troveblaj, svarmis al mi centoj da korespondoponantoj el 30 landoj de 4 kontinentoj.

Kiel lernanto de la kvara klaso de mezlernejo, mi ne havis eblon korespondi kun tiel multaj geamikoj pro manko de tempo kaj monrimedo. Mi decidis korespondi kun kelkaj lertaj geesperantistoj kaj respondis al la aliaj per ilustritaj poŝtkartoj, petante ke ili pardonu al mi mian neeblecon kontentigi iliajn proponojn pro tempomanko. Korespondi kun alilandaj esperantistoj estas unu el la rimedoj por sin perfektigi en Esperanto.

La dua rimedo estis praktiki interparolon kun eksterlandaj samideanoj.

Prof. Pandiŝo

Prof. Pandiŝo kaj Esp-kursanoj



La unua fremda amiko, kun kiu mi interparolis plej ofte, estis s-ro Fredrick Wilhelm Ebner, aŭstra esperantisto laboranta en Shanghai ĉirkaŭ 20 jarojn. Bedaŭrinde li forpasis en sia patrolando en 1968.

En 1930, s-ro Joseph R. Scherer el Usono, la mondvojaĝanta reprezentanto de la Internacia Centra Komitato, venis al Shanghai. La Shanghai-a Esperanto-Asocio aranĝis, ke s-ro Īcio Sun kaj mi akompanu lin en ĉiuj liaj agadoj. Kune kun s-ro Scherer venis el Usono nederlanda esperantisto s-ro Slinger. Samtempe alvenis franca esperantisto s-ro Peraire, kiu mondvojaĝis per biciklo. Do ni kvinope pasigis esperantistan vivon dum unu plena semajno. S-ro Scherer faris propagandan paroladon en Fudan-universitato, kies studento tiam mi estis, kaj mi interpretis la paroladon ĉinlingven. Ĉeestis ĉirkaŭ 300 aŭskultantoj. Ni vizitis la redakcion de "Shen Pao", la plej granda ĵurnalo en Ĉinio, kaj la Komercan Presejon, la plej granda eldonejo en nia lando, kie ni vidis presata la Esperantan Rubrikon de la monata ĉinlingva porĵunulara revuo "La Studento", la plej ŝatata revuo de la ĉinaj studentoj, kaj Dongfang-bibliotekon sub la Presejo, unu el la plej grandaj bibliotekoj en Ĉinio. Ni vizitis aliajn vizitindajn lokojn en Shanghai, inkluzive de la fama Longhua-pagodo kaj la ĝardeno de Ye-familio. Ĉion ĉi tion mi raportis per longa artikolo en la revuo "Verda Lumo", la organo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio. Inter la aliaj esperantistoj kun kiuj mi interparolis en Esperanto troviĝis hungaroj, japanoj, germano, polo, rumano, aŭstraliano, novzelandano, usonano kaj islandano. Tiu aktivado multe levis mian parolan kapablon de Esperanto.

Gvidi Esperanto-kursojn estis alia mia Esperanta praktiko, plejparte en

lernejoj. Mi eĉ gvidis progresintan kurson en la Japana Junulara Kristana Asocio, kies interrilatanto kun mi estis s-ro Jonezaŭa Ŝiŭfu.

Traduki aŭ verki ion en la internacia lingvo estis ankaŭ unu el la rimedoj por levi la nivelon de Esperanto. En la jaroj 1937-38 dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, mi tradukis artikolojn por la "Orienta Kuriero" eldonata en Hongkongo. En la "Elektitaj Noveloj de Lusin", kune eldonita de "Orienta Kuriero" kaj "Voĉoj el Oriento", estis la novelo tradukita de mi "La Soleculo". Post kiam la japanaj mararmeanoj surteriĝis sur Hongkongon, "Orienta Kuriero" kaj "Voĉoj el Oriento" estis devigitaj ĉesigi la eldonadon.

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ĉinaj esperantistoj povas vere servi al sia patrolando per Esperanto, ĉar la popola registaro subtenas la Esperantan aferon. Mi tradukis unu aŭ du artikolojn por ĉiu numero de El Popola Ĉinio ekde ĝia debuto en majo, 1950, ĝis la somero de 1966, kiam komenciĝis la kultura revolucio. Mi estis ankaŭ unu el la tradukintoj de la du plej gravaj Esperantaj libroj "Ĉina Antologio" kaj "Noveloj de Lusin", kiujn ni ĉinaj esperantistoj ĝis nun eldonis. Krome, mi tradukis divers-tamajn librojn, inkluzive de la "Rakontoj pri Fantomspitantoj", la "Konciza Geografio de Ĉinio", "Leteroj el Ĉinio de Anna Louise Strong", la "Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko" ktp.

Nun mi estas sepdekjarulo. Malgraŭ mia granda aĝo, mi ankoraŭ gvidas Esperanto-kurson en la fremdlingva fakultato de la Huedong-a Normala Universitato, kie mi instruas. Mi intencas elbaki nombron da laboremaj esperantistoj, kiuj vigligos la ĉinan Esperanto-movadon al pli alta stadio.

"LA MONDO" APERIS

La dumonata Esperanta revuo "La Mondo" redaktita de la Ĉina Esperanto-Ligo, longe dezirata de la ĉina esperantistaro, aperis en Beijing. Ĉijare aperos tri provaj numeroj de la revuo kaj ĝi aperos regule venontjare. La revuo traktados esperantologion, esperantajn gramatikon kaj retorikon, elektitajn esperantajn legaĵojn kun komentarioj, ĉinan tradukon, tradukajn ekzercojn, historion de la Esperantomovado, Esperantajn aktivecojn de Ĉinio kaj aliaj landoj, k.a. Tiu revuo duonoktava kaj 32-paĝa aperos ĉefe en la ĉina lingvo kaj parte en Esperanto. Tiu Esp-movada revuo ludos direktan kaj akcelan rolon al la E-movado de Ĉinio.

DIVERSAJ AKTIVADOJ DE ESPERANTAJ ORGANIZOJ DE ĈINIO

Ekde la komenco de la kuranta jaro, la Esperantaj organizoj de la grandaj kaj mezgrandaj urboj faris diversajn aktivadojn por propagandi Esperanton kaj altigi la lingvan nivelon de la esperantistoj.

En majo la Esperanta Instituto de la urbo Nanning okazigis voĉlegan vesperon en nia lingvo, kiun ĉeestis pli ol 100 kursanoj de la dua kaj tria esperantaj kursoj kaj la Koresponda Esperanta Lernejo. Ili voĉlegis poemojn, rakontojn kaj konversaciis por levi sian kapablon de aŭdado kaj legado.

La prepara komitato de la Liaoning-a Esperanto-Asocio okazigis prelegan kunvenon pri Esperanto en la Nordorienta Politeknika Instituto por konigi Esperanton al studentoj de la instituto. Por ke Esperanto aplikigu en sporto, ĝi propagandis Esperanton en la Shenyang-a Sporta Instituto. Nun 68 instruistoj kaj studentoj de ĝiaj sporta, korbopilka

RUMANA ESP-AGADO PROGRESAS



Fondiĝis Junulara Sekcio de la Kolektivo Esperanto-Lingvistiko funkciante kiel landa organizaĵo. La gvidanto de la nova fako fariĝis Mariana Buca (inf.: Esp. Kolektivo — Junulara Sekcio, Bd. V. Parvan, 4-1900 Timisoara, Rumanio).

Lasttempe aperis en Timisoara la 298-paĝa volumo "Praktikaj laboraĵoj pri Esp. kaj Interlingvistiko" de prof. d-ro. Ignat F. Bociort, ĉefo de KEL. En januaro estis eldonita kurso pri Esp. gramatiko (240-paĝa) de la sama aŭtoro.

Grupo de aŭtoroj el la Universitato de Bukareŝto sub la gvido de asist. prof. Constantin Dominte aperigis du vortarojn Esp-rumanan kaj rumanan-Esp-an. La Kolektivo laboras por prepari grandan Esp-rumanan vortaron sub la gvido de prof. d-ro I.F. Bociort.

Fine de la pasinta jaro kreiĝis la E-Sekcio en la Societo de Filologiaj Sciencoj.

La teatra ensemblo Thespis de la Junulara Kulturdomo Timisoara, gvidata de prof. Diogene V. Bihoi, partoprenis al Vintra Esperantista Ferio de Budapeŝto kaj al la 5-a Internacia Junulara Festivalo en Italio kun la teatraĵo: "Pureco de Sango" de Bernardo Golden kun granda sukceso.

Meze de septembro ĉi-jare okazos la 4-a tutlanda E-renkontiĝo en la Universitato de Timisoara. Oni anticipas la aliĝon de pli ol 2600 esperantistoj, kaj tiu renkontiĝo sen-dube multe kontribuos al la disvas-tigo de la E-agado por paco kaj por la kunlaboro inter la popoloj.

kaj gimnastika fakultatoj lernas Esperanton. La 28-an de junio la geesperantistoj de Liaoning-provinco starigis sian someran tendaron en Beiling-parko de la urbo Shenyang. 120 lernantoj el Liaoning-universitato, la Nordorienta Politeknika Instituto, Shenyang-a Normala Instituto, Shenyang-a Sporta Instituto, Shenyang-a Agronomia Instituto, Koresponda Esperanta Lernejo kaj Esperantaj kursoj prezentis amuzajn programerojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo kaj faris montgrimpadon.

La Esperanta kurso de la Sindikata Postlabora Lernejo de la Centra Distrikto de Chongqing faris konkurson pri voĉlego de Esperantaj poemoj en la dua tagdeko de junio, kiun partoprenis 32 kursanoj. El ili 7 ricevis premion.

FONDIĜIS LA HUHEHOT-A ESPERANTO-ASOCIO

La urbo Huhehot estas la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Inter-

na Mongolio de Ĉinio. La nomita asocio havis sian inaŭguron je la 20-a de junio. La inaŭguran kunvenon ĉeestis ĝiaj membroj kaj reprezentantoj de la Urbaj Kompartia Komitato, Sciencasocio, la Sociologia Federacio kaj la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio. De Bao, prezidanto de la Huhehot-a Esperanto-Asocio kaj vicestro de la Propaganda Departemento de la Urba Partia Komitato, faris inaŭguran paroladon. Guo Qiancong, honora prezidanto de HEA kaj vic-

urbestro de Huhehot, kaj Yang Lingde, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio kaj vicprezidanto de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Interna Mongolio faris entuziasmajn parolojn. En la kunveno estis aprobita la statuto de la asocio kaj elektita konsilantaro el 18 personoj. La fondiĝo de la asocio havas gravan signifon por propagandi Esperanton en la regiono loĝata de mongoloj.

La partoprenantoj de la inaŭgura kongreso de la Huhehota Esperanto-Asocio





CAO BAILONG:

Brila imit-arto

Maljuna laboristo imite faras palacan lanternon de Han-dinastio.

ĈE Liulichang, la fama kultura strato de Beijing (Pekino), troviĝas la vendejo Jiguge, kiu allogas al si fremdlandajn gastojn kaj turistojn. Ĝi, tre simila al ekspozicia halo de antikvaj kulturaj objektoj, eksponas kaj vendas imitaĵojn kaj kopiaĵojn.

Sur la kurioze koloraj lignaj bretoj kun antikva stilo videblas trikoloraj argilaj ĉevaloj kaj figuroj de homoj kaj bestoj faritaj imite al tiuj de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj argilaj figuroj de artistoj kaj palac-lanternoj, imitaĵoj de tiuj de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.). Krome videblas ankaŭ bronza "Ĉevalo sur Fluganta Hirundo", imitaĵo de tiu de Han-dinastio. Sur la muro pendas la kopiita Dunhuang-a fresko "Flugantaj Feinoj", desegnaĵoj kopiitaj el la bildoj sur brikegoj de Han-dinastio kaj kopioj de verkoj de famaj ĉinaj antikvaj pentristoj. Ili estas tre grandnombraj kaj mirigaj!

Ĉinio estas lando kun antikva

kulturo. Ĉiujn niajn gastojn kaj turistojn tiklas vizito de la Imperiestra Palaco, la subtera palaco — unu el la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio de Beijing, la Muzeo de Argilaj Militistoj kaj Ĉevaloj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio en Xi'an (Hi'an), la Ŝtonaj Kavarnaroj de Luoyang kaj Datong kaj aliaj muzeoj kaj vidindejoj. Ili senescepte admiras la valoregajn eksponaĵojn kaj multaj el ili volas aĉeti iujn ĉinajn kulturajn restaĵojn kiel memoraĵon aŭ donacon al siaj parencoj kaj amikoj. Tamen ĉiuj ĉi objektoj estas trezoraĵoj de nia nacio nevendeblaj, pro kio niaj gastoj sentas profundan bedaŭron. Tial, por akceli la internacian kulturalan interŝanĝon kaj kontentigi la bezonon de ekstera komerco kaj turismo, oni starigis butikojn, kiuj vendas speciale kopiojn de antikvaj kulturaj objektoj. Tio sendube vekis grandan intereson ĉe la amatoroj de la ĉinaj kulturaj objektoj.

Sub la Beijing-a Artaj-kompanio estas fabriko speciale por produkti imitaĵojn kaj kopiaĵojn de tiuj antikvaj objektoj. Jiguge ja estas ĝia vendejo.

Antaŭ nelonge mi vizitis tiun fabrikon. En ĝia salono videblas grupo da antikvaj militistoj kun siaj ĉevaloj. Tie estas argilaj figuroj de 2 m. altaj majestaj generaloj kun kasko kaj militistoj en kiraso aŭ en robo. La ĉevaloj kaj ĉaristoj faritaj el argilo estas versimilaj, kvazaŭ ili galopus al vi. Fakte, ili ne estas argilaj militistoj kaj ĉevaloj el la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio en la 3-a jc. a.K., sed novaj kopiaĵoj de ili.

En la ekspona salono de la fabriko troviĝas kopioj de argilaj laĵoj, bronzaĵoj, freskoj k.a. Tie estas imitaĵoj de bronza rinocero de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), de kruĉo kun ĉenoj kaj argilaj akrobatoj de Han-dinastio, de skulptitaj ŝtonaj budhaj bustoj de la Norda Wei-dinastio (384-534 p.K.), de

trikoloraj argilaj kantistoj, militistoj, kameloj kaj tombogardantaj bestoj de Tang-dinastio, de bronza tripieda kuirpoto de Zhou-dinastio (11-a jc.—771 a.K.), kaj de fresko en la tombo de princino Yongtai de Tang-dinastio. Tiu amasego da kopiaĵoj kaj imitaĵoj vere ĉarmigas la tutan salonon!

Ĉiuj ĉi objektoj estas artisme faritaj de lertaj laboristoj. Respondeculo de la fabriko diris, ke ili ne nur provizas la merkaton per siaj produktoj, sed ankaŭ servas al muzeoj kaj arkeologoj. La valoregaj kulturaj objektoj povas difektiĝi pro humideco kaj ŝanĝiĝo de temperaturo dum longtempa montrado. Por bone konservi ilin, oni devas fari ver-similajn kopiaĵojn por eksponi en la muzeo anstataŭ la originaloj. La laborejo produktas multspecajn objektojn, inkluzive argilajn militistojn kaj ĉevalojn du metrojn altajn, dentojn de simiohomoj kaj diversajn bron-zajn, ferajn kaj argilajn objektojn. Se oni metas tiujn imitaĵojn kaj elterigitaĵojn kune, estas malfacile distingi la fari-tajn disde la originalaj.

Poste mi venis al la argilaj-farejo. Ĉie, ĉu sur la tabloj aŭ sur la planko, staras imitaĵoj de trikoloraj argilaj ĉevaloj de Tang-dinastio kaj argilaj artistoj de Han-dinastio. Iu laboristino estis farbanta argilan ĉevalon per diversaj koloriloj. Ŝi diris, ke por kopii unu argilan figuron necesas procedoj de skulptado, modelado, formigado, bakado, polurado kaj malnovigado. La ĉevalo havas grandan similecon kun la originalo, ĉar la prilabora proceso estas preskaŭ sama al tiu de Tang-dinastio antaŭ pli ol mil jaroj.

En la bronzaĵ-farejo mi vidis, ke la laboristoj faras el bronzo,


oro kaj arĝento imitaĵojn de palaclanternoj kaj bestoj de Han-dinastio, kiuj bezonas saman kvanton da materialoj, kiom la originaloj. Fabrikite, la kopio devas esti malnovigita, por ke ĝi aspektu same kiel la originalo. Oni kovras la bronzan kopiaĵon per verdigraj makuloj, ke sur ĝi prezentiĝu korod-spuroj kaŭzitaĵoj de tero dum centoj aŭ miloj da jaroj.

Jam en Song-dinastio (960-1279) Ĉinio havis la arton kopii historiajn objektojn. Ekde tiam en Bejing jam estiĝis la entre-

prenejoj de kopiado de antikvaj bronzaĵoj, kaj tiu tekniko daŭris ĝis hodiaŭ. La metiartistoj povas ne nur kopii la kulturajn restaĵojn, sed ankaŭ doni la originalan formon al la dispecigitaj objektoj. Ili povas redoni la antaŭan aspekton al la difektitaj aŭ fenditaj porcelanaĵoj, argilaĵoj kaj bronzaĵoj post ĉ. dek komplikaj procesoj.

Antaŭ tiuj bone faritaj kopiaĵoj mi admiris tiujn laboristojn, ke ili ne estas ordinaraĵoj laboristoj, sed eminentaj artistoj.

Laborejo de trikolora farbado de imitaĵoj de argilaj ĉevaloj de Tang-dinastio



Japanaj turistoj aĉetas desegnaĵojn kopiitajn el bildoj sur brikegoj de Han-dinastio.



Ĉe la rokmuro Chibi

(La posta parto)

ĜUSTE en la mezo de la deka monato ĉijara, mi piede revenis de mia kampara vilao "Xuetang" al mia alia domo "Lingao". Du gastoj akompanis min, kaj ni trairis la deklivon de Huangni. Prujno kaj roso jam falis; arboj perdis ĉiujn foliojn. Ĉar estis tre reliefaj la ombroj de la homoj, mi rigardis supren al la ĉielo, kaj trovis la klaran plenlunon. Mi rimarkigis la gastojn pri ĝi, kaj kune ĝuis la belan noktan vidaĵon, dum ni paŝadis kune kantante. Tiam mi suspiris: "Estas gastoj, sed ne estas vino. Eĉ se estus vino, ne troviĝas almanĝaĵo. Tamen, kiel arĝenta estas la luno, kaj freŝa la venteto! Kiamaniere oni pasigu tian belan nokton?" Unu el la gastoj diris: "Hodiaŭ vespere, mi kaptis fiŝon per reto. Larĝa estas ĝia buŝo, delikataj estas ĝiaj skvamoj, ĝi similas al la perĉo de la rivero Songjiang. Sed de kie ni nur povus akiri vinon!" Reveninte hejmen, mi konsultis la edzinon. Ŝi diris: "Troviĝas bareleto da vino, kiun mi longe konservis en la kelo, por respondi al via urĝa bezono."

Ni do kunprenis la vinon kaj la fiŝon kaj alvenis refoje al la piedo de la rokmuro Chibi, por nin amuzi kune. Tiam la rivero fluis kun bruo ĉe la malsupro de la alta krutaĵo; la luno ŝajnis malgranda pro la altega monto, kaj la rifoj malkovris sian supron pro la malleviĝinta akvonivelo. Ne tre longa tempo forpasis de kiam mi antaŭe eks-

kursis ĉi tie, sed mi tute ne povis rekoni la tiamajn aspektojn de la rivero kaj la monto.

Mi levis la baskon de mia vesto, kaj grimpis sur malglatajn rokojn, trabatis la vojon tra densa herbaro. De temp' al tempo mi sidigis sur tigro- aŭ leopardo-formajn ŝtonegojn, surgrimpis drako-forman arbegon ĝis la nesto de falkoj, kaj rigardis malsupren en la profundon de la rivero por trovi la palacon de Nimfo. La du gastoj ne sekvis min.

Mi ekkriis per trena voĉo, kaj tiam mi sentis, ke herboj kaj arboj tremetas, montoj bruas kaj valoj eĥas, kaj ankaŭ la vento leviĝas, la akvo ondiĝas. Samtempe mia koro estis tuŝita morne kaj triste; mia korpo kuntiriĝis pro timo antaŭ la naturo, kaj mi ne povis tie plu resti.

Mi turnis min sur la kalkanoj kaj suriris la barketon, ĝin kondukis ĝis la mezo de la rivero, kaj ripoze kuŝis sur ĝi, lasante

ĝin drivi sur la fluo. Jam estis preskaŭ noktomezo, kaj estis kviete ĉirkaŭe. Ĝuste tiam gruo alflugis sola de oriento trans la riveregon. Ĝiaj flugiloj estis grandaj kiel radegoj, ĝi portis blankajn plumojn kun nigra vosto. Eligante akran klakon, ĝi tuj forflugis okcidenten preter nia barketo.

Baldaŭ la gastoj foriris, ankaŭ mi hejmeniris kaj enlitiĝis. En la sonĝo, mi vidis ermiton. Li en plumvesto flirte flugis en la aero, kaj preterpasante mian domon, riverencis kaj demandis min: "Ĉu vi ĝuas la ekskurson ĉe la rokmuro?" Mi petis lian nomon, li mallevis sian kapon sed ne respondis. Mi ekkriis: "Ho, mi rekonas vin! Ĉu tiu ne estas vi, kiu klakante preterflugis min la lastan nokton?" Ĉe tio la ermito rigardis min returnen kaj ridetis. Mi tre miris, kaj en la sama momento mi subite vekigis. Tuj mi malfermis la pordon, sed neniel povis diveni kiel li forflugis.

TRAD. SIGAR UJEKI

HUMURAĴO

**Ne difektu la
tigran felon**

Iu estis buŝkaptita de tigro. Por elsavi sian patron, la filo, kun tranĉilo en la mano, rapidis ĝin mortigi. La ulo kriegis en la tigra buŝo: "Filo mia, filo mia! Haku nur la tigran piedon kaj ne difektu la felon. Nur tiel ĝi valoros pli multe da arĝentaj moneroj!"

Beijing-a Internacia

Infanĝardeno

La infanĝardeno sidas en iu vasta kaj kvieta korto de Beijing. Tie vivas infanoj de pli ol 20 landoj inkluzive ĉinajn. Ili kune ludas, lernas kaj amas unu alian kiel gefratoj.

Fotoj de TANG YUMIN kaj ZHANG WEI

Jemena knabineto Roza kaj ĉina knabineto Xiaohong estas bonaj amikoj.






Flustrado



Infanoj faras gimnastikon.



Kiel interesaj ludiloj!



Korpoekzameno

Lukto de mongoloj

Luktantoj en intersaĝo de sperto



Junaj mongoloj en luktado





APERIS «PLENA VERKARO DE LUSIN», «KRONOLOGIAJ NOTOJ PRI LUSIN» K.A.

Por celebri la 100-an datrevenon de la naskiĝo de granda verkisto Lusin, multaj eldonejoj de Ĉinio eldonis kaj distribuis nombron da verkoj de Lusin kaj librojn pri li. La Popola Eldonejo de Beijing estas preta eldoni «Plena verkaro de Lusin» en 16 volumoj.

La Fremdlingva Eldonejo de Beijing eldonis lastatempe «Elektitaj Verkoj de Lusin» en kvar volumoj reviziitaj kaj pliriĉigitaj en la angla lingvo, «Elektitaj Poemoj de Lusin» kaj la novelkolektojn «Krioj» kaj «Vagado» en la angla lingvo, «Historia Skizo pri Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj» en la germana lingvo, k.a.

Krome, la Instituto pri Lusin sub la Muzeo de Lusin redaktis kaj eldonis «Kronologiaj Notoj pri Lusin» kaj «Albumo por la 100-a Datreveno de la Naskiĝo de Lusin». La antaŭa mallonge traktis pri liaj ĉefaj verkoj kaj leteroj kaj la lasta enhavas poemojn, artikolojn, traktaĵojn kaj rememoraĵojn skribitajn de eminentuloj, verkistoj kaj liaj parencoj.

LA DOKUMENTA FILMO «KANTO DE PIONIROJ» PROJEKCIATA

La granda dokumenta filmo «Kanto de Pioniroj», kiu prezentas la centjaran heroan batalon de la eminentaj ĉinaj gefiloj kaj vastaj popolamasoj por gajni naciliberiĝon de la ĉina nacio kaj ĝian socian progreson, estis projekciata en la tuta lando dum la filma semajno komencita de la 25-a de junio por celebri la 60-an datrevenon de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio.

La filmo konsistas ĉefe el historiaj dokumentoj kaj filmoj faritaj de ĉinaj kaj fremdlandaj filmistoj dum la lastaj pli ol cent jaroj. Nemalmultaj scenoj vivece montris la patriotismon kaj heroismon de ĉinaj revoluciuloj.

NOVAJ PROGRAMEROJ PREZENTITAJ EN BEIJING

Por celebri la 60-an datrevenon de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol 30 programeroj iris sur scenejoj de Beijing.

Inter ili sin trovis la dramo «Norden», kiu temas pri la Longa Marŝo de la Ĉina Laborist-Kampanara Armeo, kaj la dramoj «Heroa Generacio» kaj «Idealo Ankoraŭ Estas Bela», kiuj montris de diversaj flankoj la pasintecan kaj estantecon de Ĉinio kaj modlis figurojn de revoluciuloj.

Estis prezentitaj ankaŭ la opero «Morto de He Long», la baletto «Benopeta Ofero» kaj aliaj dramoj kaj operoj, kiuj estis kreitaj en la lastaj jaroj.

ARTISTA GRUPO DE RUMANIO VIZITIS BEIJING

Dum junio kaj julio ĉijare la artistista grupo de la Rumana Socialisma Respubliko sukcese turneis en la urboj Beijing, Guangzhou kaj Nanjing, kie ili ludis muzikinstrumentojn, voĉan muzikon, baletan kaj aliajn belajn programerojn. Inter ili troviĝis famaj verkoj de rumanaj komponistoj Enesco Georges kaj Ciprian Porumbescu, krome, ankaŭ verkoj kaj pecoj de la mondfama komponisto Franz Schubert. Ĉiuj ĉi tiuj donis al la ĉinaj aŭskultantoj plej agrablan ĝuon de arto.

KUNE LUDIS JUNAJ GEBALISTOJ DE ĈINIO KAJ USONO

Lastatempe, la Houston-a Baleta Ensemblo de Usono kaj la Baleta Ensemblo de la Beijing-a Danca Instituto kune prezentis klasikan kaj modernan baletojn en Beijing. Tio

estis la unua fojo por la ĉinaj kaj usonaj gebalistoj.

Ili kune ludis la hungaran pianan koncerton de Bela Bartok, la moldaviajn popoldancojn «Lavistino» kaj «Printempa Tajdo», la hispanan dancon el la baletto «Cigna Lago» kaj la trian akton de «Dormanta Belulino». Ilia prezentado estis aplaŭdata de la Beijing-aj spektantoj.

LA CENTRA INSTITUTO DE NACIMINORITATOJ EN SIA 30-JARA JUBILEO

La nomita instituto, kiun vizitas studentoj el pli ol 50 nacimalplimulatoj, solene celebris en junio ĉijare la 30-an jubileon de sia fondiĝo.

La instituto estis fondita la 11-an de junio 1951. Ĝia ĉefa tasko estas kulturi kadrojn kaj profesiajn teknikistojn por ĉinaj nacimalplimulatoj. En la pasintaj 30 jaroj ĝi kreskis de tri trejnaj kaj unu tibetlingva kursoj kun ĉ. 100 personoj al ĉefa altlernejo kun 8 ampleksaj fakultatoj kaj tri institutoj kun pli 4,500 personoj. Ĝiaj 15,000 diplomitoj laboras en diversaj regionoj de la lando.

ĈINIO SUKCESE FARIS GLOBINON KONTRAŬ LIMFOĈELO

Post multjara penado, Xie Yujin, profesoro de la Wuhan-a Viv-estaja Instituto, sukcese faris globinon kontraŭ limfoĉelo. Specialistoj trovis ĝin nova frukto de Ĉinio.

La globino kontraŭ limfoĉelo estas aparta imuna inhibitoro disvolviganta en la mondo en la posta periodo de la sesdekaj jaroj. Ĝin povas produkti nur nemultaj landoj. La produktaĵo de tiu instituto estis prove uzata en hospitaloj de Wuhan, Shanghai, Beijing, Jianyang k.a. Post akcepto de tia globino, iuj malsanuloj, kies hepato aŭ reno estis transplantita, travivis la minacon de imuna forpuŝo. 6 el la 9 agoniantoj resaniĝis post la kuracado per ĝi. La praktiko montris, ke la provaĵo havas bonan efikon sur iuj imunaj malsanoj en transplantado de organoj.



Lu Jiayi

Lu Jiayi—Nova prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj

EN la tempo, kiam la tuta lando brave marŝas al la landa modernigo, la gvidantaro de la Ĉina Akademio de Sciencoj faris elekton en majo ĉijare. La famkonata sciencisto Lu Jiayi estis elektita kiel prezidanto de la akademio.

La 66-jara Lu Jiayi havas profundajn sciojn pri fizika kemio, precipe pri struktura kemio. Dum la pasintaj 32 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio li faris multe da gvidaj kaj organizaj laboroj en instruado kaj sciencesplorado kaj kontribuis al kulturado de sciencistoj kaj teknikistoj kaj al disvolvo de studado pri struktura kemio de Ĉinio.

Li naskiĝis en la familio de instruisto, kiu devenis el Taiwan, de la urbo Xiamen, Fujian-provinco. Lia patro esperis, ke li studos pri literaturaj objektoj, tamen li interesiĝis pri matematiko, fiziko kaj kemio. Jam en la infaneco li montris sian talenton. 19-jara, li diplomitiĝis el la kemia fakultato de

Xiamen-universitato per bonegaj atingoj. En 1937 li trapasis la ekzamenon kaj komencis studi en Britio ŝtatpage. En la Kolegio de Londono-universitato li esploris pri la kondensiĝo de la halogena radioizotopo. Du jarojn poste, li akiris la titolon de doktoro en la nomita universitato kaj sekve venis al la Kaliforniaj Scienc-Inĝeniera Kolegio kaj Universitato en Usono por studi tie strukturan kemion.

Reveninte la patrolandon, li instruis en Xiamen-universitato. Liaj serioza kaj interesa lekcio, modesta laborstilo, senlaca instruado kaj kuraĝigo al la studentoj eldiri siajn opiniojn kaj organizo de alloga diskutado vekis admiron de liaj kolegoj kaj studentoj. En 1955 li estis komisiita kiel membro de la Departemento de Fiziko, Matematiko kaj Kemio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li dufoje partoprenis en planado pri la perspektivo de scienco kaj tekniko de Ĉinio. Li partoprenis en establo de Fuzhou-universitato

kaj poste funkciis kiel ĝia vic-direktoro. Krome, li fondis la esploran institucion pri struktura kemio. En 1962, fondiĝis la Orientĉinia Instituto pri Materia Strukturo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (t.e. la nuna Fujian-a Instituto pri Materia Strukturo) kaj li laboris kiel ĝia estro dum la pasintaj 19 jaroj.

En la lastaj jaroj li persone partoprenis kaj gvidis esploran laboron pri kemia modelado de biologia nitrogen-fiksado, kiu estas temo de fundamentaj teorioj alte taksata internacie. Nuntempe, la produktado de nitrogena sterko estas farata en alta temperaturo kaj alta premo. Por plenumi la ĉiam pliiĝantan bezonon de agrikulturo al kemia sterko necesas multege da homfortoj kaj materialoj ĉiujare. Sed en la naturo sin trovas iuj bakterioj, kiuj povas fiksi nitrogenon en la aero en normalaj temperaturo kaj atmosfero dank' al la funkcio de nitrogenazo en sia korpo kaj elfaras el ĝi amoniakon aŭ aliajn simplajn derivaĵojn uzeblajn por la viva-

joj. Oni esploras tion ja ĝuste por koni la rolon de nitrogenazo en katalizado kaj fiksado de nitrogeno kaj modeli kaj utiligi ĝin. Nun ĉiu lando en la mondo havas nombron da elstaraj sciencistoj okupataj en tiu fako.

Surbaze de la kemia teorio pri strukturo kaj la modelo de la aktiva centro de nitrogenazo prezentita de li mem, prof. Lu Jiayi invitis prof. Huang Wenkui de la Lanzhou-a Universitato kunlabori kun li. Farinte provan sintezadon per du malsamaj rimedoj de sintezo, ili gajnis modelaĵojn de du sistemoj. Ambaŭ modelaĵoj povas reformi acetilenon en etilenon kaj nitrogenon en amoniakon. Tiu rezulto havas profundan signifon por esplori kemian modeladon de biologia nitrogen-fiksado.

Somere de 1978 kaj vintre de 1980, li gvidis la delegaciojn de ĉinaj sciencistoj partopreni en la tria simpozio pri nitrogen-fiksado okazigita en Usono kaj en la kvara simpozio en Aŭstralio. En la simpozioj li konigis sian malkovron de struktura modelo de nitrogenazo, ĝia prova sintezo kaj struktura esploro kaj ricevis laŭdojn de alilandaj kolegoj.

Por premioj liajn kontribuojn en scienco, je la fino de 1979 la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio honoris lin kiel landan labormodelon. Post kiam li fariĝis prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, li laboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo. Li diris, ke li kaj ĉiuj aliaj sciencistoj de Ĉinio kuraĝigu sin reciproke, starigu al si la penson de mastro, laboru kiel mastro de la lando kaj faru kontribuon por efektivi la modernigon de scienco kaj tekniko de Ĉinio.

HONG YING:

Postlabora vivo plena de vigleco

VIGLA SCENEJO

Antaŭvespere de iu festo mi vizitis la Beijing-an Duan Tekstilan Fabrikon, kaj tie okazis prezentado de programeroj. Akompanate de Zhang Shaozhou, vicprezidanto de la laborsindikato de la fabriko, mi eniris la halon. Tiam iu mezaĝulino kun brila vizaĝo estis kantanta popolkanton de norda Shaanxi (Ŝenhi) sur la scenejo. Pro ŝia klara kaj sonora kantado oni varme ŝin aplaudis, ke ŝi kantu ankoraŭ. En akompano de akordiono, ŝi ekkantis la kanton "Koro de Knabino", kaj tiu vekis ridojn de la aŭskultantoj.

Dum la prezentado, mia akompananto Zhang sidanta apud mi mallaŭte konigis min pri la stato de ĉiu ludanto.

La Beijing-a Dua Tekstila Fabriko ofte okazigas tian postlaboran prezentadon. La ludantoj venas el la laborejoj kaj sekcioj. Plejparto de la ludantoj estis junaj laboristoj. Ili prezentis ĥoron, solon, dueton, dancon kaj deklamon, ludis elektran gitaron ktp. Iuj el la programeroj estis kreitaj de ili mem. Krome, la fabriko havas orkestron kun 60 membroj. Post ĉiufoja prezentado la fabrika

laborsindikato premias elstarajn programerojn. Kaj la elstaraj ludantoj kaj programeroj estos rekomenditaj por la postlabora prezentado de la tekstila branĉo kaj Beijing-aj laboristoj.

La postlabora kultura aktivado de la laboristoj kaj bonstavigo por ilia vivo estas prizorgataj de la fabrika laborsindikato. En la kabineto de la laborsindikato mi vidis grandajn kaj malgrandajn silkajn honorajn standardojn kaj laŭdatestojn pendantajn surmure. Zhang Shaozhou diris: "Disvolvi postlaboran prezentadon celas riĉigi kaj vigligi la kulturan vivon de laboristoj."

JUNA PARO AMANTA SIAN VIVON

Min profunde impresis jena sceno: Iu junulino estis bele kantanta la kanton "Dolĉa Vivo", en akompano de iu junulo per akordiono. Kiam li jetis rigardon sur la vizaĝon de la junulino, li pretervole milde ekridetis. Ŝajnis, ke ŝi kantas nur por li.

Tiam Zhang Shaozhou diris al mi: "La junulino nomata Meng Yushu estas fama kantistino de nia fabriko. La junulo, kiu nomiĝas Pei Wanyou, ludas

akordionon tre bone. Ili ambaŭ estas aktivuloj de prezentado. Surbaze de samaj hcbio kaj interesoj naskiĝis ilia amo, kaj ili geedziĝis antaŭ nelonge.”

Post la prezentado mi venis en ilian hejmon en la loĝkvartalo kontraŭa al la fabriko. Ilia apartamento inkluzivas kuirejon, necesejon kaj du ĉambrojn. Ilia dormoĉambro odoris nuptan atmosferon kaj estis bele meblita. Helverdaĵ fenestrokurtenoj, smeralda litkovrilo kaj pom-verda tablotuko. . . La tuta aranĝo impresas per kvieteco kaj komforteco. “Vi ŝatas la verdan koloron?” mi demandis la mastrinon. “Jes, la verda koloro estas pli harmonia kun la tero kaj simbolas vivipovecon.”

Pei Wanyou, diplomito de la teknika lernejo de la fabriko, ŝatas piedpilkadon, naĝadon, kantadon ktp. Kiam li eklaboris en la fabriko, tie ne estis orkestro nek akordionisto. Ĉiufoje kiam okazis prezentado en la

fabriko, oni devis peti orkestron de najbara fabriko por akompano. Por ŝanĝi tian staton, per malnova akordiono de la fabriko Pei sin ekzercis en sia hejmo, konsultante libron pri la akordionado. Li dediĉis preskaŭ sian tutan liberan tempon al lerno de akordionoludo. Post longtempa penado li jam povis ludi multajn muzikajn verkojn. Li estis tre okupata, kiam okazis prezentado aŭ balo en la fabriko. Pei estis honesta kaj milda kaj tial junaj laboristoj volontis amikiĝi kun li kaj lerni de li la ludon de akordiono. Lia hejmo estis ofte plena de gastoj.

La 24-jara Meng Yushu, gracia kaj kvietita, amas purecon kaj ĉiam tenas siajn ĉambrojn en bona ordo. Ŝi ŝatas kanti, legi novelojn kaj literaturajn gazetojn. Ŝi ankaŭ estas lerta en ŝpinado kaj estis ĉiujare elektita kiel avangarda laboristino de sia laborejo.

Ĉe la fino de nia interparolo

venis la bopatrino de Meng. Ŝi estas emerita laboristino de la sama fabriko. Ŝia edzo forpasis en 1974 pro malsano, kaj ŝi nun vivas kune kun siaj filo kaj bofilino. Ŝi estas serena, parolema kaj ankaŭ sana. Ŝi bonorde aranĝas siajn hejmlaborojn. Ŝi subtenas siajn filon kaj bofilinon en ilia postlabora aktivado. Kiam la juna paro estis ludanta akordionon kun kantado, la maljunulino estis aŭskultanta apude ĉiam kun rideto.

“HEJMO DE GEJUNULOJ”

En tiu fabriko troviĝas “Hejmo de Gejunuloj”, kiun oni povas viziti en mardo, merkredo, ĵaŭdo kaj vendredo. Post laborado, gejunuloj venas ludi ŝakon, vejĉion kaj tablotenison, aŭ lerni kursojn de fotografio kaj pentrarto. Plej vivoplenaj estas la ĥoristoj, kiuj kantas sub bela muziko.

Juna aktivulo Ma Guomin aliĝis al la postlabora ĥoro de la fabriko kaj partoprenis en la drama prezentado organizita de Chaoyang-distrikto, kie situas la fabriko. Li diris al mi: “Plejparto el la pli ol 2,000 gejunuloj de nia fabriko loĝas en la kolektiva loĝejo de la fabriko. Antaŭe ni havis malmultajn okazojn por amuziĝo post la laborado. La junuloj aŭ ludis pokeron aŭ babiladis senfine. La junulinoj aŭ preparis manĝaĵojn en la loĝejo aŭ iris trabutiki. Nun la laborsindikato de nia fabriko organizis por la gejunuloj enhavoriĉajn aktivadojn, kiel okazigo de sportkunvenoj kaj vizito al muzeoj. Nia fabriko starigis teamojn piedpilkan, korbopilkan, tablotenisan kaj volanan kaj ofte aranĝus matĉojn kun frataj fabrikoj. Tio kontentigis nin amatorojn, kaj nia vivo

Laboristinoj ekzercas sin per nodofarado en libera tempo.





Ili kantas post laboro.



Amatorinoj

fariĝis multe pli interesa ol antaŭe.”

Li Yong, 19-jara laboristo, bone dancas, tamen ne volis partopreni en kolektiva aktivado. Poste, li ĝoje akceptis la peton de la laborsindikato trejni amatorojn por kelkaj semajnoj. La programero kreita de li estis laŭdata de la rigardantoj kaj premiita kiel plej bona.

Oni ne nur kantas kaj dancas, sed ankaŭ vizitas la postlaboran kurson por sin klerigi.

En la loĝkvartalo de gejunuloj troviĝas postlabora lernejo bonvena al ili. Ĝia rektoro diris al mi: “Nun 80% de la fabrikaj gejunuloj vizitas tiun lernejon, kie estas 13 kursoj de la ĉina lingvo, algebro, fiziko, geometrio, fremda lingvo, elektro k.a. Iuj junuloj lernas en pluraj kursoj. Parto el ili post kelkjara lernado ekvizitis postlaboran, televizian aŭ ordinaraĵajn universitatojn.”

Ŝpinistino Yuan Xiuling, diplomito de malsupera mezlernejo, vizitis postlaboran lernejon en sinsekvaj jaroj por lerni la kursojn de supera mezlernejo kaj fakajn sciojn. En laborado ŝi kreis novan metodon en manipulado de kardomaŝino. Kaj

pro tio ŝi estis elektita kiel avangarda laboristino de la fabriko kaj lertulo de la Tekstila Buroo de Beijing.

BONA ARANĜO

La laboro kaj la vivo de la laboristoj ofte influas unu la alian. Laŭdire, antaŭ kelkaj jaroj la postlabora vivo de laboristoj de tiu fabriko ne estis tiel vigla kiel nun. Unu el la kialoj estis, ke tro streĉa laborado konsumis la tempon kaj energion de la laboristoj. Dum mia vizito maljuna laboristino Lu Fanluan rakontis al mi sian sperton.

Ŝi laboris jam pli ol 20 jarojn en tiu fabriko. La ŝpinistinoj kaj teksistinoj, ŝi diris, devas senĉese piediri dum sia laboro. Precipe en la pasinteco la fabriko praktikis triskipan laborsistemon kun ĉiusemajna alterno. Kiam oni havis urĝan taskon, oni devis longigi laborhorojn, kaj la nokta skipo estis eĉ sen ripozo en dimanĉo. Tiel oni dronis en konstanta laco.

Parolante pri la nuno, ŝi tuj vigliĝis. Ŝi diris, ke en 1979, la fabriko komencis praktiki 4-skipan laborsistemon, t. e. ĉiutage unu el la 4 skipoj povas ripozi.

Tiel la gelaboristoj povas havi pli da libera tempo por ripozi, fari hejmlaborojn kaj partopreni en postlabora prezentado, sportado kaj lernado. Kaj ilia vivo fariĝis pli kaj pli agrabla.

Lu Fanluan kaj ŝia edzo, teknikisto, laboras en sama laborejo. Ankaŭ ilia filo laboras en tiu fabriko. Ilia filino estas kontistino de iu butikoj. Ĉiumonate tiu 4-membra familio enspezas 255 juanojn kaj estas pli-malpli bonhava kompare kun aliaj. En postlaboraj horoj, ferioj kaj festotagoj, ili ĉiam volis fari sian vivon leĝera kaj agrabla, ekz. viziti aŭ filmteatron, aŭ parkon, aŭ parencojn kaj amikojn. La filino ofte rendevuas sian amaton. La filo estas okupata de pilkludo, ŝakludo kaj vizito al vespera kurso. Kaj la gemaljunuloj sin distras ofte per televido.

Kvankam Lu estas 45-jara, tamen ŝi aspektas sane kaj june. Japanaj amikoj, kiuj vizitis antaŭ nelonge la fabrikan loĝkvartalon, demandis ŝin, kiamaniere ŝi tenas sian bonan sanstato, kaj ŝi respondis: “Mi havas neniun alian manieron ol laboro malpeza, vivo agrabla kaj zorgo malmulta.”

Ili gajnis spektantojn

EN la premiaj aktivadoj okazigitaj de la ĉinaj filmistaj rondoj en la kuranta jaro, la talenta aktorino Zhang Yu ricevis la premion Or-koko kaj la premion Cent Floroj de la plej bona ĉefrolulino kaj la plej bona aktorino, Da Shichang — la premion Cent Floroj de la plej bona aktoro, kaj Xie Jin — la premion Or-koko de la plej bona reĝisoro.

La premio Or-koko okazis unuafoje ĉi-jare en nia lando. Por tio oni formis juĝkomitaton el influaj ĉinaj filmartistoj kaj kritikistoj. La premiitoj estis difinitaj laŭ la nombro de balotiloj.

La premio Cent Floroj aranĝita de la redakcio de la revuo "Popularaj Filmoj" okazis kvar-

foje, inkluzive de la ĉijara. Ĝi premiis tiujn, kiuj gajnis plej multe da balotiloj de ĝiaj legantoj. Zhang Yu gajnis pli ol 1.2 milionon el pli ol 2 milionoj da balotiloj.

Zhang Yu, 24-jara, estas nova ĉina filma stelulino. En la ĉijare premiitaj filmoj "Nokta Pluvo en Bashan" kaj "Amo ĉe Lushan-monto" ŝi ludis du rolojn kun diametre malsamaj karakteroj kaj per tio ricevis laŭdon de tre multaj rigardantoj. "Nokta Pluvo en Bashan" priskribas, kiel oni distingas bonon de malbono kaj pravon de malpravo en okazintaĵo en pasaĝera ŝipo sur Changjiang (Jangzi)-rivero dum 24 horoj en aŭtuna pluvo. En tiu filmo Zhang Yu ludas la rolon de junulino kun

radikala penso. En la filmo "Amo ĉe Lushan-monto" ŝi ludas ĉarman kaj dolĉan ĉinan elmigrantan fraŭlinon revenintan en sian patrolandon. La filmo kun la pitoreska turisma loko Lushan kiel sia fono priskribas, kiel filino de transmara kuomintanga generalo enamiĝis en filon de ĉina komunisto oficisto post hazarda renkontiĝo ĉe Lushan-monto, kaj per tio esprimas ilian amon al la patrolando kaj ilian sopiron al la lumo kaj feliĉo.

Zhang Yu ja ne studis en kolegio de arto. Foje, kiam ŝi estis mezlernejano, ŝi hazarde estis elektita de studio por neĉefa rolo. Kaj tiam ŝi debutis en film-arto. Dum la lastaj jaroj ŝi ludis rolon de knabineto pikema kaj petola,




Xie Jin (la dua de maldekstre)

kaj tiun de fiŝita knabino naiva kaj aminda, kaj nur en la lastaj du jaroj ŝi komencis ludi ĉefrolulinon. En la premi-kunveno en la lasta majo ŝi kun rideto tenis la pokalon de la premio Or-koko en unu mano kaj la pokalon de la premio Cent Floroj en la alia. Sed ŝi diris al mi serioze: “Arto estas neelĉerpebla. Mi devas ĉiam sperti, lerni kaj vivi kiel mi unuafoje eniris en la filmon.”

Da Shichang estas elstara ĉina filmaktoro de meza aĝo. En 1962 li diplomitiĝis el la Shanghai-a Filma Kolegio kaj komencis ludi en filmo. Li estas lerta en ludo de juna intelektulo. En sia unua filmo “Juna Generacio”, li ludis junan geologon, kiu evitas malfacilon kaj ĉasas plezurĝuadon dezirante vivi en la granda urbo. Post edukado de maljuna generacio, li korektis sian eraron kaj marŝis al la nova vivo. Li ludis tiun rolon kun lerteco, plena sento kaj simpla maniero. Li ludis la ĉefan rolon en pli ol dek filmoj. Li opinias, ke la aktoroj devas modli figurojn de diversaj tipoj. Li diris



Zhang Yu



Da Shichang

al mi sian deziron ludi kaj generalon kaj pajacon.

La 57-jara reĝisoro Xie Jin estas unu el la reĝisoroj bone konataj kaj tre ŝatataj de ĉinaj rigardantoj. Li ricevis la premion Or-koko de la plej bona reĝisoro per la de li reĝisorita filmo “Tio Okazis en Tianyunshan” kun tragedia karaktero. La filmo rakontas, kiel respondeculo de geologia taĉmento suferis persekutadon de sia superulo en Tianyunshan en la

50-aj jaroj pro sia studema laborstilo kaj opono kontraŭ vanta babilo pri politikaj aferoj. De tiam li travivis ĉiajn malfacilajn provojn de laboro, amo kaj vivo. Post 20 jaroj finiĝis la maljusta traktado kontraŭ li, kaj lia perdo de amo tamen estis nekompensebla. La reĝisoro simple kaj lirike priskribas kvar personojn ĉiu kun sia tipa karaktero. Estas aparte emocia la nobleco de la filma heroino. Antaŭ tio li ricevis ankaŭ premion de la plej bona reĝisoro per la filmo “La Ruĝa Virina Taĉmento” en la 60-aj jaroj.

Ye Nan (la dua de maldekstre)



Ye Nan, la aŭtoro de la filmo “Nokta Pluvo en Bashan”, ricevis la premion de la plej bona scenaristo. Li estas scenaristo kun profunda arta scio. Liaj verkoj karakteriziĝas per multa implico kaj daŭra intereso. Ĉinaj filmaj kritikistoj montris, ke la filmoj faritaj de ĉinaj studioj en 1980 estis pli riĉaj en temo ol tiuj en 1979 kaj rimarkinde progresis ilia esprimo de la vasta kaj profunda vivo kaj ilia arta lerteco. Estas ĝojinde, ke aperis nemalmultaj novaj filmaj steloj.

“Mi preferas morti por sendependeco”

— *Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Kemal*

LA 19-a de majo ĉijare estis la 100-a datreveno de la naskiĝo de Kemal, la fondinto de la Turka Respubliko. En 1881 li naskiĝis en Salonika sur nord-orienta Balkana Duoninsulo. Tiu loko nun apartenas al Grekio. Lia origina nomo estis Mustafa, kaj poste li alinomiĝis Kemal, kiam li studis en la Salonika-a Milita Lernejo. Je la 24-a de novembro, 1934 la Granda Nacia Parlamento de Turkio honoris lin per “Atatürk” — la patro de Turkio por laŭdi liajn meritojn starigitajn en la naciliberiga movado kaj fondo de la respubliko, tial lia kompleta nomo estis Mustafa Kemal Atatürk.

Post kiam Kemal finis studon en la Istanbula Milita Lernejo en 1905, li estis sendita al la Damaska Kvina Armegrupo de Turkio por militservi. Dum la servado en kavalerio, li proprakule vidis korupton kaj senkapablecon de la Otomana Imperio, kaj kune kun siaj samideanoj fondis sekretan organizon “Societo de Patrio kaj Libereco” la Makedona Tria Armegrupo kaj partoprenis en diversaj aktivecoj aranĝitaj de la “Organizo de Unuiĝo kaj Progreso”. En 1911 Italio invadis Tripolon. Sub lia komando la turkaj trupoj gajnis venkon en la unua batalo. Post la eksplodo de la Unua Mondmilito en 1914 li funkciis kiel estro de la 19-a Divizio kaj poste estis promociita al generaleco pro militaj meritoj.

En la milito Turkio, kiel membro de la Aliancitaj Landoj, estis venkita kaj turniĝis en duonkolonion. Kemal estis tre malkontenta pri humiliĝo de la kompradora burĝaro, la sultano kaj la registaro de la Otomana Imperio antaŭ la Entento. Je la 19-a de majo 1919 li venis al Anatolio, kie vigle disvolviĝis la naciliberiga movado. Tie li faris alvokon al oficiroj kaj provincestroj de la tuta lando kune defendi la naciajn rajtojn kun la celo fondi novan Turkion. Li unuigis la rajtodefendajn ligojn en la Komitaton de Rezentantoj kun li kiel la ĉefo por gvidi la naciliberigan movadon. En marto de 1920, la brita infanterio okupis la ĉefurbon Istanbulo de la Otomana Imperio kaj malorganizis la parlamenton. Je la 23-a de aprilo de la sama jaro, Kemal kunvokis en Ankaro novan Grandan Nacian Parlamenton, kiu elektis lin kiel prezidanton kaj proklamis, ke ĝi estas la unika leĝa regpotenco de Turkio. Ĝi deklaris al la mondo, ke la turka popolo ne agnoskas la humiligan Sevres-an Traktaton altruditan al ĝi de la potencoj de la Entento. Por devigi Turkion akcepti la kondiĉojn difinitajn en la traktato, la Entento ekspedis siajn trupojn por fari atakon al la interna parto de Anatolio. La parlamento elektis Kemal kiel la ĉefkomandanton de la Nacia Armeo, kaj sub lia gvido la turka armeo venkis fremdlandajn trupojn atakantajn al Ankaru kaj gajnis

brilan triumfon ĉe Sakaryarivero, tiel ke sendependeco de Turkio havis garantion.

En la 29-a de oktobro 1923 fondiĝis la Turka Respubliko, kaj ekde tiam finiĝis la pli ol 600-jara feŭda regado de la Otomana Imperio. La 42-jara Kemal estis elektita kiel la unua prezidanto de la respubliko, kaj li laboris sur tiu ĉi posteno ĝis li forpasis de malsano la 10-an de novembro, 1938. Dum la 15 jaroj li faris enlande multajn gravajn reformojn, ekz., aboli religian privilegion kaj apartigi regpotencon de religio, kaj tiel antaŭenpuŝis la socion; en la eksteraj politikoj li abolis la Sevres-an Traktaton, devigis la Ententon eltiri siajn trupojn el Turkio kaj fondis amikajn rilatojn kaj subskribis amikajn traktatojn kun najbaraj landoj. Post la forpaso de Kemal, sekvante liajn vortojn “Mi preferas morti por sendependeco”, la turka popolo faris senlaca batalon por defendi sian patrolandon.

Kemal, la nacia heroo de Turkio, faris brilajn kontribuojn al la sankta afero kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo kaj por la naciliberigo kaj patria sendependeco. Pro siaj historiaj meritoj li ĝuis grandan estimon ne nur de la turka popolo sed ankaŭ de alilandaj popoloj.

UNESKO decidis, ke la jaro 1981 estas jaro de Atatürk. Multaj landoj okazigis aktivecojn pri tiu datreveno,



Ĉina direktisto Huang Yijun (la dua de maldekstre), bivisto Liu Dehai (la kvara de maldekstre) kaj direktoro de la Berlina Filharmonia Orkestro Girth (meze)

Ĉinaj muzikistoj en okcidenta Berlino

de HONG SHANNAN

ESTAS aparte utilaj la internaciaj kontaktoj por muzikista rondo. En aŭtuno de 1979, la Berlina Filharmonia Orkestro, gvidata de la famkonata direktisto Herberta von Karajan, vizitis Ĉinion. Iliaj tri grandaj koncertoj en Beijing skuis la ĉinan muzikistan rondon. Invitite de la Berlina Filharmonia Orkestro, en la lasta februaro, Huang Yijun, estro kaj direktisto de la Shanghai-a Filharmonio de Ĉinio, kaj bivisto Liu Dehai de la Ĉina Centra Filharmonio, donis en Berlino tri grandajn koncertojn, kunlabore kun la gastigantoj.

La Berlina Filharmonia Orkestro ĉiujare invitas mondfamajn direktistojn el malsamaj landoj por kunlabori kun ĝi, sed estis la unua fojo en ĝia historio de 99 jaroj inviti ĉinajn direktiston kaj ludiston de nacia muzikilo por kune prezenti.

SENPRECEDENCA KONCERTO

Komence de februaro ĉijare, aŭskultantoj de la okcidenta Berlino legis distingiĝan programon, sur kiu estis skribite: Simfonia muziko «En Mez-Azio» de A. P. Borodin, biv-konĉerto «Fratinetoj sur la Stepo» de Wu Zuqing, Wang Yanqiao kaj Liu Dehai kaj la sim-

fonio «Nova Mondo» de A. Dvořak.

Laŭ regulo, la koncerto venas al sia kulmino post finiĝo de la lasta programero, tamen, la koncerto donita de la Berlina Filharmonia Orkestro la 2-an de februaro rompis la rutinon. Post ludo de la bivkonĉerto «Fratinetoj sur la Stepo», la tuta halo eksplodis per ŝtorma kaj longtempa aplaŭdado. Liu Dehai dankis la aŭskultantojn plurfoje, tamen la aplaŭdado ankoraŭ ne ĉesis. Tiukaze li devigite aldone ludis alian muzikopecon. La unua violonisto prof. Schwalbe persone elpaŝis anonci por li. Kiam li deklaris aldone ludi «La Printempa Neĝo», la tuta halo ankoraŭfoje eksplodis per ŝtorma aplaŭdado. Sed, la halo tuj silentiĝis, kiam la bivo eksonis. Pli ol 2,200 spektatoroj absorbiĝis en la orienta klasika muziko. Je la fino de la ludo eksplodis denove varma aplaŭdado kaj multaj eĉ piedbatis de ĝojo.

Estis tiel sukcesaj ankaŭ la koncertoj de la 4-a kaj 5-a de februaro. Vespere de la 5-a de februaro direktoro de la Filharmonio s-ro Girth speciale regalis la ĉinajn muzikistojn per privata bankedo, fervore dirante: "Hodiaŭ estas la

Printempa Festo de Ĉinio. Vi estas kaj niaj amikoj kaj niaj muzikistaj senditoj el Ĉinio." Li diris plue: "Ĝenerale, fremdlandaj artaj trupoj ne faras aldonan prezentadon, ankaŭ la Berlina Filharmonia Orkestro ne faras la samon en kaj ekster la lando. Tamen via ludo ne povis finiĝi sen aldonado. En la lasta prezentado oni eĉ rompis la rutinon en aprezado de simfonio, t.e., ili aplaŭdis en la paŭzo de ĉiu movimento, kaj la aplaŭdado daŭris eĉ post kiam la orkestro descendis de la scenejo."

REVIZITON EN LA 100-JARA JUBILEO DE LA FONDIĜO DE LA ORKESTRO

La amikoj de okcidenta Berlino varme laŭdis la prezentadon de la du ĉinaj muzikistoj. «Matena Ĵurnalo de Berlino» montris, ke s-ro Huang Yijun estas ĉefa reprezentanto de ĉinaj kolegoj, kiuj okupiĝas pri la okcidenta muziko, kaj gvida persono de la Shanghai-a Filharmonio. Liaj konciza direktado, sugesto ĉe la komenco kaj pozo de direktado sentigis eŭropan stilon. Spreitz, la estro de la Leibnitz-a Asocio de okcidenta Berlino sub la Internacia Organizo de Kultura Interŝanĝo, recenzis: "Mi neniam

Pri la internacia jaro de handikapitoj

LA redakcio de El Popola Ĉinio ĝoje ricevis de la novjorka oficejo de UEA komunikon pri la Internacia Jaro de Handikapitoj. La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj tiel nomis la jaron 1981, kun la celo vekti la mondan konscion pri tiu komplika problemo. Almenaŭ 500 milionoj da homoj en la mondo estas handikapitaj.

Laŭ la informo entenita en la komunikon, rilate al la termino "handikapito" jam komenciĝis diskutoj kaj interŝanĝoj de spertoj inter la evoluintaj kaj evoluantaj landoj por starigi internacian difinon surbaze de komparado de leĝoj kaj praktikoj.

La komunikon diris plue, ke la problemoj de la handikapitoj mal-

samas de unu lando al alia, sed unu komuna problemo estas ilia integriĝo en la socion. Pri ties solvo Ambasadoro Kikhia, prezidanto de la Organiza Komitato de la Jaro, sugestis: "Ni bezonas sociajn servojn, sed ni ankaŭ devas eduki la familion, eduki la handikapitojn mem kaj eduki iliajn familianojn pri tio, kiel helpi ilin estiĝi efikaj anoj de la socio."

La Komitato havas ankaŭ aliajn grandajn zorgojn. Ĝi okupiĝas, en kunlaboro kun la Monda Organizo pri Sano, pri metodoj por redukti handikapigon pro malsano, akcidentoj kaj hereditaj difektoj. Ĝi laboras por kolekti financan helpon el registaraj kaj neregistaraj fontoj.

Krome, ĝi faras sian eblon rekte helpi al la unuopaj registaroj kunordigi kaj evoluigi siajn servojn por handikapitoj por atingi plej efikajn kaj humanajn rezultojn.

Necesas aldoni ĉi tie, ke la novjorka oficejo de UEA ankoraŭ produktos en la venontaj monatoj serion da gazetaraj komunikoj pri la laboro de UN, por ke la esperantistoj sciu pli detale pri la tasko de la ĉefa monda organizaĵo. Ni ankaŭ alvokas niajn legantojn helpi la novjorkan oficejon de UEA per kontribuoj al la Fondajo UN/Unesko de UEA aŭ per tio, ke ili fariĝu Amikoj de la Oficejo ĉe UN (\$100 por Subtenantoj, \$10 por ordinaraj membroj de la Amikaro). Donacojn oni povas sendi aŭ al perantoj de UEA aŭ senpere al: Oficejo por rilato kun UN, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, Usono.

ĝuis tiel elegantan prezentadon, kiel faris s-ro bivisto Liu Dehai. Estas ekstreme malofte vidate, ke kiel ludisto de la orienta muzikilo, li povas elektri la nekonatajn spektatorojn kun tre alta aprezkapablo tuj ĉe la komenco de la ludo. Mi estas kortuŝita de lia elstara prezentado."

Stern, violonisto de la Filharmonio, krom partopreni en prezentado, ankaŭ faris profundan diskutadon kun direktisto Huang pri la strukturo de muzikverkoj ĉinaj kaj eŭropaj kaj pri la dispozicio de periodoj de muziko. Li laŭdis, ke mirinda sukceso estas, ke ili bone kunlaboris en sia prezentado.

S-ro Girth alte taksis la viziton de la ĉinaj muzikistoj. Li diris: "Ni komencis nian kunlaboron jam ekde 1979, kaj ni devas daŭrigi ĝin. La venonta jaro estos la 100-jara jubileo de la fondiĝo de nia filharmonio. Ni invitos vin refoje prezenti ĉi tie. Ni esperas, ke vi donos al ni novan bivan koncerton kaj venos kune kun vi ankaŭ la nova bivistino Liu Guilian."

S-ro Girth kaj ŝi konatiĝis hazarde. En 1979, kiam la filharmonio vizitis Bejing, ĉe la bankedo aranĝita de la Ĉina Kultura Ministerio, juna muzikistino Liu Guilian prezentis solludon de bivo por la gastoj, kiu impresis neforgeseble la gastojn kaj la lastaj faris inviton.

LECIONON PRI BIVO AL LERNANTOJ


Liu Dehai per sia bivoludo akiris la koron de la aŭskultantoj de okcidenta Berlino. Por konigi la antikvan orientan muzikilon al la eŭropa publiko, proponate kaj aranĝate de Stern, li dufoje donis lekciojn pri bivo al la element- kaj mezlernejoj en okcidenta Berlino.

Antaŭtagmeze de la 5-a de februaro, akompanate de Stern, li lekciiis por la lernantoj. Li kaj diskonigis la trajtojn kaj funkciojn de bivo kaj siajn travivaĵojn pri bivludado, kaj faris demandojn ludante. Komence kun miro la lernantoj aŭskultis lian lecionon, kaj iom poste, ili ensorbiĝis en leciono. Post kiam li ludis kaj analizis mu-

zikon, la lernantoj konkure diris al li la komprenon kaj opinion pri la ludado. Iuj el ili rimarkis, ke la ĉina nacia muziko estas sana, optimisma, edifa, facile komprenebla kaj utila por hardi la homan karakteron, aliaj demandis kiel akiri bivon, triaj petis lin instrui kiel ludi, kaj la kvaraj esprimis sian deziron lerni bivludon en Ĉinio.

Kiam li estis ludanta la ĉinan antikvan muzikon "Dalang Taosha" por fini la lecionon, la tuta halo boligis de admiro. Ĉ. 300 junaj lernantoj hurais de ĝojo, la fajfado kunfandiĝis kun piedbato. Tia sceno estis neniam spertita eĉ por Liu Dehai en lia ludhistorio de 30 jaroj.

La lekcio pri bivo eksterlande estas nova provo. Kiel diris iu amiko el okcidenta Berlino: "Estas bona fenomeno malofte konata en la historio de muziko, ke la ĉina ludisto estas tiel varme akceptita en la okcidenta Berlino. Ĝia profunda influo superis eĉ grandan koncerton."



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

Kontraŭjapana Rezistmilito (1)

de ZHANG BAOGUI

En 1936, organize kaj ekonomie plenuminte sian preparon de atako kontraŭ Ĉinio, la japanaj imperiistoj faris multajn konkretajn militajn dispoziciojn. Ili senĉese ekspedis trupojn al norda Ĉinio, konstruigis fuortojn ĉe Gubeikou kaj Fengtai apud Beiping (Pekino) kaj tie starigis multajn garnizonojn. Krome ili sendis multajn militŝipojn al Qingdao, Shanghai (Ŝanhajo) kaj aliaj ĉefaj havenoj de Ĉinio por fari minacon. Samtempe kun tio pli kaj pli multiĝis la provokaj eventoj fari-taj de la japanaj agresantoj kun diversaj pretekstoj en norda Ĉinio kaj aliaj regionoj. En 1937 Japanio transpostenigis parton de siaj elitaj trupoj en nordorienta Ĉinio al Beiping kaj Tianjin. Tiamaniere ili faris plenan preparon por grand-skale agresi Ĉinion.

En Ĉinio, post la paca solvo de la Xi'an-a Evento unuapase formiĝis la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto, kiu tamen ankoraŭ ne firmiĝis. La centra registaro de Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) praktikis kompromisan politikon al Japanio. Britio kaj Usono alprenis sintenon de apudstarantoj pri la agreso de Japanio kontraŭ Ĉinio. Ĉio ĉi tio estis favora al la japana agreso.

LA LUGOUQIAO-A EVENTO

En junio de 1937, Japanio sendis du regimentojn de sia garnizono en norda Ĉinio kaj Tianjin al Fengtai, kaj faris provokan militan manovradon apud Wanping-gubernio en la antaŭurbo de Beiping. Vespere de la 7-a de julio la japana trupo manovranta apud la ponto Lugou-qiao postulis lasi ĝin eniri en la gubernian urbon Wanping kaj fari

traserĉon, pretekstante ke unu japana soldato "perdiĝis". Kiam tiu absurda postulo estis rifuzita de la ĉina trupo, la japana trupo tuj kanonis kontraŭ la gubernia urbo kaj la ponto. Antaŭ tio la 29-a armeo sub la gvido de Song Zheyuan tie garnizonanta brave leviĝis por rezisto. En la batalo sinsekve mortis vicarmeestro Tong Linge kaj estro de la 132-a divizio Zhao Dengyu. Tio estis la fama Lugou-qiao-a Evento.

Post la evento, kiam la ĉina nacio troviĝis en kriza momento, la kuomintanga registaro de Jiang Jieshi ankoraŭ hezitis en la rezisto revante solvi la konflikton per diplomatia vojo. La centra registaro kaj la loka instanco de norda Ĉinio faris sekretan traktadon en Tokio kaj Tianjin kun Japanio, kiu konsentis tion fari nur por nebuligi la okulojn de Ĉinio. Dum la traktado ĝi senĉese sendis militistojn al norda Ĉinio. En la fino de julio la japanaj trupoj okupis sinsekve Beiping kaj Tianjin. Post tio, por efektiviĝi la strategion "subjugigi Ĉinion en tri monatoj", la japanaj armeoj komencis atakon al orienta Ĉinio kaj intencis okupi Shanghai, rekte minaci Nanjing kaj devigi la registaron de Jiang Jieshi kapitulaci. Je la 9-a de aŭgusto du japanoj kun provoka intenco en aŭto sturmis la Hongqiao-an Aerodromon de Shanghai kaj estis pafmortigitaj de la ĉinaj gardistoj. Sub tiu preteksto la japanaj imperiistoj komencis ataki Shanghai. Je la 13-a de aŭgusto la japana armeo kanonis kontraŭ la Zhabei-a Distrikto de la urbo, kaj renkontis bravan reziston de la 5-a armeo de Kuomintang gvidata de armeestro Zhang Zhi-

zhong, tiel eksplodis la Shanghai-a milito. La japana atako al Shanghai rekte minacis la regpotencon de Jiang Jieshi kaj ankaŭ la ekonomiajn interesojn de la subteniloj de lia registaro — egbienula klaso kaj egburĝaro. Ankaŭ tio akriĝis la kontraŭdirojn inter la japana imperiismo kaj la usona kaj brita imperiismoj subtenantaj Jiang Jieshi. Nur tiam la kuomintanga registaro publikigis deklaron "praktiki sindefendon kaj rezisti al la perforto" en la 14-a de aŭgusto. Ekde tiam Ĉinio komencis la sanktan nacian revolucian militon kontraŭ la agreso de la japana imperiismo, t.e., Kontraŭjapanan Rezistmiliton.

FORMIĜO DE LA KONTRAŬJAPANACIA UNUECFRONTO

En la 8-a de julio post la Lugou-qiao-a Evento, la Komunista Partio de Ĉinio publikigis al la tuta lando deklaron pri batalo kontraŭ Japanio, alvokante ĉiujn samlandanojn unuigi por "forpeli la japanajn rabistojn el Ĉinio!" kaj "defendi la patrolandon ĝis la lasta spiro!" Ĝi montris, ke "nur la rezistmilito de la tuta nacio estas la eliro de nia lando", alvokis la popolon fondi kaj firmigi la kontraŭjapanan nacian unuecfronton kaj proponis, ke Kuomintang kaj la Kompartio efektiviĝu intiman kunlaboron surbaze de rezisto kontraŭ la novaj atakoj de la japanaj armeoj.

La tutlanda popolo varme subtenis la alvokon de KPC, ĝi mobili-zigis kaj faris kontraŭjapanajn kaj nacisavaajn aktivadojn. Laboristoj, studentoj kaj urbanoj de Beiping

mobilizitaj de nacisavaj organizoj aktive partoprenis en diversaj laboroj por rezistmilito. Ĉiuj patriotaj organizoj kaj multaj famaj personoj de Ĉinio unuj post aliaj faris deklarojn kaj paroladojn por subteni la rezistmiliton. Ankaŭ diverslokaj gazetaroj sinsekve publikigis artikolojn pri rezistmilito kaj nacisavo. La popolanoj de diversaj tavoloj de la lando unuvoĉe postulis, ke la kuomintanga registaro tuj faru militon kontraŭ Japanio.

Je la 15-a de julio KPCĉ donis al la kuomintanga registaro la "Deklaron de la Komunista Partio de Ĉinio por kunlabori kun Kuomintangoj", en kiu ĝi proponis mobilizi la tutan nacion al la rezistmilito, praktiki demokration, plibonigi la popolan vivon kaj donis kvar garantiojn — plene praktiki la tri popolajn principojn (naciismo, demokratio kaj bonstato) de D-ro Sun Jatsen, ĉesigi perfortan aktivadon kontraŭ la kuomintanga registaro, aboli la sovetan regionon kaj reorganizi la ruĝan armeon. Je la 17-a de julio la reprezentantoj de KPCĉ Zhou Enlai kaj aliaj faris traktadon kun Jiang Jieshi sur Lushanmonto. En la traktado Jiang Jieshi rekonis la registaron de la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Lim-regiono sub la gvido de KPCĉ. La 25-an de aŭgusto la Milita Komisiono de CK de KPCĉ donis ordonon reorganizi la Ĉinan Laborist-Kamparanan Ruĝan Armeon de 30,000 militistoj en la Okavojan Armeon de la Nacia Revolucia Armeo kaj nomumi Zhu De la ĉefkomandanto kaj Peng Dehuai la vicĉefkomandanto. Poste, ĝi reorganizis la ruĝan armeon de 12,000 militistoj gerilantaj en sudaj provincoj en la Novan Kvaran Armeon de la Nacia Revolucia Armeo kaj nomumis Ye Ting la armeestro. La Oka-voja kaj la Nova Kvara Armeoj tuj marŝis al la frontoj de norda kaj centra Ĉinio laŭ la ordono por batali kontraŭ japanaj agresantoj.

Premate de la persista batalo de KPCĉ kaj la publika opinio de la tut-

landa popolo, la 23-an de septembro Jiang Jieshi faris paroladon, en kiu li rekonis la leĝan pozicion de KPCĉ en la tuta lando kaj akceptis la proponon de KPCĉ pri kunlaboro de Kuomintango kaj KPCĉ por rezisti kontraŭ Japanio. Tiel formiĝis la Kontraŭjapana Nacia Unuecfrento proponita de KPCĉ kiu kreis favorajn kondiĉojn por la granda kontraŭjapana nacisava afero.

PASIVA REZISTO DE LA REGISTARO DE JIANG JIESHI

Kvankam la kuomintanga registaro de Jiang Jieshi devigite praktikis la politikon rezisti kontraŭ Japanio, ĝi tamen tre timis la vekiĝon de la popolo kaj kreskon de la popolaj armitaj fortoj en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tial li malaprobis la proponojn de KPCĉ mobilizi, organizi kaj armi la popolon, oponis kontraŭ la demokratiaj postuloj de la popolo kaj ĉie limigis kaj persekutis kontraŭjapanajn amasajn organizojn. Ĉar Jiang Jieshi praktikis la politikon rezistmiliti sole de la registaro kaj armeoj, tial la popolamasoj de multaj lokoj ne povis efike subteni la rezistmiliton. Samtempe kun tio la kuomintangaj armeoj alprenis erarajn strategiojn kaj taktikojn en la milito, frontante al la atako de la potencaj malamikoj ili faris nur pasivan defendon por gardi iujn urbojn kaj regionojn, sed ne koncentris siajn ĉefajn fortojn por ekstermi la vivajn fortojn de la malamikoj. Krome, la konfliktoj inter sektoj kaj kontraŭdiroj inter oficiroj kaj soldatoj multe malgrandigis la batalfortojn de la kuomintangaj trupoj, kio finfine kaŭzis malvenkan retiriĝon de iliaj trupoj sur la ĉefaj batalkampoj.

En la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la japanaj trupoj praktikis strategion "rapide batali kaj rapide fini la militon" kun intenco subjugigi Ĉinion en tri monatoj. Tial ili atakis tre furioze. Kvankam la kuomintanga registaro metis ĉ. 800,000 militistojn sur la batalkampon de norda Ĉinio, tamen

tiuj ofte retiriĝis tuj je renkontiĝo kun la malamikoj senbatale, iuj kuomintangaj trupoj retiriĝis eĉ centojn da km. unufoje, lasante la japanajn trupojn senbare marŝi en tiujn lokojn. La japanaj militistoj ĉie faris bruligon, mortigon kaj rabadon senbride, kio dronigis nian popolon en senprecedencan suferon. En unu monato post la Lugouqiao-a Evento, la kuomintangaj trupoj perdis Beiping kaj Tianjin. Okupinte tiujn du urbegojn, la japanoj en kvar kolonoj atakis la provincojn Shanxi, Henan, Shandong kaj Suiyuan. Konkeri Shanxi estis la ĉefa celo de la japanaj armeoj en norda Ĉinio. En la unua tagdeko de aŭgusto, la japanaj armeoj atakis Nankou kaj Zhangjiakou laŭ la Beiping-Suiyuan-a Fervojo por malfermi la vojon al Shanxi. Unue la kuomintangaj trupoj tie garnizonantaj faris defendon, sed en la lasta tagdeko de la sama monato, ili forlasis la lokojn kaj en la unua tagdeko de septembro forlasis plue la gravan urbon Datong de Shanxi. En la dua tagdeko de oktobro kuomintanga generalo Wei Lihuang koncentris 16 diviziojn en Xinkou kaj faris kampanjon, kiu daŭris ĉ. duonmonaton kaj en ĝi pli ol 30,000 japanaj militistoj estis mortigitaj. En la komenco de novembro liaj trupoj forlasis Xinkou kaj baldaŭ ankaŭ la strategie gravan lokon Taiyuan. Ankaŭ en la aliaj lokoj la kuomintangaj trupoj ne faris rezistojn, kaj forlasis la urbojn defenditajn de ili. Marte de 1938 preskaŭ la tuta norda Ĉinio falis en la manojn de la malamikoj.

En centra Ĉinio, la japana armeo komencis ataki Shanghai en la 13-a de aŭgusto de 1937. Aktive subtenate de la popolo la kuomintangaj trupoj garnizonantaj en Shanghai persistis en la batalo kontraŭ la agresantoj dum tri monatoj kaj forlasis ĝin en la 11-a de novembro. Post tio la japanaj trupoj atakis Nanjing, la sidejon de la centra registaro de Kuomintango kiu deklaris sian translokiĝon al Chongqing de Sichuan-provinco. Je la 13-a de decembro la kuomintanga registaro re-


tiriĝis el Nanjing, kaj post tiam la urbanoj dronis en senprecedenca katastrofo. En pli ol unu monato triono de la domoj en la urbo estis forbruligita kaj pli ol 300,000 loĝantoj masakritaj. Ekde marto de 1938 la japanaj trupoj atakis Xuzhou de sude kaj norde. Tiam kuomintangaj trupoj de pli ol 400,000 militistoj komandataj de generalo Li Zongren faris grandan kampanjon en Taierzhuang de Xuzhou kaj ekstermis pli ol 20,000 japanajn soldatojn, dume ankaŭ la kuomintangaj trupoj suferis grandan perdon. En la mezo de majo la kuomintangaj trupoj forlasis Xuzhou kaj retiriĝis al la orienta Henan-provinco kaj norda Anhui-provinco. Por sin savi el la malvenko, ili eĉ breĉis digon de la Flava Rivero por malhelpi la malamikojn, tio dronigis 890,000 ĉinajn popolojn, sed ne haltigis la japanojn. Post tio la japanaj trupoj en suda kaj norda kolonoj sieĝis Wuhan. La kuomintangaj trupoj iom rezistis ekster la urbo kaj forlasis ĝin en la 25-a de oktobro. Antaŭ tio, la granda urbo Guangzhou (Kantono) en suda Ĉinio jam estis konkerita de la japanaj trupoj. Ĝis tiam la ĉinaj provincoj Jiangsu, Anhui, Henan, Jiangxi, Guangdong kaj Hubei falis en la manojn de la malamikoj. En unu jaro kaj tri monatoj la kuomintangaj trupoj retiriĝis de Beiping, Tianjin, Shanghai, Guangzhou kaj Wuhan al Sichuan. Tio estis neevitebla rezulto de la eraraj politikoj de pasiva rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj kaj pura defendo praktikataj de la kuomintanga registaro.


Kontraste kun la malvenka retiriĝo de la kuomintangaj trupoj, la Komunista Partio de Ĉinio prenis sur si la penigan taskon rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. Sin direktinte post la malamikojn, la Okavoja kaj Nova Kvara Armeoj starigis kontraŭjapanajn bazlokojn en la malfronto de la malamikoj, kaj la batalkampoj de la liberigitaj regionoj fariĝis la ĉefaj lokoj por batali kontraŭ la japanaj trupoj.

(Daŭrigota sur la venonta numero)

SKIZA MAPO PRI LA ATAKO FARE DE JAPANAJ ARMEOJ EN LA KOMENCA PERIODO DE LA KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO

- | | | |
|----------------|------------------|-----------------------|
| 1. Shenyang | 14. Fenglingdu | 27. Nanchang |
| 2. Shanhaiguan | 15. Tongguan | 28. Taiwan |
| 3. Tianjin | 16. Shijiazhuang | 29. Xiamen |
| 4. Beijing | 17. Xinxiang | 30. Shantou |
| 5. Nankou | 18. Kaifeng | 31. Hongkong |
| 6. Wanping | 19. Jinan | 32. Guangzhou |
| 7. Lugouqiao | 20. Qingdao | 33. Haikou |
| 8. Zhangjiakou | 21. Xuzhou | 34. Bohai-mar |
| 9. Pingxinguan | 22. Nanjing | 35. Flava Maro |
| 10. Xinkou | 23. Shanghai | 36. Orienta Ĉina Maro |
| 11. Taiyuan | 24. Hangzhou | 37. Suda Ĉina Maro |
| 12. Yan'an | 25. Hankou | |
| 13. Xi'an | 26. Wuchang | |





EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Jamej-oj sur Lanyu- insuleto

de ZHAO JINYUAN

vivmanieron ĉu en fiŝkaptado aŭ en agrokulturo.

Jamej-oj kulturis agrojn per indiĝena metodo heredata de iliaj prapatroj. Ili konstruas sur la montdeklivo teraskampojn kaj kulturis taron kaj bataton. La taro estas ilia ĉefa manĝaĵo.

Sur la ondiga Lanyu-insuleto formiĝis nature ses vilaĝoj kun ĉirkaŭ 2,000 homoj.

La insuleto sin trovas sur la vojo de tajfuno en la okcidenta Pacifiko. Kaj la jamej-oj havas sperton en la batalo kontraŭ la naturo. Por eviti la atakon de tajfuno ili konstruas siajn domojn duone subtere, masonante la bazon kaj murojn per ŝtonoj kaj enbatante lignajn kolonojn en la murojn. Krom loĝdomo ĉiu familio havas ankaŭ "vilaon" por somerumi.

Jamej-oj, kiel iliaj prapatroj, fiŝkaptas surmare en pirogo.

Tiuspeca pirogo povas esti rigardata kiel kristalajo de arto kaj saĝo de la jamej-oj. Ĝi estas farita el granda trunko elektita kaj dehakita en arbaro. Ĝiaj ambaŭ ekstremoj estas alte levitaj kaj sur ili estas delikate gravuritaj brilkoloraj bildoj.

De februaro ĝis junio ĉiujare estas sezono de fiŝkaptado, kio estas granda afero por la jamej-oj. La viroj faras ĉiun preparon antaŭ ol veturi al maro, kaj la virinoj gaje dancas harjetan dancon ĉe marbordo.

En kaptado de flugfiŝoj la virinoj estas absolute malpermesitaj partopreni. La kaptado iras laŭ la severa regulo: Ĉiu partoprenanta kaptisto devas esti silenta dum la tuta procezo. Kiam oni trovas grandan fiŝaron, ili tuj ekbruligas torĉojn. Allogate de la lumo, la flugfiŝoj sage naĝas rekte al la pirogo. Je tio, oni disjetas la reton kaj kaptas ilin multe.

En la ceteraj monatoj de la jaro oni ne povas kapti tiel multe, kaj ilia vivo ne estas garantiata. Tiam la viroj naĝas pli malproksimen en maron kaj pelas fiŝojn en retojn de ĉiuflanke por kapti. En ankoraŭ pli malfacila tempo la viroj devas naĝi submaren ĉe koralajn rifojn, por kapti fiŝojn per memfarita forko.

La distribua metodo estas primitiva: Ĉiu povas ricevi sian porcion. Dum manĝado, oni disdonas la brilkolorajn fiŝojn al la virinoj, la malhelajn al la viroj kaj la restantajn fiŝetojn al la infanoj.

Lanyu-insuleto tutjare havas varman veteron. Krom tio, la jamej-oj vivas izolate de la aliaj partoj de la mondo, tial ili tenas multajn kutimojn de siaj pra-

EN la okcidenta Pacifiko, 70 km. sudoriente de Taiwan-insulo de Ĉinio, sin trovas insuleto Lanyu kun areo de 43 kvadrataj kilometroj. Ĝi sin metas sub la administradon de Taidong-gubernio de Taiwan-provinco. Sur la insuleto vivas generacion post generacio la indiĝenoj — jamej-oj. Ili estis branĉo de Gaŭŝan-nacieco. Pro la longtempa izolita vivo ili ankoraŭ tenas la primitivan



Har-jeta danco

patroj. Ili ĉiuj ne portas pantalonojn, sendiference de la sekso kaj aĝo. Ilia vesto estas tre kurioza: La viroj portas T-forman larĝan tolrubandon ĉe sia lumbo kaj kokso; la virinoj sin ĉirkaŭas per peco da tolaĵo ĉe la talio. La plenkreskulinoj portas oblikve kvadratan tukon sur la brusto.

La ornamajo de virino estas longa koliero farita el agato aŭ vitro, kiu pendas sur la brusto ĝis la ventro. Ambaŭflanke de la brusto kaj ventro estas kvar


brilantaj metalaj lamenoj. Kasako el arĝentaj ringoj estas vira ornamajo, kiu estas simbolo de riĉeco. Ĝi servas kiel heredaĵo kaj estas transdonata de generacio al generacio. Ĉiu generacio devas aldoni al ĝi almenaŭ unu ringon. Kaj se la patro havas multajn filojn, li dispartigas la kaskon en arĝentajn ringojn kaj donas ilin al siaj filoj, por ke ĉiu el ili faru por si novan kaskon.

La jamej-oj ankaŭ konservas matriarkajn restaĵojn: Ankaŭ la virino havas heredajn rajton

kiel la viro. Koncerne aliajn flankojn la virino eĉ havas pli da rajtoj ol la viro. Ekzemple, la virino rajtas libere elekti sian edzon, kaj la edzo devas vivteni la tutan familion, helpi sian edzinon en hejma laboro kaj flegi siajn infanojn. Se viro ne kapablas vivteni sian familion, li ofte estas elpelita el sia domo. Se geedzoj ne havas infanon, tio estas kulpo de la edzo. Se oni eksedziĝas, la viro, sed ne la virino, perdas vizaĝon.

Neniu jamej-o servas kiel monaĥo, sed ili okazigas oferce-remonion. Ili ne faras nek trinkas vinon.

Kaptante flugfiŝojn aŭ partoprenante en aliaj gravaj aktivecoj, jamej-oj ŝatas danci, precipe junulinoj, ofte en nokto. La plej fama el la dancoj estas har-jeta danco. Kantante tradician kanton, la dancantoj malrapide balancas siajn longajn harojn. Kaj poste pli kaj pli rapidiĝas la balancado laŭtakte. Jen la haroj tuŝas la teron, kiam la dancantoj kurbigas sian talion, jen la haroj estas jetitaj post la kranion, kiam ili rektigas sian korpon.



Pirogo de jamej-oj

ESP-VOJO EN UNTERKIRNACH

Dum la printempa konferenco de Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo en Unterkirnach (Nigra Arbaro), okazis la 3-an de majo 1981 la inaŭ-

Ili donas la nomon Esperanto-vojo al tiu ĉi strato en Unterkirnach en FR Germanio.



guro de la Esperanto-vojo. Ĉeestis ĝin 70 esperantistoj el Francio, Svislando kaj FR Germanio. Parolis la prezidanto de la Ligo kaj la vilaĝestro. Legantoj estas petataj sendi gratuleterojn en Esperanto al Burgermeister Siegfried Baumann, Rathaus, D-7731 Unterkirnach, FR Germanio. La inaŭguron montras la foto.

Jus Aperis:

VOLE . . . NEVOLE aŭ KVINDEK JAROJ DA NOVELOJ, 1920-1970

(Schwartz, Raymond)

Represo de la eld. Kopenhago 1971. 192p.

Vendprezo 19.80DM, aĉetebla ĉe Sarlanda Esp. Ligo, Schulstrasse 30, D-6601 Scheidt, FR Germanio.

FONDIĜIS LA PREPARA GRUPO DE LA TIANJIN-A ESPERANTO-LIGO

Por akceli la Esperanto-movadon de Tianjin, la esperantistoj de la urbo starigis la preparan grupon la 14-an de junio. Laŭ invito, prezidanto de la Tianjin-a Verkista Asocio kaj veterana esperantisto Fang Ji funkcias kiel ĝia honora estro. Wu Huo kaj Lao Rong estis elektitaj kiel estro kaj vicestro. La prepara grupo daŭrigos Esperantajn kursojn kaj aliajn laborojn por krei favorajn kondiĉojn por fondi la Tianjin-an Esperanto-Ligon.

JAPANA ESPERANTISTINO EN ĈINIO

Japana esperantistino Sakaeda Soko, kiu laboras en la oficejo de la Tutamerika Aviada Kompanio en Tokio de Japanio, venis al Shanghai de Ĉinio pro ofica laboro je la 22-a de junio. La Shanghai-aj esperantistoj ŝin vizitis. Plenuminte la laboron, ŝi forlasis Shanghai kaj vojaĝis al Beijing la 27-an. Dum sia restado en Beijing, akompanate de ĉinaj esperantistoj, ŝi vizitis la Grandan Muron, la Dek Tri Maŭzoleojn de Ming-dinastio, la Imperiestran Palacon, la Ĉielan Altaron k.a. La 29-an de junio ŝi veturis al sia patrolando.

33-A FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), la plej granda faka organizaĵo en la Esperantomovado, kongresis ĉi-jare en Regensburg, FR Germanio. Tio estis la 33-a kongreso, kaj por tio kolektiĝis 515 gekongresanoj el 18 landoj inter la 15-a kaj 21-a de majo. La kongreson karakterizis abunda kultura kaj distra programo, bona faka laboro kaj vigla ekstera informado. Kiel regule okazas dum la lastaj jaroj, ankaŭ ĉi tiu IFEFF-aranĝo okazis kun ekstermovada subteno de internaciaj fervojistaj organizaĵoj. La venontjara kongresloko estas Balatonfured en Hungario.

Ili tiele dancas ĝis kiam ili paliĝas kaj senfortiĝas.

Se iu jamej-o estas mortinta, oni metas la kadavron sur elstaran lokon ĉe marbordo, lasante ĝin esti mordata de vento kaj pluvo. Tiu ĉi loko estas rigardata kiel sanktejo, al kiu estas malpermesite proksimiĝi libere.

La jamej-oj sur Lanyu-insuleto vivas pace kaj primitive generacion post generacio. Kiam interne de ili okazas kve-

relo, ili ĉiam solvas ĝin per paca interkonsiliĝo sed ne per forto. Tamen estas ankaŭ konflikto inter du klanoj pro la propra intereso por gajni al si fiŝaron en fiŝkapti sezono. Se la konflikto estas relative serioza, ankaŭ povas okazi interbatalo. Tiam kolektiĝas ĉe marbordo ĉiuj viroj de ambaŭ klanoj kun liana kasko, longa ligna lanco enmane kaj ledkiraso surkorpe. Ĉe marbordo troviĝas multaj ŝtonoj. Aŭdinte la ordonon de

sia klanestro ili komencas ataki unu alian per ŝtonoj. Se nur ĉe unua flanko troviĝas kelkaj vunditoj kaj mortintoj, la venko jam estas decidita kaj la batalo finiĝas.

En la lastaj dek jaroj granda ŝanĝo okazis sur Lanyu-insuleto. Plej multaj jamej-oj jam transloĝiĝis en novajn fer-betonajn domojn. Troviĝas tie ankaŭ modernaj konstruaĵoj kiel fiŝhaveno, hotelo, magazeno k. a.



Naciaj Birdoj

Nacia birdo, ĝenerale, estas ŝatata de iu nacio aŭ havas ian gravan valoron.

Usono elektis sian nacian birdon plej frue. En 1782 la blankkapaj agloj, reĝo de la birdoj de Usono, estis tre malmultaj kaj proksimiĝis al pereco. Por protekti ilin kaj inokuli al la usona popolo la ideon ami la birdojn, la usona parlamento decidis preni la blankkapan aglon kiel sian nacian birdon. Ekde tiam ankaŭ multaj aliaj landoj elektis sian nacian birdon. En 1872 Gvatemalio elektis la birdon de libereco, la tre rarajn kaj plej belajn en la mondo, kiel sian nacian birdon. Kun helruĝaj beko kaj piedoj kaj kun kresto kronosimila ĝi estas kovrita tutkorpe de verdaj plumoj, el kiuj iuj longas je unu metro. Ĝi havas neflekseblan karakteron. Se ĝi estas kaptita, ĝi preferas morti ol vivi en kaĝo. Pro tio ĝi ricevis tian nomon kaj estas tre ŝatata de la gvatemala popolo. La japana verda fazano en la fabelo de Momotaro sentigis al la japanoj grandan intimecon. Inter la japanoj cirkulas nemalmultaj kortuŝaj rakontoj pri ĝi. Kaj la japana parlamento akceptis ĝin kiel sian nacian birdon en 1947. La nacia birdo de Britio la milda rube-kolo kun bela rustkolora brusto pepas dolĉe. Ĝi prenas fiinsektojn kiel sian nutraĵon, kaj ĝuas tre altan reputacion ĉe la brita popolo, kiu nomas ĝin birdo de Dio. Kaj en 1960 Britio balote elektis ĝin kiel sian nacian birdon.

En Nederlando troviĝas tia birdo, kies beko aspektas kiel bivo kaj pro tio oni donis al ĝi la nomon bivo-

ardeo. Ĝi estas lerta en kaptado de fiŝoj, sekve la nederlandanoj tre amas ĝin, honoras ĝin per la nomo birdo-fiŝisto kaj prenas ĝin kiel sian nacian birdon.

La hejma hirundo estas lerta en kaptado de insektoj kaj servas kiel protektanto de plantoj. Tre amas ĝin la aŭstra kaj estona popoloj kaj rigardas ĝin kiel sian nacian birdon.

Troviĝas en la mondo ĉ. 20 landoj, kiuj jam havas siajn naciajn birdojn. Ekz. la nacia birdo de Luksemburgio estas orkrestulo; tiu de Belgio — ruĝa falko; tiu de Islando — blanka falko; tiu de Svedio — korvo; tiu de Norvegio — cinklo; tiu de Aŭstralio — menuro; tiu de FR Germanio — blanka cikonio; tiu de Hindio — verda pavo; tiu de Danlando — alaŭdo; tiu de Irlando — hematopo; tiu de Srilankao — galino; ktp.

Mirindaj Hirundoj

En somero de Iquitos de Peruo abundas hirundoj. Vespere, post kiam la sonorilo de la preĝejo Sankta Anna batas la sesan, miloj kaj dekmiloj da hirundoj svarme flugas al la Placo Amas, kovrante eĉ la vesperruĝon.

Tio okazas de aprilo ĝis aŭgusto ĉiujare. Ili flugas el Bolivio, Paragvajo kaj Argentino por tie somerumi. Kiam venas aŭtuno, ili reflugas suden por kovi siajn idojn. Antaŭ sep jaroj la nombro de tiaj hirundoj estis nur ĉ. dek miloj kaj nun kreskis ĝis sep milionoj, ke ili povas kovri la tutan urbon.

Tamen la plej interesa ne estas ilia plimultiĝo, sed ia mirinda feno-

meno, kiu okazis post ilia alveno al Peruo. Ekz. kial ili ĉiutage tranoktas sur la Placo Amas, sed ne en la proksima densa arbaro? Ĉe la alia ekstremo de la urbo troviĝas ankaŭ placo, kiu distancas de la supre menciita placo nur unu mejlon. Tie arboj kreskas dense, kaj la lumo kaj medio estas pli agrablaj, tamen neniu hirundo tie surteriĝas! Kial ili bonorde reflugas en la arbaron en la sekvanta mateno? Kaj krome, la tempo de sunsubiro varias en malsamaj monatoj, sed ili reflugas senescepte post kiam la sonorilo de la preĝejo batas sesfoje. Ĉu tio havas ian rilaton kun la sonado de la sonorilo? Iuj opinias, ke probable la hirundoj trovis ke ilia ripozo sur la placo estas pli sekura ol tiu en la arbaro, ĉar en la arbaro ili ofte estas atakataj de strigoj kaj aliaj bestoj. Aliaj opinias, ke tio rilatas al la hormona ŝanĝo de la hirundoj mem, kaj eble ankaŭ al ilia reakcio al la magneta kampo de la tero. Kaj triaj opinias, ke tio estas nur kutimo, ĉar ili sidas tie longtempe neatakataj, tial ili ne volas ŝanĝi sian ripozejon. Sed estas mirinde, ke antaŭ unu jaro oni provis forpeli ilin. Por tio oni forhakis ĉiujn branĉojn de la arboj sur la placo, antaŭ ol ili venis. Vespere, tuj kiam la sonorilo batis la sesan, ili alflugis. Malgranda parto el ili sidis sur la senbranĉaj arboj, kaj la granda parto flugis tien kaj reen sencele. Iuj el ili enpuŝiĝis en kurantajn aŭtojn, aliaj enflugis en domojn de urbanoj. Kvankam vundiĝis kaj mortis ĉ. 1,000 hirundoj, tamen la ceteraj ankoraŭ ne volis flugi for kaj bruadis en la aero. Tiam havante nenian rimedon, oni ligis branĉojn kaj ŝnurojn al la arboj, por ke la hirundoj tranoktu tie... Kaj ĝis nun tiu mirinda fenomeno restis enigmo malfacile solvebla.

MONDFAMAJ ARTOSKETISTOJ EN BEIJING

En la komenco de junio 9 mondfamaj artosketistoj faris brilan prezenton al la ĉinaj spektantoj en la Ĉefurba Sporthalo de Beijing.

La 18-jara knabino Denise Biellmann el Svisio, la monda kaj eŭropa ĉampionino, ludis sian patentitan "Biellmann-turniĝon" en la malpeza muziko.

La profesia sportisto Toller Cranston el Kanado, konata kiel "pioniro de arta sketado", tre ĉarmis la rigardantojn per sia mirinda prezentado.

Inter la sketistoj estis ankaŭ Andras Sallay kaj Christina Recoczy el Hungario, la ĉampionoj de surglacia dancarto de la Monda Ĉampioneca Konkurso de 1980 kaj subĉampionoj de surglacia dancarto de la Eŭropa Ĉampioneca kaj Olimpika Konkursoj, kaj gefratoj Val Zezic kaj Sandra Bezic el Kanado, ĉampionoj de la monda profesia para artosketado en la lasta jaro.

Ludis ankaŭ aliaj tri artosketistoj: Jo Jo Starbuck el Usono, kiu profunde impresis la rigardantojn per



Svisa sketistino Denise Biellmann en prezentado

sia sentoplana prezentado en la lastjara vizito al Ĉinio, John Curry el Britio kaj Dorothy Hamill el Usono, kiuj gajnis ĉampionecojn en la landaj, Olimpikaj kaj mondaj artosketaj konkursoj respektive.

AMIKA KONKURSO INTER LA ĈINA KAJ JUGOSLAVA PIEDPILKAJ TEAMOJ

La Beijing-a Unuigita Teamo el eminentaj piedpilkistoj de la ĉefurbo de Ĉinio faris amikan konkurson kun la jugoslava teamo "B" je la 20-a de junio en la Laborista Stadion. Tio estis la unua internacia piedpilka konkurso ĉi-jare okazinta en Beijing.

La piedpilkistoj de ambaŭ teamoj faris intensan konkurson sub pluveto kaj fine la jugoslava teamo venkis la Beijing-an per 2:1, dank' al siaj bona tekniko, harmonia ludo kaj sprita taktiko.

Post du tagoj la ĉina teamo "La Unua de Aŭgusto" faris alian konkurson kun la jugoslava kaj la matĉo finiĝis per 1:1.

GUO YUEHUA GAJNIS LA ĈAMPIONECON EN LA TABLOTENISA TURNIRO DE HONGKONG

Guo Yuehua, la monda ĉampiono de Ĉinio, venkis Istvan Jonyer, la mondan eksĉampionon kaj veteranan tablotenisiston de Hungario, en la finalo de la turniro de la mondaj eminentaj tablotenisistoj okazigita en Hongkong en la tria tagdeko de junio.

La poentoj estis 21:13. 24:22. 21:12.

ĈINIO GAJNIS TRI ĈAMPIONECOJN EN LA MONDPOKALA PLONĜA TURNIRO

En junio de 1981 okazis la Dua Mondpokala Plonĝa Turniro en la urbo Meksiko. La 19-jara plonĝistino Shi Meiqin gajnis la ĉampionecon de la tri-metra virina tramploplonĝo per 501.35 poentoj, venkinte Megan Neyer de Usono, kiu

ricevis 483.40 poentojn, kaj Valerie McFarlane de Aŭstralio, kiu ricevis 471.30 poentojn. Alia ĉina plonĝistino Chen Xiaoxia gajnis la ĉampionecon de la virina tramploplonĝa matĉo per 461.15 poentoj. La ĉina sportisto Li Hongping gajnis la ĉampionecon de la vira tramploplonĝo per 613.25 poentoj totale.

WU WENLI — GIMNASTIKA STELULINO

La ĉina gimnastino Wu Wenli estis honorita kiel gimnastika stelulino en la Kvara Internacia Virina Gimnastika Turniro. Venkinte la gimnastinojn de Sovetunio kaj aliaj landoj, ŝi gajnis tri orajn medalojn de virinaj individuaj ĉiurondaj disciplinoj, trabo kaj grundgimnastiko, kaj 1 arĝentan medalon en la ĉevalado.

La nomita konkurso okazis en la 16-17-a de junio en Orleano de Francio kaj ĝin partoprenis gegimnastoj de Francio, Ĉinio, Usono, Kanado, Sovetunio k.a.

ĈINIO GAJNIS SES ORAJN MEDALOJN EN LA INTERNACIA ATLETIKA KONKURSO EN MEKSIKO

Post intensa konkurso Ĉinio gajnis ses orajn medalojn kaj unu arĝentan medalon en la kvara internacia atletika konkurso en Meksiko. La ĉina vira teamo estis honorita kiel la plej bona teamo. Sportistino Liu Aicun gajnis la ĉampionecojn en la kurado de 1,500 kaj 3,000 metroj respektive kaj estis honorita kiel la plej bona sportistino.





- * Polski Lwiazek Esperantystow, Rondo ĉe Kulturdomo, Str. Swierczewskiego 1, 67-400 Wschowa, Pollando, volas kunlabori kun esp. klubo de Ĉinio sur la komuna kampo de esperanta agado.
- * O.W. Van Holtz, Poŝtfako 11086, 9000 Klein-Windhoek, Namibio, dez. kor.
- * Barbara Goralska (33-j.), Str. Buszczynskich 9/32, PL 87-100 Torun, Pollando, dez. kor. kun samaĝuloj, precipe el sudorienta Azio, Afriko kaj Aŭstralio, pri ĉiutaga vivo, popolmoroj kaj E-literaturo.
- * S-ro Arai Hiroshi, 33-jara telegrafista inĝeniero, dez. kor. kun ĉiu landano pri diversaj temoj. Adr. Ooaza-kami 1366-1, Ageo-shi, Saitama-ken, 362 Japanio.
- * F-ino Slava Gartner (24-jara studentino pri ĉinologio), Schottlstr. 12, D-8000 Munchen 70, FR Germanio, dez. kor. kun ĉina student(in)o pri germanistiko. Intereso: lingvoj, literaturo.
- * Ivana Klosova, (14-jara) Smolkova 3, 150 00 Praha 5, ĈSSR, dez. kor. pri sporto, muziko kaj kolektado de poŝtkartoj kaj ĵurnaloj.
- * Heino Metsamart, 43-j. oficisto, poŝtkesto 60, SU-202900 Viljandi,

Estonio-USSR. deziras per ĉi-tiu anonceto trovi geamikojn el ĉiuj landoj ekster Orienta Eŭropo. Korespondas en Esperanto kaj angla lingvo pri ĉiu temo. Kolektas interalie insignoj de sportaj kluboj, broŝuroj pri turismo, bk., PM. Respondos certe al ĉiuj.

- * Beata Nowak, 18-jara studento, ul. B. Tomasza 16/20, 50-221 Wroctaw, Pollando, vol. interŝ. bk. PM, krom tio mi interesiĝas pri muziko.
- * Gaston Rabosee, 67-j. deziras korespondi el tuta mondo pri diversaj temoj. Adr. Rue Fosses-Berger 10 Olne 4641 Belgio.
- * H. Meyari, 21-jara, P.O. Box 488, Karaj-Irano, kun ĉinaj kaj tutmondaj amikoj pri ĉiu temo.
- * Jozefa Koscielska, 18-jara studentino, Skrzypnik 6, 55-216 Domaniow, Woj. Wroclaw, Pollando, vol. interŝ. bk kaj PM, krom tio mi interesiĝas pri muziko.
- * S-ro Wilson Souza Andrade, Ura Joao Matioli 413, 37200 Lavras-M.G. Brasil, dez. kor. pri Roskruĉo, kaj spiritisma doktrino.
- * S-ro Harri J. Melasniemi, 46-j. reklamviro volas kor. tutmonde pri la vivo ĝenerale. Adr: Mikkonk, 4 C 67, 20140 Truku 14, Finnlando.
- * 30-jara esp-isto dez. kor. kaj interŝ. ĉ.t. Z. Wasilewicz, PL-55200 Olawa, str. Chrobrego 100-7, Pollando.

(Daŭrigo de p. 11)

ankaŭ verkis traktajojn sub aliaj plumnomoj. Nun aperis libroforme miaj du novelkolektoj "Krioj" kaj "Vagado", unu kolekto de traktajoj, unu kolekto de rememoraĵoj, unu kolekto de poemoj en prozo kaj kvar eseokolektoj. Krom la tradukoj, aperis ankaŭ miaj volumoj "Skiizo pri la Historio de Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj" kaj "Kolektitaj Noveloj el Tang- kaj Song-dinastioj".

La 16-an de majo, 1930

NOTOJ DE LA REDAKCIO

La aŭtobiografio de Lusin estis verkita en 1930. Lia 7-jara biografio de 1930 ĝis lia morto estas jene:


Lusin estis unu el la organizantoj kaj fondintoj de la Unio de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj, kiu fondiĝis en Shanghai en marto de 1930. En 1933 Lusin aliĝis al la Unio por Civilaj Rajtoj en Ĉinio, kiun Song Qingling k.a. iniciatis por defendi la rajtojn de la popolo kaj helpi liberigi la arestitajn revoluciulojn. De 1931 ĝis 1933 Lusin redaktis kaj aperigis "Trifoje Riĉa je Libertempo" k.a. kvar eseokolektojn. Post 1934 Lusin verkis novelojn kun antikva historio kaj mito kiel temo por metaforo kaj kunmetis ilin kaj kelkajn verkitajn novelojn en la kolekton "Malnovaj Legendoj Nove Redaktitaj". En 1935, kiam la Ĉina Laborist-Kampano Ruĝa Armeo atingis nordan Shaanxi (Ŝenhi) post la Longa Marŝo por rezisti kontraŭ Japanio, li kaj Mao Dun sendis gratulan telegramon al la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En la telegramo estis dirite: "Sur vi estas la estonteco de la homaro kaj Ĉinio." Li mortis la 19-an de oktobro 1936, en Shanghai, pro malsano.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko aperis ĉiuj liaj verkoj, leteroj, taglibroj kaj literaturaj tradukoj.

HUMURAĴO

Segi la vinglason

Iu bankedis kaj la mastro verŝis al li vinon, ĉiufoje nur duonglason. Li do demandis: "Ĉu vi havas segilon? Pruntu ĝin al mi." La mastro demandis la kialon. La gasto diris, montrante la glason: "La supra duono de la glaso estas senutila, oni devas ĝin desegi. Por nenio ĝi servas!"



Je la 100-jara jubileo
de la naskiĝo de
LUSIN (1881-1936),
fama literaturisto,

pensulo kaj revoluciulo de Ĉinio
estas legindaj:

Verkoj de LUSIN en Esperanto

NOVELOJ DE LUSIN

Plena Kolekto

(10-Es-1290)

130 × 120 mm. 496p. bind.

ilustrita

prezo: £2.80 US\$4.80

SOVAĜA HERBARO

Kolekto de ĉiuj 23 poemoj en prozo verkitaj de Lusin

(10-Es-30)

122 × 188 mm. 96p. broŝ.

prezo: £0.35 US\$0.65

BENOPETA OFERO

Bildrakonto pentrita laŭ la samtitola novelo de Lusin

(88-Es-150P)

258 × 188 mm. 57 bildoj broŝ.

prezo: £0.60 US\$1.20

Eldonitaj de la FREMDLINGVA ELDONEJO, Beijing

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN,

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Dancarto de la mongoloj

Fotoj de REN SHIYIN



Solodanco «Ĝojo»



Danco «Ĉevalpaŝistoj»



«Danco kun lampoj» de klasika stilo

La mongola nacieco estas unu el la naciecoj de Ĉinio, kiu havas longan historion kaj 2.6 milionojn da membroj. La mongoloj loĝas ĉefe en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ili havas brilan kulturon kaj estas lertaj en kanto kaj danco. Ĝia pastoralo montras grandanimecon kaj karakteran modestecon. La dancoj de la nacieco karakteriziĝas per firmeco kaj svelteco kaj iuj dancoj estis premiitaj en internaciaj artaj festivaloj.




Lotuso



Koko

Pentristo Chen Dayu

Fotoj de REN SHIYIN



Chen Dayu en pentrado

Chen Dayu estas profesoro de la Nanjing-a Arta Instituto, vicprezidanto de la Jiangsu-a Filio de la Ĉina Belartista Asocio kaj vicedirektoro de la Nanjing-a Kaligrafa kaj Pentrista Instituto. Li naskiĝis en 1912 en Chaoshan, Guangdong-provinco.

Li estas tre sperta en pentrado de floroj kaj birdoj. Li estas tre diligenta en sia laboro, havas vastan vidkampon kaj la objektoj de liaj pentraĵoj estas tre diversaj. La floroj, birdoj, pejzaĝoj, personoj k.a. en liaj pentraĵoj montras altan lertecon. Ĉerpante nutraĵojn el la verkoj de antikvaj famaj belartistoj, li klopodas serĉi pli belan artan lingvon en la praktika vivo, por haki sian propran artan vojon. Lia arta stilo distingiĝas per imponeco, libereco kaj firmeco.

La pentraĵoj de Chen Dayu pri umeo, pino, krizantemo, rododendro, vintra jasmeno, orkideo, bambuo, peonio, lotuso, koko, abelo kaj fiŝo radias per forta vivipovo kaj arta infektemo.

Profesoro Chen Dayu tre emfazas la enkorpiĝon de spirito en la pentraĵo. Liaj pentraĵoj havas vastan spacon de la spirito, vivverajn formojn, fortajn strekojn kaj imponecojn. Cetere, la profesoro estas tre lerta en kaligrafado kaj sigelilgravurado, tial en liaj pentraĵoj estas kunfanditaj la karakterizoj de kaligrafio, pikturo kaj sigelilgravurado, kio markas la tradician stilon de la ĉinaj pentraĵoj.



己未冬月
畫於穗



